


Sennacieca REVUO



Sennacieca Asocio Tutmonda

N-ro 149 decembro 2021

1921
diverskiale honorita
cent jarojn poste

E. Lanti unua prezidanto de SAT



V. Markov nuna prezidanto de SAT



Sennacieca
Asocio
Tutmonda
1921–2021

La pioniroj de SAT

Centjara SAT matura asocio

Pri Kropotkin

Cent jarojn post lia forpaso

Kronŝtadto kaj SAT

Centjara evento

SAT-ANOJ KUTIMIGU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS- KAJ AGADKAPABLO!

Brasensa epopeo

Cent jarojn post naskiĝo de l' kanzonisto

Sacco kaj Vanzetti

Maljustaĵo antaŭ 100 jaroj

Sennacieca **Revuo** estas eldonaĵo de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta - FR-75020 Paris, Francio

Telefono: (+33) 09 53 50 99 58

kontakto@satesperanto.org / www.satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n-ro 1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 / BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markov

Vic-Prezidanto: Pedro Sanz

Sekretario: Brandon Sowers

Kasisto: Bruno Henry

Vic-kasisto Alexandra Paz

Ceteraj membroj: Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone

Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Saioa Escobar, Paz

La skipo de **S.R.**

Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markov

Enpaĝigantoj: Marcelo Redulez kaj Serĝo Sir'

Ceteraj redaktantoj: José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Pedro Sanz, Richard Schneller kaj Franciska Toubale

Kontribuojn por ambaŭ gazetoj

-Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo-
elektronike sendu al

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Publikigo de artikolo ne signifas, ke ĉiuj redaktoskipanoj konsentas pri ĝia enhavo. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par: Ulzama Digital -

Poligono Industrial Arteta Calle 33 - ES-31620 HUARTE (Navarra) - Espagne (Navarre)

Parution annuelle - *aperas ĉiujare* - Le directeur de publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel - Jara abono: Francio 39 eŭroj

Autres pays: *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en Sennaciulo.

Dépôt légal à la date de parution: n-ro CPPAP 0525 G 86567

Supplément au numéro 9-10 (1395-1396) de Sennaciulo, sept-oct 2021

ENHAVO

04

1921-2021 kaj cetere

La redaktoskipo

05

Kiuj estis la unuaj SAT-anoj?

Vinko Markov

13

Pri Kronŝtadto kaj SAT

Frank Mintz

22

Omaĝe al Pjotr Kropotkin

Miguel Fernández

25

Kropotkin, cent jarojn poste

Kani, kontribuo al Vikipedio

28

Neforgeseblaj kamaradoj

Miguel Fernández

33

Trijara epopeo

Serĝo Sir'

39

Dialogoj de la Dioj

Luciano / Gerrit Berveling

56

Sacco kaj Vanzetti

M. Redulez kun la Cenona kvinopo.
Lastpaĝe: la tiurilata kanto en traduko
de Miguel Gutiérrez Adúriz

57


Hela Ella Fitzgerald

Marcelo Redulez

74

Lasta verko de Christo + Rimarkoj

Laŭrenco Septier + Serĝo Sir'



1921-2021 Kaj cetere



Karaj legantoj,

Per tiu ĉi numero 149, Sennacieca Revuo siavice festas sian centjariĝon, kelkajn monatojn post SAT mem. Ja la unua gazetnumero kun tia titolo aperis en oktobro 1921, kaj enhavis diversajn raportojn, de kiuj vi povas legi longajn eltiraĵojn en la tuj postaj paĝoj. Aldone al tiu omaĝo al la pioniroj, kiuj antaŭ cent jaroj starigis la fundamenton de SAT, pliaj tekstoj plivastigas la perspektivon pri la tiama socipolitika kunteksto. Artikoloj pri Kronŝtadto kaj Kropotkin revivigas la tiaman etoson en Sovetio, dum tiu pri Sacco kaj Vanzetti memorigas, ke ili en 1921 estis mortkondamnitaj en Usono. Fine pri jubileo, epopea rakonto pri la eldono de « interna labordokumento » omaĝe al Brasenso atentigas, ke inter la multaj tiujare naskitaj beboj, unu famiĝis kiel kanzonisto kelkajn jardekojn poste. Inter la naskitoj de la jaro 1921 estis ankaŭ Antonio Marco Botella, unu el la neforgeseblaj kamaradoj omaĝitaj ĉi-numere kun siaj samgeneracianoj. Cetere, li ankaŭ estis regula kontribuanto al Sennacieca Revuo ĝis la lastaj jaroj.

SAT ekde sia fondiĝo estis loko, kie eblas kleriĝi ne nur pri strikte socipolitikaj temoj, sed ankaŭ pri aliaj aspektoj de la homa kreemo, interalie pri arto kaj filozofio. Tiurilate, la nuna numero ankaŭ provizas interesajn specimenojn. La Dialogoj de la Dioj de Luciano el Samostato revenigas nin al malnova helena mitologio. Ampleksa dosiero pri Ella Fitzgerald refreŝigas la perspektivon pri la socia enhavo de l' ĵaz-muziko, temo jam traktita en SR en la jaro 1962 ! Kaj fine, vi povos rekte vin bani en la debatoj pri nuntempa arto, komparante du malsamajn perspektivojn pri la verkaro de Christo.

Fine vi certe rimarkis, ke SR surmetis novajn vestojn. Marcelo, la nova enpaŝiganto, ricevis solidaran kunlaboron de sia antaŭulo Serĝo en periodo de jarfina profesia laborpremo. Nun venas via vico kontribui per materialo, kiu provizos la venontan eldonon ! Por ebligi al ĉiuj pli komforte labori venontjare, bonvolu sendi viajn tekstojn kaj bildojn antaŭ la fino de majo 2022.


Agrablan kaj verko-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo



KIUJ ESTIS LA UNUAJ SAT-ANOJ?

Esploro de Vinko Markov



Konsiderante, ke la uzo de Esperanto forte akcelas la proletarian movadon por la fina liberigo de la laborista klaso. La Dresdena kunsido de esp-istaj laboristoj aprobas la statutojn de S.A.T., kies celo estas utiligi esp-on praktike por la klasaj celoj de laboristaro tutmonda.

La bildo pri la centjariĝo de SAT, kreita de Pŝemek Wierzbowski por prezenti la 94an kongreson kaj uzita kovrilpaĝe de tiu ĉi jubilea numero de *Sennacieca Revuo*, utiligas foton de la partoprenintoj en la unua SAT-kongreso*. Mi klopodis trovi, kiuj estas tiuj homoj helpe de nun alireblaj dokumentoj. Mi ne retrovis ĉiujn, sed deziris almenaŭ elstarigi kelkajn, unue por omaĝi al ili, ĉar se ni povas nun jubilei, tio pro ilia laboro, kaj due por montri, ke la naskiĝo de SAT estis kolektiva afero kaj ne nur plenumo de projekto, kiu eliris tutpreta el la cerbo de Lanti.

*La kerna triopo:
Adam - Bannier -
Glodo*

La kreintoj de SAT estis membroj de la asocio «Liberiga Stelo», jam ekzistanta antaŭ la unua mond-milito, kaj kiu refunkciis dum la du jaroj antaŭ la fondo de SAT. Tial la unua numero de *Sennacieca Revuo* estis samtempe la numero 20 de *Esperantista Laboristo*, gazeto denove aperanta ekde aŭgusto 1919 sub la redaktado de **Eŭgeno Adam**, poste konata kiel **E. Lanti** (1879-1947). En *Esperantista Laboristo* Adam skizis, sub la signifoplena plumnomo *Sennaciulo*, la bazajn principojn de la fondota SAT, per serio de artikoloj, poste grupigitaj en la broŝuro «*For la neŭtralismon!*». La vojaĝo al Prago, kun haltoj en Berlino kaj Dresdeno, estis cetere lia unua veturo eksterlanden. En

* Fondokongreso, Prago 1921.

(Foto uzita kovrilpaĝe en la ciferoj de la nombro 100)



siaj vojaĝ-impresoj, la onta mondvojaĝanto jene priskribis siajn unuajn translandlimajn spertojn, la 23an de julio 1921:

«La vagonaro forkuras en la nokto... al Berlin!... Kaj tiuj du vortoj rememorigas al mi, ke antaŭ 7 jaroj, soldatoj ebriaj de patriotismo kaj vino kriaĉadis ankaŭ: Al Berlin! Al Berlin! Dume, tie, same frenezaj patriotoj kriaĉadis: Al Paris!... Al Paris!

Nu, morgaŭ mi estos en la ĉefurbo de Germanio, kaj min tie fratece atendas kamaradoj. Ĉu vere?

[...] Tagiĝas. Jam mi transpasis la landlimon de Belgio. Ĉe la vagona fenestro mi rigardas la kampojn, la domojn. Ĉio aspektas, kiel en Francio.

Baldaŭ mi estos en Germanio... Nu, jam mi estas.

La vagonaro haltas, kaj jen, aŭdiĝas lingvo, kiun mi ne komprenas. Tamen mi ne vidis landlimon nek sur la ĉielo, nek sur la tero. Sed nun, mi ekkonscias, ke mi estas en fremda lando, ĉar mi ne sukcesas legi la murajn surskribojn. La lingva diferenco estas efektive natura baro inter la popoloj.» [1]

Tre oportune, la alfabeto ordo ebligis al Adam fariĝi la unua SAT-ano laŭ matrikulo, ĉar la 165 unuaj aliĝintoj al SAT ricevis matrikulojn laŭalfabete [2].

La centra rolo de Lanti dum la unuaj jardekoj de la vivo de SAT estas bone priskribita en la unua volumo de la *Historio de SAT* [3], en liaj abundaj verkoj kaj en la biografio de Borsboom [4].

Sed Lanti ne estis sola. Jam dum la preparjaroj 1919-1921 li povis kalkuli kun la apogo de du homoj, kiuj ĝis la fino restos fidelaj kaj helpemaj amikoj, pacience eltenantaj lian ŝtorman karakteron: Bannier kaj Glodo.



Lucien Bannier (1893-1986) ricevis la matrikulon 11, kaj foje estis kromnomata «la konscienco de SAT». Profesie dungito ĉe banko, li firmigis la financon bazon de la ĵusnaskita asocio. Dum entute ses jardekoj, ofte senbrue sed persiste, li ludis centran rolon en la administrado de SAT. Lia lasta mandatperiodo en la Plenum-Komitato (1981-1984) estis la unua de Guy Cavalier, kiu ĉijare emeritiĝis kiel PK-ano post 40 jaroj da funkciado. Tio klarigas kial SAT profitis grandan kontinuecon en sia funkciado, malgraŭ ĉiamaj ŝanĝoj. Tiurilate ankaŭ endas mencii, ke la filo de Lucien, Jacques Bannier (JoBo) estas unu el niaj plej malnovaj nunaj kamaradoj. Ankaŭ li estis PK-ano, inter la jaroj 1990 kaj 2009.

Ludoviko Glodo (1891-1952, matr. 50) estas nun malpli konata ol Bannier, ĉar li mortis pli frue, en 1952, sed ankaŭ li estis tre grava persono. En sia nekrologo, Bannier substrekis la fakton ke malgraŭ sia diskreteco, Glodo estis atentema pri ĉiuj manovroj kaj klopodoj transformi SAT al io alia ol ĝi estas, ekzemple asocio specife ligita al iu politika partio:

Li ĝuis la simpatian de ĉiuj, kiuj deziris la prosperon de la Asocio, sed ankaŭ la malamon de la agitistoj, kiuj volis ke SAT submetiĝu al la interesoj de politikaj partioj. Nun ni povas diri ke, por bari al la manovroj de tiuj perturbantoj, Glodo estis ege pli lerta ol li aspektis; en kelkaj okazoj, li senbrue sed majstre abortigis planojn, kies sukceso estus signifinta la

morton de SAT. Jes, kelkaj makiaveloj konsideris Glodon neatentinda, sed tiu mistaksado de liaj kapabloj kaŭzis ilian malvenkon.» [5]. Inter la gravaj kontribuoj de Glodo estas la produktado de la unua volumo de la *Historio de SAT* (1921-1952) [3]. Li estas

unu el la kunverkintoj de tiu dokumento, kaj aparte insistis pri la tiea represo de longaj eltiraĵoj el *For la Neŭtralismon!* Li cetere estis la unua mastrumanto de la libroservo de la franclingva LEA-o, ekde 1928 helpate de sia edzino Glodino, kiu poste daŭrigis tiun laboron ĝis 1966 [6].



Adam en Berlino kun ontaj informantoj el kaj pri Sovetio: Laurat kaj Ivon

La kamarado, kiu atendis sur la kajo kiam Adam eltrajniĝis en Berlino nomiĝis **Lucien Revo**. Aŭstro-devena, li tiam estis korespondanto de franca komunista gazeto en Berlino. Lia vera nomo estis **Otto Maschl**, sed pli poste dum jardekoj li estos konata kiel **Lucien Laurat** (1898-1973). Lia elokventa



parolado dum antaŭkongreso en Dreseno (vidu poste) estis grava paŝo por akceptigi la principon de sennacieca strukturo de SAT. Poste, li dum la kongreso mem rolis kiel kunsid-prezidanto. Kvankam administre li ne estis inter la plej unuaj aliĝintoj (matr. 388), lia graveco en la fondo de SAT ne estas subtaksebla. Inter 1923 kaj 1927 li loĝis en Moskvo, kaj de tie proksime observis la misfunkciadon de la Sovetia sistemo, en la jaroj kiam Stalino plifirmigis sian povon. Post mallonga halto en Bruselo en



1927, li definitive instaliĝis en Parizo ekde 1928. Fakulo pri marksismo, kiu interalie verkis la antaŭparolon al la Komunista Manifesto en la reeldono de SAT en 1936, kaj diskonigis en Francio kaj en Esperantio la penson de Roza Luksemburg kaj aliaj neortodoksaj centr-eŭropaj aŭtoroj, li estis samtempe forta kontraŭulo de Stalino. Iam instruisto en sindikataj klerigo-centroj, li ankaŭ estis regula preleganto dum SAT-kongresoj, aŭ dum la kongresaj universitatoj de UEA.

Kun Adam vojaĝis alia onta informonto pri Sovetio: **Robert Guiheneuf** (1899-1986, matr. 54). Li estis orfo, lignaĵisto, protektato de Lanti, kiu preskaŭ komence konsideris lin kiel sian spiritan filon. Guiheneuf ankaŭ vojaĝis al Sovetio kiel li pasigis jardekon (1923-1933), laborante ĉe diversaj postenoj, de manlaboristo ĝis mastrumanto de sufiĉe ampleksa fabriko. Ankaŭ li forlasis Sovetion plene seniluzigita kaj timanta pri sia fizika sekureco. Li estis la ĉefa informofonto de Lanti por la broŝuro *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?*», kaj tial aperas kiel kunaŭtoro, sub la plumnomo Ivon. Li cetere verkis du samtemajn librojn en la franca. Guiheneuf vivis ĝis la jaro 1986, sed plene forlasis SAT-on kaj ĉian formon de esperantista aktiveco post la dua mondmilito [7].



Jam en Berlino Adam koliziis kun la neŭtralaj esperantistoj. Ĉe kunveno en berlina restoracio, honore al karavano de eksterlandaj vizitantoj, li, Guiheneuf kaj **A. Sproeck**, el la berlina laborista grupo, provokis unuan skandalon, rifuzante leviĝi dum kantado de *La Espero*. Li klarigis, ke li taksas tion religieca rito, simila al kantado de nacia himno. Kaj aldonis: *Ni ne faru el Esperanto novan partion, novan religion*» [1]. La postan tagon, dum oficiala akcepto en la urbodomo, li denove vekis nekomprenon per sia rifuzo paroli kiel franco, post saluto de diversaj alilandanoj. Adam jene konkludis pri sia restado en Berlino:

«Nu, mi ne bezonis iri ĝis Praha por sperti, ke en la esperantistaron ne venis «nova sento».

Ĉe la Unua Kongreso, Zamenhof diris, ke:

‘unuan fojon en la homa historio ni, membroj de plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia, ne kiel fremduloj, sed kiel fratoj, ĉar hodiaŭ kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj!’

Kompatinda Majstro. Hodiaŭ kunvenas Svedoj kun Germanoj, Angloj kun Belgoj, ktp. Samkiel Kristo tre certe ne rekonus siajn disĉiplojn en la plimulto de la nunaj pastroj, Zamenhof ankaŭ ne rekonus siajn en la plimulto de la nunaj esperantistoj. La «interna ideo», la «nova sento», tio estas nia internaciismo, nia sennaciismo. Nur ni, sennaciuloj, prave povas ŝati nin, kiel fidelajn daŭrigantojn de la penso Zamenhofa» [1].

La Dresdena antaŭ-kongreso (28-29/1921) kaj ŝakŝiaj aktivuloj: Köckeritz kaj Lerchner

La naciisma pensmaniero, kiun Adam observis ĉe la neŭtralaj esperantistoj, ekzistis ankaŭ ene de la laborista movado. Tial la Internacia Antaŭ-kongreso de Laboristaj Esperantistoj en Dresdono, kie samtempe kunvenis ankaŭ neŭtraluloj, estis oportuna momento por rememorigi la principojn diskutitajn dum la du antaŭaj jaroj en Esperantista Laboristo. La protokolo informas nin pri ĝia programo: «*Post legado de salutleteroj senditaj el Francio, Norvegio, Svedio, Aŭstrio kaj Anglio, oni akceptis la jenan tagordon: 1. Argumentado pri la neceso de sennacieca Internacio. Oratoro K-do L. Revo. 2. Diskutado pri la regularo de tia organizaĵo. - 3. Diversaĵoj.*» [8]

La protokolinto, **Jean Roth** el Frankfurto, raportas ke Revo parolis tiel konvinkante, ke post la fino de sia 1/2-hora parolado neniu deziris paroli en la diskutado». La ekzaktan tekston de la parolado ni ne konas, sed tre verŝajne temas pri io tre proksima al la ĉefartikolo de Revo, titolita «Mondlingvo kaj klasbatalo», kiu aperis en la unua numero de SR. Eltiraĵo de ĝi estis represita en la libro «Antaŭ unu jarcento», p. 315. Post diskutado pri statutprojekto proponita de la parizaj iniciatintoj, komisiono estis elektita por pretigi la jenan rezolucion:



I. - *Konsiderante, ke per la progresanta disvastiĝo de esp-o, kaj klasa kontrasto de la kapitalista socio ankaŭ eniĝis en la esp-an movadon; konsiderante, ke la faktoj pruvis, ke la burĝaj esp-istoj neniel povas helpi por propagandi esp-on en niaj klasbatalaj organizaĵoj; konsiderante, ke la disvastigo de esp-o en la posedantaj kaj trouzantaj klasoj neniel utilas la klasajn celojn de la proletario.*

II. *Konsiderante, ke esp-o povas esti nur ilo, uzata por bonaj aŭ malbonaj celoj; ke la esp-a movado estos profitdona nur se ĝi staras sur du fakorganizaĵoj: porvarba kaj porpraktika; konsiderante, ke la uzo de esp-o forte akcelas la proletarian movadon por la fina liberigo de la laborista klaso, la Dresdena kunsido de esp-istaj laboristoj aprobas la statutojn de S.A.T., kies celo estas utiligi esp-on praktike por la klasaj celoj de laboristaro tutmonda. [8]*

Do la esprimo «SAT, kies celo estas utiligi esperanton praktike por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda», kiu daŭre kuŝas en nia statuto, estis la produkto de la kundiskutado de la partoprenantoj en la antaŭkongreso. Poste, dum la SAT-kongreso mem, Bannier proponis enmeti ĝin en la statuton de SAT.

La antaŭkongreson en Dresdeno ĉeforganizis **Paŭlo Köckeritz** (matr. 77), prezidanto de la Dresdena laborista grupo. Li kun sia edzino **Anna** (matr. 76) konsistigis eble la unuan aktivulan paron ene de SAT. Köckeritz poste



ankaŭ tradukis kaj verkis diversajn artikolojn por la SAT-organoj, foje sub la plumnomo «Senheredigito», ekzemple pri la situacio de la germana laborista klaso dum la ekonomia krizo de la 20aj jaroj. En 1929, li partoprenis en la organizo de la postkongresaj ekskursoj post la SAT-

kongreso en Lejpcigo. Li transvivis la militon kaj en 1947 fariĝis SAT-peranto por la orienta parto de Germanio, tiam okupita de Sovetio.

Inter la kvar membroj de la proponkomisiono, kiu preparis la deklaron, estis aktivulo el Lejpcigo, la dua plej grava urbo en Saksio: **Rikardo Lerchner** (1886-1960, matr. 90). Li en 1923 fariĝis la unua dungito de la SAT-oficejo en Lejpcigo, kie Sennaciulo estis presata ekde januaro 1922. La oficejo funkciis ĝis la povokapto de la nazioj en 1933, kiu devigis lin urĝe malaperigi kelkajn dokumentojn, foje eĉ detruiri ilin. Li ankaŭ sukcesis organizi la sendon de la tiea librostoko al Parizo kaj Stokholmo. Kaj en tiu oficejo li kunlaboris en 1924-25 kun **Norberto Bartelmes**. Bartelmes ne ĉeestis la fondokongreson, sed li poste fariĝis la unua dungita redaktoro de Sennaciulo, unue en Lejpcigo kaj poste ekde 1928 en Parizo, kie li deĵoros ĝis la 1980aj jaroj. Dum siaj laborpaŭzoj en Lejpcigo, Bartelmes kaj Lerchner kunverkis la rektmetodan lernolibron «Petro», kiu estis eldonita 8-foje, plej laste en 1957.



La kongresanoj en Prago (1-3/8/1921): membroj kaj gastoj

La protokolon pri la kongrestagoj en Prago enkondukas teksteto subskribita de «Ĉeestinto». Plej verŝajne temas pri la redaktisto de la gazeto, do Adam mem. En ĝi li bildigas la tiaman etoson: *Komence la afero iris iom brue kaj konfuze. Tio ne ŝajnas miriga, kiam oni scias, ke kelkaj ĉeestantoj ne estis membroj de «Liberiga*

Stelo», kaj antaŭe ne estis studentaj la projekton de statutoj prezentitan de la Organiza Komitato Pariza. Al tiuj K-doj la O.K. konsentis parol- kaj propon-raĵton, sed rifuzis voĉdonraĵton. Kiu povus mallaŭdi tiun agadmanieron? Estas vere strange, ke K-doj, kiuj sciis pri niaj penoj kaj klopodoj jam de unu jaro, tamen atendis ĝis la Kongreso por aliĝi! Ĉu decis al ili postuli voĉdonraĵton? Iom da hontemo iliaflanke konvenus.[9]

Tie ni trovas unuan aplikon de regulo daŭre valida: ja ĉiuj en la kongreso de SAT havas la rajton esprimiĝi kaj doni sian opinion, sed kompreneble decidrajtaj estis nur la laŭregulaj membroj.

Poste li precizigas la intencojn de la Organiza Komitato (O. K.) el Parizo:

La plano de la O. K. celis eviti du rifojn: 1-e malhelpi, ke nia Asocio estu sub la influo de tiu iluziplena spirito nomata «Homaranismo», kaj 2-e, ke ĝi konsistu nur el membroj de sama politika partio. Precipe la komunistoj deziris tion ĉi, tute ne atentante, ke nune tia organizaĵo ne estus vivkapabla. Tamen la plimulto da ili konsciis pri la realeco kaj akceptis nian projekton, dum kelkaj, kvankam kun-laborantaj en la neŭtrala U.E.A. – eĉ kiel delegitoj – tamen malcedeme ne volis sin kompromisi (!) en nia ne tute pura komunistika Asocio. Kiom nekonsekvence! [9]

La rekta atako al la Homaranismo, cetere detale kritikata en «For la Neŭtralismon», iel aspektas kontraŭdira kun la pli supre citita pretendo plej fidele daŭrigi la penson de Zamenhof. Cetere en la protokolo ne aperas indiko, ke iu argumentis rilatigante sin al tiu pens-maniero. Tamen, la nura virina interveno dum la kongreso esprimis la penson de pacisma aktivulino:

*«Tiumomente F-ino **Mary Riley** (London), petas la parolon. Ŝi deturnas ĉies atentemon per longa deklaro pacifista; ŝi pretendas, ke, por «mortigi militon», sufiĉas rifuzi la soldatservon.*

K-do Revo, per flua kaj elokventa respondo, pruvas, ke tiu rimedo donus kontraŭan rezultaton.» [9]

Mi tute ne scias, ĉu tiu virino poste plu aktivis en la Esperanto-movado. Almenaŭ ne ekzistas facile troveblaj spuroj pri ŝi en la reto. Tio ne estas la nura mistero solvenda pri la ĉeestintoj en Prago. La protokolo indikas, ke:



Partoprenis K-doj el Anglio, Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Rusio, Rumanio, Svedio, Svisio.

Sume: 79, el 15 nacioj.»

En tiu ĉi listo aperas fakte nur 13 landoj. Do okazis ĉu miskalkulo, ĉu forgeso de du landoj el la listo. La protokolo mencias, ke estis senditaj rajtigiloj el Kristiana, Norvegio, kaj ke la komunistika esperanto-grupo «Progreso» el Lisbono donis mandaton al **Jaroslav Petr**, ĉeforganizanto de la kongreso el Prago. Sed tiu mandato estis deklarita senvalora, ĉar neniu el tiu grupo ĝis nun aliĝis al Liberiga Stelo.

*Pontoj kun ekster-europaj kontinentoj:
Helmi Dresen kaj Ralf Bonesper*

Nun ni do atingas la grizan zonon. Estas kelkaj homoj, pri kiuj povas esti, ke ili ĉeestis en la kongreso, sed ne estas certe, ĉar ili ne intervenis aŭ iliaj intervenoj ne estas registritaj en la protokolo. Plej facile estas fari hipotezojn pri virinoj, ĉar nur kvar aperas sur la kongresfoto. Jam menciitaj estis Anna Köckeritz kaj Mary Riley. Krome apud Revo staris Marthe Langer, lia tiama edzino, de kiu li disiĝis jam tiujare. Ŝi plej verŝajne neniam aliĝis al SAT, eble eĉ ne estis esperantistino. Sed kiu estas la kvara virino? Se supozi, ke Estonio estis lando forgesita en la listo de partoprenantoj, povus temi pri **Helmi Dresen** (1892-1943, matr. 34). Ŝi ĉiuokaze havas lokon inter fondintoj de SAT pro la frua matrikulnumero. Ŝi estas grava interalie pro sia politika aktiveco en Estonio. Interalie ŝi fariĝis urb-estranino de Talinn dum la sovetia periodo komence de la dua

mondmilito, kaj pro tio estis mortpafita de la nazioj. En la tempo de la fondo de SAT, ni havas cetere skriban pruvon, ke ŝi estis aktiva membro, pro tio ke ŝi tradukis el rusa gazeto nekrologon pri **Vadim Stopani**, anarkista komunisto el Rusio, kiu venis al Ĉinio por vivi la tian laboristan movadon, kaj decidis tie mortigi sin. Pri Stopani estis artikolo en la pasintjara SR. Kvankam li mortis en marto 1921, do teorie kelkajn monatojn antaŭ la fondo de SAT, li tamen estis konsiderata kiel unu el ĝiaj anoj:



*Nekrologo –
Vadim Aleksandro STOPANI*

Kun vera kortuŝiĝo ni eksciis pri la morto – memvola morto – de tiu nia juna K-do. Li estis unu el la unua anoj de S.A.T., kaj ni tre kalkulis je li por vivi nian movadon en Oriento.

Filo de A. Stopani, rusa statistikisto, regiona ĉef-komisaro de Sovieta Rusio, li naskiĝis en Kaŭkazo kaj, 18-jare, sin memmortigi en Ŝanĥaj, kien li estis forkurinta por ne militservi en la Kolĉaka armeo.

Li lasis leteron en kiu li klarigis, kial li forkuras el la vivo: «Mi mortas kun rideto sur miaj lipoj, li diras. Ĉu oni povas timi lokon, kie oni ne estas, kaj tempon, kiam oni ne ekzistas. Ne vera estus la opinio, ke mi malekzistigas min pro malesperiĝo je vivo. Ne, pli vera estus la opinio, ke mi malesperiĝis je mi mem, sed ankaŭ ĝi estus tute ne vera. Ne havi propran saĝon kaj vidi ĉirkaŭe malsaĝecon estas malfacile por mi. Ha! Sufiĉe.»

Tiu junulo estis cedema, silentema, kaj influigema. Dum la lastaj tempoj li multe legis Ŝopenhauer, Vajninger kaj aliajn filozofojn de l' pesimismo. Cetere V. Stopani antaŭnelonge estis eksciinta, ke en Baku sin memmortigis lia frato kaj 3-4 el liaj kunlernantoj.

Ĉinoj, Koreanoj, Rusoj ĉeestis la entombigon, kiu, laŭ deziro de la mortinto, estis tute senceremonia.

Laŭ notoj, afable tradukitaj de Helmi Drezen, el la rusa gazeto «Ŝanĥajo-Vivo».[10]

Rilate aliajn kontinentojn, ankaŭ menciendas, en la unua numero de SR (p7), mondonacoj de la kubanino **Mariano Rosa** (matr. 253) kaj de la japano **Kunitaro Fukuta** (matr. 392).

La protokolo menciis ĉeestinton el Hungario. Povus temi pri **József Porcsin**, poste konata kiel **Ralf Ruĝamo Bonesper** (matr. 29). Unue li estis laborista aktivulo en Hungario, partopreninto kiel ruĝa soldato dum la Konsilantara registaro en Hungario en 1919, li jam en 1921 forvojaĝis al Okcidenta Eŭropo, kaj poste al Usono. En Usono li estis vere tre grava SAT-ano. Li prezidis la novjorkan SAT-rondon en 1929 kaj la postan jaron fondis la Nordamerikan LEAon de SAT, kiu funkciis ĝis 1935. Post la dua mondmilito, li transprenis de la iniciatintoj en Francio kaj Svedio la Sennaciecan Solidarservon. Ulrich Lins en freŝdata retartikolo raportas, ke «Dum jaroj li organizis la ekspedadon de nutraĵ-pakaĵoj el Usono al esperantistoj en Hungario kaj aliaj orienteŭropaj landoj, ankaŭ al Japanio. Inter februaro 1948 kaj februaro 1949 entute 167 pakaĵoj estis senditaj.» [11]. Cetere, la ĉi-apuda foto supozigas, ke la nutraĵoj foje ankaŭ estis intelektaj, ĉar sur unu el la sendotaj pakoj videblas numero de Sennaciulo. Kaj ĝuste tiun gazeton li sendis al kamaradoj en Osako, de kie ni ricevis kandidatiĝ-proponon por la SAT-kongreso en 2023. Rilate tiutempajn solidarec-iniciatojn, en la *Historio de SAT* oni ankaŭ mencias, ke survoje al la kongreso en Arhuzo en 1947, karavano haltis ĉe la landlimo de Germanio, kun pakaĵoj de nutraĵoj kaj vestaĵoj por la tie suferantaj kamaradoj, kiuj ne povis tiam forvojaĝi, vivante en milite venkita lando.



Konkludo

Inter la ĉeestantoj de la kongresfoto menciitaj en «*Vivo de Lanti*» (ilustraĵo 8 inter paĝoj 74 kaj 75), du personojn mi ne citis, pro manko de detalaj informoj. La unua estas **Paul Herrmann** (matr. 344) el Dresdeno, naskiĝinta en 1898, kiu restis fidela al SAT ĝis la jaroj 1970. La dua estas **D-ro Klauber**, oficiala delegito de la centra komitato de la komunista partio de Germanio, kaj kiu plurfoje intervenis dum la laborkunsidoj. Pri lia eventuala posta agado mi ne trovis indikojn. Dum la tria laborkunsido ankaŭ intervenis la jenaj kamaradoj, kiu do plej verŝajne aperas sur la foto, same kiel la protokolanto Jarl Petr **Kraml** (Pilzeno, matr. 417), **Kolev** (Sofio, matr. 614), **Komanin** (Rumanio), **Hugot-Raison** (Troyes, matr. 179), **Altermann** (Dresdeno, matr. 4) kaj **Stribrsky** (Kladno, matr. 143). Dum aliaj tagoj esprimiĝis krome **Deubler** (Munkeno, matr. 30), **Mahn, Feit** (Zuriko), **Rauschenbach, Jost** (Zuriko), **Ŝidlo** (Prago), **Goldstein** (Dresdeno,

matr. 51), kaj **Lämmerhirt** (Lejpcigo, matr. 84). Cetere, almenaŭ unu onta SAT-ano, la teksaĵ-laboristo **Arthur Whitham** (1893-1942), el la angla urbeto Burnley, 30 km for de Manĉestro, ĉeestis en Prago kiel partoprenanto en la UK, kaj nur iom poste trovis la vojon al SAT [12]. Do, restas materialo por plua esplorado.

Lastan vorton mi lasas al la protokolanto de la unua kongreso:

Fine, Prezidanto varme dankas la kongresanojn, kaj esprimas la deziron, ke de nun, ĉiu en sia medio, kontribuos plej al disvastiĝo, plifortiĝo de nia Sennacieca Asocio Tutmonda. Finita estas la unua kongreso de S.A.T. La Satanoj disiĝas kontente..., tamen antaŭ la pordo unua danĝero ilin minacas: oni ilin fotografpafas!!

Dankoj

Al Claudine Guéguen, Pedro Sanz, Xavi Alcalde, Ralf Dumain, Ŝana, Kani, Kardo Biurrun kaj Marcelo Redulez, kies demandoj, komentoj kaj kuraĝigoj spronis la aperigon de tiu ĉi artikolo.

Fontoj

- [1] E. Adam. Vojaĝ-impresoj kaj rimarkoj, *Sennacieca Revuo* n°1 (20), oktobro 1921, p 5-6. *Daŭrigata en postaj numeroj.*
- [2] Adresaro de SAT, 1923. *Konsultita en la reta arkivo de la Aŭstra Nacia Biblioteko.*
- [3] *Historio de SAT 1921-1952*, reeldonita en *La progresema Esperanto-movado en perspektivo*, Eldona Fako Kooperativa de SAT, 2016.
- [4] E. Borsboom, *Vivo de Lanti*, SAT, 1976.
- [5] Lucien Bannier, Forpasis veterano de SAT, *[Bulteno de] SAT-Amikaro*, decembro 1952
- [6] Glodino. Por fini ĉapitron, *[Bulteno de] SAT-Amikaro*, januaro 1966
- [7] H. Guiheneuf, *Dix ans en URSS, 1923-1933: l'itinéraire d'Yvon*, Nantes, Ouest éd, 2004, 173 p.
- [8] *Internacia Antaŭkongreso de Laboristaj Esperantistoj en Dresden*, *Sennacieca Revuo* n°1 (20), oktobro 1921, p 4-5.
- [9] *La Unua Internacia Kongreso de la Revolucia Esperantistaro*, *Sennacieca Revuo* n°1 (20), oktobro 1921, p 2-4. *Konsultebla en la reta arkivo de la Aŭstra Nacia Biblioteko.*
- [10] *Sennacieca Revuo* n°1 (20), oktobro 1921
- [11] Ulrich Lins, *SAT-Solidareco el Novjorko*, el la retejo Militrakonto, 23a de junio 2019
- [12] Bill Chapman, *A Burnley weaver and his travels thanks to Esperanto*, retejo de Esperanto-Asocio de Britio, 28a de marto 2020.



Kelkaj rimarkoj de Frank Mintz

Pri KRONŜTADTO kaj SAT

MARTO 1921

1 - Kronŝtadto antaŭ SAT kaj ene de SAT

«Merkrede la 9-an de aŭgusto [1922]. – Jam ni estas en Rusio. Je la 7:30 ni enveturas la rodon de Kronŝtadto. Aeroplano superflugas. Rusaj komisionanoj enŝipiĝas por kontroli la pasportojn. Kronŝtadto aspektas kvazaŭ mortejo. Videblas postsignoj de la marista ribelo. Dekstre fortikaĵo estas detruita.»

Tiel aŭdacis Eŭgeno Lanti en la enkonduko de sia fama «Tri semajnoj en Rusio», aludi pri la problemoj de Kronŝtadto, donante samtempe al la legantoj de *Sennacia Revuo*, du gravajn informojn: «mortejo» kaj «marista ribelo». La leninista simbolo de la popola povo inter 1917 kaj 1921, la fortreso de Kronŝtadto fariĝis centro de marista ribelo, fare de matrosoj teorie ŝirmantoj de la popolo kaj aŭtomate bolŝevistoj, laŭ la leninista propagando. «Mortejo» aludis necese al la kadavroj de ribeluloj kaj de leninistoj kaj eble (laŭ la grado de scioj pri Rusio ĉe ĉiuj legantoj) al la leninismo mem.

Interesa paradokso ĉar ĵus unu monaton post la marista ribelo aperis en la gazeto *Esperantista Laboristo*, la «Letero el Kronŝtadt», subskribita la 5an de aprilo 1921

“
Sed kamaradoj,
ne forgesu, ke ni
ne havas
paperon, eĉ ne
por niaj ĉiutagaj
gazetoj.”

Eŭgeno Lanti, en la sama artikolo avertis:

«Nenia politika motivo povas trudi al mi la devon silenti pri la malbonaj impresoj, kiujn mi kunportis el Rusio. Amicus Plato, sed magis amica veritas. Mi amas kaj estas preta defendi la Rusan Revolucion. Nu, ĉefe pro tio mi volas paroli pri ĝi malkaŝe, ne fipolitikiste. Cetere la Soveta Respubliko estas jam sufiĉe potenca por ke, sen ia skrupulo, oni diru pri ĝi veron. Oni ankaŭ ne forgesu, ke la bolŝevistoj mem ofte riproĉas akre al si mem.»

Por disponi mallongajn kaj efikajn dokumentojn rilate al la Kronŝtadta ribelo en marto 1921, mi esperantigis tri rusajn dokumentojn koncerne la eventon kaj tri citaĵojn de Lenino.

Fine, mi komentas la esperantistan pozicion en Kronŝtadto kaj ĝian agadon post la marista ribelo, kun la konsekvencoj por SAT.

2 - La marista ribelo en Kronŝtadto

La preskaŭ unika serioza kaj objektiva fonto konsistas en iu libro eldonita en 1997 de historiistoj. Aperas en la komenco la dekreto de la 10-a de januaro 1994 de la tiama prezidanto de la Rusa Federacio Boris Jelcin:

«1) Nuligi la rezolucion de la 2-a de marto 1921 de la Soveto de Laboro kaj Defendo de Laboro kaj Defendo, proklamante ke estis eksterleĝuloj la partoprenantoj en la eventoj de la printempo 1921 en Kronŝtadto.

2) Rekoni kontraŭleĝaj, kontraŭdirantaj la esencajn civitanajn rajtojn de la homaro, la subpremojn faritajn al la matrosoj, soldatoj kaj laboristoj de Kronŝtadto pro la akuzo de armita ribelo.

3) Konstrui en la urbo de Kronŝtadto monumenton honore al la viktimoj de la eventoj de la printempo 1921.»

La kunteksto de la vintro 1920-1921 estis la tre malbona ĉiutaga ekonomia situacio en Sovetio kaj la subpremo de la kritikoj de la komunista partio kaŭze de Ĉeka(*) (elpensita kaj altrudita de Lenino la 20-an de decembro 1917), kiuj okazigis kreskantan malkontenton de la popolo.

La leninista partio, ene de sia strukturo, agnoskis la fakton. La sekreta raporto de la 9a de decembro 1920 pri la membraro de la komunista partio en la Balta floto, verkita de la ĉefo de la speciala fako de Ĉeka al la [centra] fako signalis interesajn datenojn. Pli ol 40% de la membroj de la Balta floto forlasis la partion pro religiaj motivoj; pro fizika kaj psika laceco «ili tediĝas»; pro malkuraĝiĝo pri plibona estonteco; la lasta grupo eĉ ŝiris la membro-karton de la partio.



© Getty / Keystone-France

Maristoj en Kronŝtadto en marto 1921



<https://www.wikiwand.com/fr/>

«Morton al burĝoj» Maristoj sur la kirasŝipo Petropavlovsk

La voĉo de la laborista klaso aperas dank' al la leninista historiisto Sergej Semanov citante la kazon de la uzino Lessner en Petrogrado. La 14-an de februaro 1921 iu laboristo subtere petis la jenon:

- «1) rebaloto de ĉiuj Soveto de Laboro kaj Defendoj per sekreta voĉdono;
- 2) unuiĝo de ĉiuj socialistaj partioj;
- 3) reestablo de libereco de komerco;
- 4) reveno al privata proprietaĵo kaj al grandaj proprietaĵoj;
- 5) libereco de laboro;
- 6) libereco de moviĝo;
- 7) forigo de la [policaj-ĉekistaj] kontrolaj taĉmentoj.»

Evidente la Kronŝtadtaj maristoj scias ĉiujn detalojn de la proleta misvivo kaj de la strikondo en Petrogrado inter decembro 1920 kaj februaro 1921. Anticipante la eblecon de publika protesto en Kronŝtadto, fama revolucia simbolo kaj lumturo ekde februaro 1917, la prezidanto de la Plenuma Centra Komitato de Tut-Rusio Miĥail Kalinin, akompanita de la komisaro de la Balta floto Nikolaj Kuzmin, provis mildigi la kritikaron de la Kronŝtadtaj maristoj en la lastaj tagoj de februaro 1921.

La 1-an de marto 1921 okazis ĝenerala asembleo sur granda placo en la Kronŝtadta

fortreso. Partoprenis proksimume 16.000 maristoj, soldatoj (de artilerio, infanterio, ktp), laboristoj de militaj uzinoj, kaj tre evidente ĉiuj membroj de la komunista partio kaj esperantistoj de la Kronŝtadta Esperantista Asocio. La partoprenintoj aŭdis la mallongan rezolucion de matrosoj kaj de ŝipanaroj (proksimume 2.000/2.200 homoj) de ambaŭ kirasŝipoj Petropavlosk kaj Sebastopol:

- «1) Kaŭze de la nunaj Soveto de Laboro kaj Defendoj, kiuj ne esprimas la volon de la laboristoj kaj de la kamparanoj, tuj starigi novan baloton per sekreta voĉdono. Balota kampanjo kaj antaŭa propagando okazos libere inter ĉiuj laboristoj kaj kamparanoj;
- 2) Libereco de opinio kaj de eldono por la laboristoj kaj la kamparanoj, la anarkiistoj kaj la maldekstraj socialistaj partioj;
- 3) Libereco starigi asembleojn kaj sindikatojn kaj kamparanajn asociojn;
- 4) Kunvoki antaŭ la 10-a de marto 1921 konferencon de senpartiaj laboristoj, ruĝarmeanoj kaj matrosoj de la urboj Petrogrado kaj Kronŝtadto, de la Petrograda provinco;
- 5) Liberigi ĉiujn politikajn malliberulojn de socialistaj partioj kaj ankaŭ ĉiujn laboristojn, kamparanojn, ruĝarmeanojn kaj matrosojn malliberigitajn pro rilatoj al la laboristaj kaj kamparanaj movadoj;

6) Elekti komisionon por ekzameni la kazojn de tiuj malliberuloj en malliberejoj kaj koncentrejoj;

7) Forigi ĉiujn politikajn sekciojn, ĉar neniu partio povas havi privilegiojn por propagandi siajn ideojn kaj ricevi financon helpon de la ŝtato por tiaj celoj. Anstataŭ tiuj sekcioj, neceso starigi lokajn komisionojn pri edukado kaj kulturo, pro tio nepras ricevi rimedojn de la ŝtato;

8) Tuj forigi ĉiujn vojaĝ-kontrolojn;

9) Egaligi nutroporciojn por ĉiuj laboristoj, escepte de tiuj, kiuj estas en danĝeraj laborlokoj;

10) Forigi la komunistajn militistajn taĉmentojn el ĉiuj korpusoj, kaj forigi ankaŭ plurajn komunistajn deĵorojn en la metiejoj kaj fabrikoj; se necesas, ĉi tiujn taĉmentojn kaj deĵorojn oni povas nomumi en la armeo kaj en metiejoj kaj fabrikoj sub gardo de la laboristoj;

11) Plene rajtigi la kamparanojn zorgi pri siaj grundoj kiel ili deziras, kaj ankaŭ posedi brutojn, pri kiuj ili devas zorgi, kaj labori per siaj propraj fortoj, sen dungi laboriston;

12) Ni petas, ke ĉiuj korpusoj kaj niaj kamaradoj trejnantaj por iĝi oficiroj akceptu nian rezolucion;

13) Ni deziras, ke ĉiuj rezolucioj estu larĝe disvastigitaj per la gazetaro;

14) Nomi buroon pri vojaĝ-kontrolo;

15) Rajtigi la liberan metiistan produktadon sen dungitaj laboristoj.»

La rezolucio estis adoptita unuanime de la asembleo, sen opono, nek de la Kronŝtadtaj komunistoj, nek de la Kronŝtadtaj esperantistoj. Tamen estis du sindetenoj, la leninistaj hierarkio-membroj Kalinin kaj Kuzmin. Notinde estas, ke ambaŭ, evidente oponantoj, timis malkaŝe defendi sian partion. Kaj ankaŭ sendube Vasiliev, prezidanto de la Kronŝtadta Soveto de Laboro kaj Defendo, sed li ne aperis.

La protokolon faris Petriĉenko, prezidanto de la asembleo kaj Perepelkin, sekretario.

Mi rimarkas tri trajtojn en la rezolucio. Unue, en la punktoj 1-6 la vorto libereco aperas sesfoje. Due, spite al la leninista Ĉeka kaj ĝiaj dekoj da miloj de arbitraj malliberigoj kaj pafekzekutadoj, ne ĉeestas en la Kronŝtadta marista rezolucio alvokoj al la venĝo, al la puno de la leninistaj murdistoj. Trie, ekzistas tre klara deziro lanĉi publikajn debatojn kaj certe, malrekte, starigi dialogon kun la komunistaj partioj pri novaj etapoj de la sovetia revolucio.



<https://mvdmedia.ru>

Manifestacio en Kronŝtadto en 1921

La 2-an de marto ŝprucis du tekstoj, kiuj firmigis strangan dialogon.

«Alvoko de la Provizora Revolucia Komitato al la kamparanoj, laboristoj kaj ruĝarmeanoj.

Kamaradoj kaj civitanoj!

En Kronŝtadto la 2-an de marto 1921, baziĝante sur la volo de la grandkvantaj amasoj de maristoj kaj ruĝarmeanoj, la aŭtoritato de la urbo kaj de la fortreso en manoj de la komunistoj transdoniĝis sen unu pafo al la Provizora Revolucia Komitato. La grandkvantaj laboristaj amasoj donis al si la taskon, per ĉiuj amikaj streboj, restarigi respublikon el tiu ruina situacio, kiun ne povis venki la komunista partio. En la urbo ekzistas ekzemplodona ordo. La soveta organizo daŭre funkcias. Balotado pri Soveto de Laboro kaj Defendo okazos per sekreta voĉdono. La Provizora Revolucia Komitato havas sian sidejon en la kirasŝipo Petropavlosk.

Kamaradoj kaj civitanoj!, ni alvokas vin sekvi nian ekzemplon per unuiĝo de la fortoj.

Ni scias, ke la Petrogradaj laboristoj estas elĉerpitaj pro malsato kaj frosto. Restarigi la landon el fiasko nur vi povos, kune kun maristoj kaj ruĝarmeanoj. La komunista partio estis surda al viaj ĝustaj postuloj venintaj el la profundeco de viaj animoj.

La Provizora Revolucia Komitato konvinkita estas, ke vi kamaradoj, vi laboristoj, kamparanoj, maristoj kaj ruĝarmeanoj, apogas Kronŝtadton.

Laboristoj, kamparanoj, maristoj kaj ruĝarmeanoj!, konstruu inter vi kontinuan kaj malrompeblan rilaton. Elektu inter viaj vicoj verajn kaj sindonemajn delegitojn; donu al ili prokurojn por tuja efektivigo de la laboristaj petoj.

Ne kredu la absurdajn onidirojn, laŭ kiuj en Kronŝtadto la aŭtoritatoj estus en manoj de generaloj kaj blankuloj [= kontraŭrevoluciistoj]. Tio estas malprava. La aŭtoritatoj plenumas nur la volon de la tuta laborista popolo.

Rapide rilatu kun Kronŝtadto. En Kronŝtadto ĉiuj servoj interrilatiĝas kun la Provizora Revolucia Komitato.

Kamaradoj, laboristoj, maristoj kaj ruĝarmeanoj!, via destino estas en viaj manoj. Jen la esperita tempo restarigi la landon el la kreita katastrofo kaj realigi, post tiom da viktimoj, la konkeron de la rajtoj por la libera vivo.

Vi kamaradoj, delonge jam atendis novan vivon, atendante malespere. La komunista partio ne donis ĝin al vi. Tiel nur vi konstruu ĝin.

La Provizora Revolucia Komitato de la urbo Kronŝtadto petas al vi kamaradoj, laboristoj, ruĝarmeanoj kaj maristoj, doni al ĝi vian apogon.

Prezidanto de la provizora revolucia komitato: Petriĉenko.

Sekretario: Tukiŝ.

Sur la kirasŝipo Petropavlovsk post la sturmo



La Provizora Revolucia Komitato do sekvis la rezolucion la 1-an de marto.

«Alvoko de la Soveto de Laboro kaj Defendo de Laboro kaj Defendo: nova komplota ribelo de la eksgeneralo Kozlovski (1) kaj de la ŝipo Petropavlosk.

Jam la 13-an de februaro en la pariza gazeto [Le] Matin [Mateno] aperis telegramo el Helsingfors [Finlando] de la 11-a de februaro pri supozita ribelo de maristoj en Kronŝtadto kontraŭ la sovetaj aŭtoritatoj. La franca kontraŭspionado nur antaŭvidis ion pri la eventoj (2). Kelkajn tagojn post la anoncita dato, fakte okazis la eventoj, atenditaj kaj, certe, preparitaj de la franca kontraŭspionado. En Kronŝtadto kaj en Petrogrado aperis flugfolioj de la blankgvardioj [= kontraŭrevoluciistoj]. Dum arestoj [de malamikoj] estis malliberigitaj konataj spionoj. Samtempe dekstraj revoluciaj socialistoj vigle ekpropagandis inter laboristoj profitante la malfacilan situacion de la malfacila provizo de manĝaĵoj kaj de fuelo [por hejtilo]. La 28-an de februaro komenciĝis tumulto en la ŝipo Petropavlosk. Estis aprobitaj taĉmentoj de la Nigra Centopo [antisemita kaj kontraŭrevolucia grupo] kaj revolucisocialista rezolucio. La 1-an de marto daŭris la tumulto sur la ŝipo Petropavlosk. En ĝenerala kunsido denove estis aprobita tiu-ĉi rezolucio. La 2-an de marto malkaŝe ekrolis la eksgeneralo Kozlovski (ĉefo de artilerio) (3). La eksgeneralo Kozlovski stimulantante oficirojn, kies familinomoj ankoraŭ ne estas sciataj, malkaŝe elektis la rolojn de ribelantoj. Sub la gvidado de la eksgeneralo Kozlovski, ili arestis la komisaron de la Balta floto, la kamaradon Kuzmin, prezidanton de la Kronŝtadta Soveto de Laboro kaj Defendo, la kamaradon Vasilev, kaj multajn aliajn responsulojn. Tiel la senco de la eventoj tute klariĝis. Malantaŭ la revoluciaj socialistoj ĉi-foje staras la eksgeneralo Kozlovski.

Konsiderante ĉiujn eventojn, la Soveto de Laboro kaj Defendo de Laboro kaj Defendo dekretas:

- 1) La eksgeneralo Kozlovski kaj liaj sekvantoj fariĝas eksterleĝuloj.
- 2) La Petrogada urbo kaj la Petrogada provinco estas en sieĝstato.
- 3) La tuta aŭtoritato en la Petrograda fortigita distrikto transdoniĝas al la Petrograda defenda komitato.

Subskriboj de

La Prezidanto de la Soveto de Laboro kaj Defendo de laboro kaj defendo: Lenino

La Prezidanto de la Revolucia Milita Soveto de Laboro kaj Defendo de la Respubliko: Trocki.

Kremlo, Moskvo, la 2-an de marto 1921»

Ambaŭ Prezidantoj ne nur rifuzis dialogon sed timegis citi kelkajn vortojn de la marista rezolucio por pravigi, ke ĝi estis antisemita, kontraŭrevolucia. Lenino kaj Trocki uzis tri mensogojn senhonte.

1) la generalo Kozlovski Aleksandr Nikolaeviĉ (1861-1940) estis artileri-oficiro en la cara armeo en 1902, poste nomumita generalo de artilerio dum la Unua mondmilito 1914-1916. En 1918 kune kun aliaj 70.000 ekscaristaj oficiroj li estis akceptita en la ruĝarmeo kiel responsulo de la artilerio sur la fronto de Smolensk. Estante en la 8a armeo li estis nomumita komandanto. Fine de 1920, Kozlovski estis sendita al la fortreso de Kronŝtadto por esti tie ĉefo de la artilerio laŭ ordono de la leninistoj.

2) Ĉi tiu falsa novaĵo, laŭ mia interpreto, ŝajne celis substreki la blankan influon en Kronŝtadto sed ĝi ne ekzistis kaj ne aperis. Kiu profitis plene kaj sukcese de la novaĵo? Evidente la regado de Lenino kaj Trocki dank' al la spiona reto de fremdaj

komunistaj kaj efikaj ĉekistoj por ŝakri pretekston por la subpremo de tiu ebla ribelo en Kronŝtadto!

3) Kiu nomumis Kozlovski tie? Naive Lenino kaj Trocki pensis, ke ilia stulta kalumnio povus trompi la plimulton de la proletaro.

Tiel, vespere la 2-an de marto, Lenino-Trocki elektis dialogi per milit-subpremo. Ne estis nur por fuĝi siajn erarojn. Normala estis la respondo de Lenino, ĉar jam en aprilo 1918 li trudis al la proletaro de la grandega rusa lando ne la obeemon, kiu kutime spegulas la racion, sed la absolutan submetiĝon *беспрекословное повиновение*, kiu ĉiam estas la blinda, obskurantisma servuteco sub la volo de iu supera ĉefo, konvinkita de sia praveco kaj siaj scioj. Lenino ŝatis esprimi tiun submetiĝon per substrekoj, ekzemple «*postulas la absolutan submetiĝon de la amasoj al la unika volo de la estraro de la labora proceso*»; «*la absoluta submetiĝo al la volo de la sovetia estro, de la diktatoro, dum la laboro*».

(Ndlr: La vortoj *vol* kaj *dum* estas substrekitaj de Lenino mem en sia originalo.)

Tri citaĵoj de Lenin dum la 10a kongreso de la Komunista Partio de Tut-Rusio klarigas la Kronŝtadtan subpremon

«Oni dediĉis tro da tempo al diskutoj kaj mi devas diri nun «diskuti per mitraletoj» [sendube aludante al la sturmoj kontraŭ la Kronŝtadtanoj] estas multe pli bone ol per la tezoj proponitaj de la «[laborista] Opozicio.» [...] Ni ne bezonas opozicion! Kaj mi opinias, ke la partia kongreso devas eltiri tiun konkludon; la konkludon ke nun estas la fino de la opozicioj, fina punkto, nun ni ne bezonas opoziciojn! (aplaŭdoj) [...]»

« La Kronŝtadta sperto pruvis tion [retroiri signifas reveni al carismo]. Ne volas ili [Kronŝtadtanoj] la blankgardistojn kaj ili ne volas niajn aŭtoritatojn, sed ne ekzistas aliaj aŭtoritatoj. [...] »

«Okazis tie [en Kronŝtadto], kontraŭrevolucio spontana etburĝa, demokratia, per sloganoj de libera komerco kaj direktita ĉiam kontraŭ la bolŝevisma diktaturo. Kaj tiu etoso aperis ofte ene de la proletaro. Aperis en entreprenoj en Moskvo kaj en multe da aliaj provincaj lokoj. Tiu etburĝa kontraŭrevolucio estas sendube pli danĝera ol [blankaj ĉefoj] Denikin, Judeniĉ kaj Vrangel. [...]»

La sintezon de la idearo de Lenino pri Kronŝtadto mi vidis tra kelkaj vortoj de li: «spontana etburĝa, demokratia [movado ...] ne ekzistas alia aŭtoritato [...] diskuti per mitraletoj». Ĉiuj argumentoj estas tute pravigitaj fare de la marksista aserto, ke la centra komitato de la komunista partio

posedas la veron kaj ke ĝi trudas ĝin al la popolo (nekapabla kompreni).

Tiel, la tragikaj decidoj de Lenino por solvi la eventojn en Kronŝtadto utilis kiel ekzemploj por pravigi buĉadojn kontraŭ laboristoj en Berlino en 1953, en Hungario en 1956, en Sovetio (Novoĉerkask en 1962),

ktp.. Lenino starigis iun specon de mensa paralizo inter siaj sekvantoj, kies rezulto estis kvazaŭ blindeco kaj surdeco, por kompreni la rilatojn inter la socio kaj la

socialismo. Feliĉe, kaŭze de la marksista leninista lavango de putro kaj korupto ĝis 1991, kolapsis Sovetio ĝis hodiaŭ. Tiel eble, la leninistoj povas pripensi sian idealon.

3 - La Kronŝtadta esperantistaro kaj la Kronŝtadta ribelo

Espertista Laboristo eldonis en la somero 1921 artikolon «Letero el Kronŝtadto» skribitan la 5-an de aprilo 1921.

La aŭtoro N. Karatajev estis persone en Kronŝtadto, kio signifas, ke li estis ideala persono por nin informi pri la loka situacio.

«Kara kamarado,

Kia granda ĝojo estas ricevi leteron el kapitalisma blanka [kontraŭrevolucia] Francio! Mi kore dankas vin. Mi jam sendis por vi kvin leterojn, sed ankaŭ sciis pri ĉiuj bariloj kaj eĉ ne atendis ricevi de vi respondon kaj nun dank' al helpo de X., ni verŝajne starigos ĉiaman interrilaton kun vi. Vian bonegan gazeton ni ankaŭ ricevis.

Vi demandas min, kial rusaj esperantistaj komunistoj ne klopodas ĉe la registaro, por ke ĝi eldonu propagandilojn en Esperanto. Sed kamarado, ne forgesu, ke ni ne havas paperon, eĉ ne por niaj ĉiutagaj gazetoj. Plej ofte niaj petrogradaj kaj provincaj gazetoj estas nur dupaĝaj. Ni ne havas paperon por ĵurnalo Komunista Internacio. Sed tamen esperantistoj ricevas paperon, sed tiu ĉi papero estas necesa por simplaj lernolibroj. Ekzemple, du monatojn antaŭe Moskva Instituto de Esperanto ricevis paperon por 30.000 ekzempleroj de Kar & Panje: Esperanto en dek lecionoj. Aŭtoroj estas francaj. Sizranska Soveto de Laboro kaj Defendo helpas al la edono de Ekzercaro de Zamenhof. Nu, kamarado, ĉu ni komunistoj havas rajton petegi paperon? Tute ne! Nun ĉio estas farita, por ke ĉiu societo havu lernolibrojn, sed aliajn eldonojn ni devas atendi, ĝis kiam Sovjetrusio havos pli multe da papero.

Ĉu la burĝa esperantistaro ne bojkotis nian registaron? Bojkotis kaj ne bojkotas! Kaj eĉ ili bojkotas esperantistajn komunistojn. Ekzemplon! Tre «eminenta» rusa esperantisto Nedoŝivin, en kunsido de Odesa societo postulis forpelon el «sia-rondo» de ĉiuj odesaj esperantistaj komunistoj, kaj kiam Ruĝa Armeo estis en Odeso, «multestimata» Nedoŝivin forkuris kun siaj blankaj kolegoj. Eble li loĝas nun en Parizo. Eĉ nun ekzistas multaj malnovaj esperantistoj, kiuj ne laboras por Esperanto per Sovetaj institucioj. Eĉ, kredeble, kelkaj forgesis pri sia «sankta ideo», ĉar multaj lokaj fakoj de popolklerigado ne povas ricevi instruanton de Esperanto. En Ruslando ni havas bonegan kampon por nia laboro, sed granda parto de rusa esperantistaro tute ne laboras kaj ne deziras labori (1).

(1) Estas notinde, ke ĉiu gvidanto de Esperanto ricevas por tio salajron. Jam estas kelkaj esperantistoj, kiuj havas nur poresperantan laboron kaj neniam alian oficon. Ekzemple, K.do V. N. Devjatin.

En junio (anstataŭ majo) en Petrogrado okazos konferenco Tutruslanda. Mi esperas, ke ĝi multe helpas al utiligo de ĉiu esperantisto por Esperanto. Nun en Rusio preskaŭ nur unu malnova esperantisto, nia K.do V. N. Devjatin, laboras tre volonte kun Soveto de Laboro kaj Defendoj. Li, kredeble, bone komprenas, ke «esperanto, internacia lingvo» povas esti nur per proletariato.»

5 de aprilo 1921. N. Karatajev

Evidente N. Karatajev tute prisilentis iun ajn ribelon en la Kronŝtadta fortreso pro du motivoj. La vera revolucia franca laboristo ne povas helpi la kapitalisman propagandon kontraŭ Sovetio, do, kritiki Sovetion signifas sapei, malpurigi la revolucion de la proletaro. La silento de Karatajev montras lian lojalecon por la partio.

Bedaŭrinde, se la dokumento estis politike tre elokventa kaj la informo pri Sovetio estis tre interesa, la asertoj de Karatajev pri la papero estis eraraj rilate Kronŝtadton.

Fakte ekzistis en Kronŝtadto la gazeto *Esperantista Movado*, kiu en sia lasta numero en marto 1921 (kun 16 paĝoj, sed en februaro kun 24 paĝoj) eldoniĝis esperante kaj samtempe ruse. En la rusa lingvo ni legas:

«*Dum unu jaro. La 25-an de marto de tiu jaro, la Kronŝtadta Esperantista Asocio plenumas sian unuan jaron ekde la kreado. Dum tiu tempo la Asocio eldonis 5.000 lernolibrojn, 10.000 broŝurojn kun gramatiko kaj vortaro, 13.000 ekzemplerojn de sia revuo Esperantista Movado kaj 2.000 poŝtkartojn.*»

Tio estis la fino de la revuo *Esperantista Movado*, jam anoncita en februaro 1921 pro nova organizado de ESKI (Esperanta Komunista Internacio).

Cetere, la lasta ekzemplaro donis du opiniojn ruse:

«*Averto. Ĝis la tuta re-establo de la sovetaj kaj politikaj taskoj, la Kronŝtadta Esperantista Asocio haltigas sian agadon. Tial provizore haltas la eldono de la revuo Esperantista Movado.*»

La anonco de agadoj por festi la datrevenon

de la jaro de esperantismo en Kronŝtadto finiĝis akre: «*La blankgardia ribelo detruos niajn planojn.*»

Ambaŭaj frazoj montras du kontraŭdirojn. La unua aludas al la «provizora» halto de la revuo, kiu devis ĉesi ĉiel, tio signifis la volon ankoraŭ labori. La dua celas la re-establon de la sovetaj kaj politikaj aferoj, sed mi ne trovis spurojn de Esperanto en Kronŝtadto post la leninista subpremo de la marista ribelo. Malfeliĉa fino post unu jaro kun splenda laboro por Esperanto!

Finaj rimarkoj

La temo de Kronŝtadto estis tabuo ene de SAT por ne rompi la malfortan unuiĝon inter leninistoj kaj neleninistoj. Do Kronŝtadto spegulas la historion de SAT, la maleblecon analizi ĉi tiun eventon, kiu klarigas, laŭ mi, la fiaskon de Lenino kaj de Sovetio trudi bonecon kaj feliĉon al la laboristaro per submetiĝo, sen la rekta kunlaboro de la proletaro.

Tamen, la sama sistemo funkcias kaj funkcios kun hundoj, kaj ankoraŭ pli bone en kaĝo; la socia ekspluatado konstruis kaj daŭre konstruas por la homaro obskurantismajn kaĝojn. Ĉu la marksismo, leninismo kaj la historio de Sovetio estas malsamaj? Ĉu la satanoj povas pripensi tiun temon?

Majo 2021.



<https://mvdmedia.ru>

Maristoj el Kronŝtadto en februaro 1921

OMAĜE AL PJOTR KROPOTKIN



Foto el <http://www.anarkiismo.net/article/32265>

de Miguel
Fernández

Eblas tiel resumi la moralon, kiu evidentiĝas el la observado de la tuto de la animala regno (...): «faru al ceteruloj, kion vi ŝatus, ke ili faru al vi en la samaj cirkonstancoj.» Kaj ĝi aldonas: «Bone rimarku, ke tio estas nur konsilo». Sed tiu konsilo estas frukto de longa spertado de la vivo de la animaloj en societo. Kaj ĉe la giganta amaso de la animaloj vivantaj en societoj, i.a. la homo, agi laŭ tiu principo iĝis kutimo.

— P.K. (1842-1921) —

Jam de la naskiĝo de SATeH, SAT en Hispanio, en 2002, liberecanaj SATeH-anoj komencis kultivi rilatojn kun klasikaj kaj nuntempaj grupoj de la hispana liberecana movado. Poste ni ampleksigis tiajn rilatojn al la najbara lando Portugalio. Citerene la unua kunlaboro okazis en 2019, kadre de la centjariĝo de la prestiĝa portugala anarkiisma ĵurnalo *A Batalha* [La Batalo], kiu, sub elstare grandlitera titolo, sur du el la centraj paĝoj de la jubilea numero, aperigis portugallingve mian artikolon *Anarquismo e Esperanto na Península Ibérica* [Anarkiismo kaj Esperanto en la Iberia Duoninsulo]. Nu, en la nuna jaro, 2021, en kiu la liberecana mondo, krom festi la 150-jaran jubileon de la Pariza Komunumo, priomaĝas la patron de la anarki-komunismo, Pjotr Kropotkin, en la centjariĝo de lia morto, alia portugala publikaĵo, *A Ideia* [La Ideo], revuo pri liberecana kulturo, petis min recenzi tiukadre la libron *El otoño de Kropotkin* [La Kropotkin-aŭtuno], de la hispana liberecana historiisto, poeto kaj eldonisto Jordi Maíz.

Kompreneble, mi akceptis plej volonte. Maíz estas bona amiko mia kaj de ne malmultaj SATeH-anoj. Mi havis la honoron prezenti lin al la SAT-kamaradaro, kune kun kvin el liaj poemoj, en mia traduko, en la numero 7-8 (1309-1310) Julio-Aŭgusto 2014 de *Sennaciulo*. Kiel eldonisto, en 2016, Maíz aperigis la antologion de engaĝiĝinta poezio *Nova mondo en niaj koroj*, kun poemoj de 20 hispanaj poetoj, en mia traduko, plus 8 poemoj, originale verkitaj en Esperanto, de 3 E-poetoj (respektive, Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, t.e. mi mem). Tiun libron Maíz igis represi en 2019, okaze de la barcelona 92a SAT-Kongreso. Per ĝi, la majorka eldonejo Calumnia Edicions, ĉe kiu Maíz rolas motore, inaŭguris esperantan sektion, la kolekton *Revo lucida*, en kies kadro ĝis nun aperis, krom la menciita verko, jenaj dulingvaj: la poemaro *¡Déjate de ungüentos! / For ŝmiraĵojn!*, de Jordi Maíz, en traduko de Miguel Fernández; la eseo *El Esperanto. Una lengua para todos / Unu lingvo por ĉiuj: Esperanto*, de la karmemora kamarado Eduardo Vivancos, en esperantigo de Volga

Marcos, Guy Cavalier, Raymond Laval kaj Yves Peyraut; kaj la eseo *La Comuna de Parĭs / La Pariza Komunumo*, de Pjotr Kropotkin, en esperantigo de Jordi Alcàsser. Plie, en 2020, Calumnia Edicions publikigis mian unuan poemaron en la hispana lingvo, *Semilla de Arbol* [Semo de matenujo], antologion, en mia hispanigo, de ĉiuj miaj ĝis nun publikigitaj poemaroj kaj disaj poemoj. Krome, en preskaŭ ĉiuj ĝis nun aperintaj numeroj de *Humanitat Nova* [Nova humaneco], dulingva (kastilia-kataluna) revuo pri liberecanaj kulturoj eldonata de Calumnia, legeblas jen poemoj, jen informoj, jen artikoloj de aŭ pri esperantistoj, Esperanto, esperantaĵoj...

Mia plezuro recenzi la libron de Jordi Maíz pri Kropotkin venas, krom el lia dankindeco pro ĉio ĉi-supre menciita, ĉefe, el mia admiro al lia eminenta laboro kiel historiisto kaj al plej admirata figuro de la scienca kaj humanisma anarkiismo, Pjotr Kropotkin. Jen do, kun nur kelkaj ŝanĝoj, mia esperantigo de la recenzo pri *El otoño de Kropotkin*, kiun mi faris por la portugala revuo pri liberecana kulturo *A Ideia*:

Ni troviĝas en la "Kropotkin-jaro". La rusa anarkiisma pensulo kaj sciencisto (matematikisto laŭ sia edukado kaj geografo laŭ sia profesio) Pjotr Aleksejeviĉ Kropotkin forpasis la 8an de februaro 1921 en Dmitrov, rusa urbo je 65 km norde de Moskvo. Diversaj aranĝoj, renkontiĝoj kaj publikaĵoj estis antaŭviditaj por honoro la memoron pri li. Inter ili, internacia anarkiisma renkontiĝo en Italio, aperigo de poem-kolekto fare de plej diversaj poetoj kiel omaĝo al la patro de la liberecana komunismo... Kaj, se, kiel de longe antaŭplanite, la ĉi-jara SAT-kongreso povintus havi lokon en Moskvo, mi ne dubas, ke la OKK ne fordormintus la okazon surloke priomaĝi laŭmerite la tutmonde respektatan honorindan figuron de ĉi rusa anarkiisma revoluciulo. Sed ni troviĝas ankaŭ, ve!, en la dua jaro de la pandemio pro SARS-CoV-2, kiu ĉion ĉi malebligis kaj kaŭzas plue tiom da morto kaj tiom da doloro.

Kelkaj el tiuj projektoj, tamen, jam nun vidadas la lumon aŭ tuj vidos ĝin. Kadre de la Iberia Anarkiisma Federacio IAF (en Iberio, FAI), la madrida eldonejo Ediciones Antorcha havas jam preparita por presado la 470-paĝan libron *Ensayos anarquistas* [Anarkiismaj eseoj], enhavanta ĉiujn broŝurojn verkitajn de la granda rusa anarkiisto. Plie, la bonega revuo por liberecanaj studoj *Germinal* [Ĝerminalo], kiu ĉiunumere publikigas resumojn en la hispana, en la angla kaj en Esperanto, de ĉiuj artikoloj en ĝi legeblaj, aperigos eseon pri *Kropotkin kaj la Rusa Revolucio*, probable kune kun DVD enhavanta bildojn pri la enterigo de "La granda ido de Rusio". Kaj la IAF-organo, *Tierra y libertad* [Teron kaj liberon] dediĉos la ĉi-jaran aŭgustan monografian numeron al Kropotkin. Siaflanke, la majorka liberecana eldonejo Calumnia, kiu jam en 2018 publikigis la Kropotkin'an verketon *La Ley y la Autoridad* [La

Leĝo kaj la Aŭtoritato], lanĉis alian libreton de la sama aŭtoro komplementan de la antaŭa, *Las cárceles y su influencia moral sobre los presos* [Karceroj kaj ties morala influo sur la prizonulojn].

Kun granda ĝojo, mi ricevis la novaĵon, ke ĉi-kadre la argentina eldonejo Libros de Anarres estas tuj publikigonta la duan eldonon, korektitan kaj ampleksigitan, de *El otoño de Kropotkin* [La Kropotkin-aŭtuno], de Jordi Maíz, veran donacon por ĉiuj, kiuj, samkiel mi, admiras la biografion kaj la biografon. Maíz, krome, aŭtoras belan hispanlingvan verketon pri Kropotkin kaj la muziko, kiun oni antaŭvidis aperonta en la monato marto, 2021, unue en Ĉilio kaj poste en Brazilo, en portugala traduko.

Nun mi recenzos la unuan eldonon de *El otoño de Kropotkin. Entre guerras y revoluciones (1905-1921)* [La Kropotkin-aŭtuno. Inter militoj kaj revolucioj (1905-1921)], de Jordi Maíz, kun prologo de Carlos Taibo kaj enkonduko de la historiisto-esperantisto Frank Mintz, mia SAT-kamarado kaj amiko, publikigita de Editorial, Madrid, en 2018, konsistigata de 197 teksto-paĝoj plus 38 aldonaj paĝoj kun alte interesaj kaj grandkvalitaj fotoj.

Jordi Maíz, naskiĝinta en 1977 en Andaluzio, estas poeto, doktoro pri Historio ĉe UNED, Hispana Universitato por Neĉeesta Edukado, kie li profesoras, krom ke li instruas Historion ĉe majorka gimnazio. Sur la eldona tereno, Maíz estas la fundamenta responsulo de la majorka liberecana eldonejo Calumnia Edicions. Kune kun Antorcha kaj LaMalatesta, Calumnia meritas nian aplaŭdon pro la kvanto kaj kvalito de la klasikaj kaj aktualaj verkoj de la liberecana sfero, kiujn ili metadas je la servo de ni amantoj de tiuspeca humanismo.

Kiel historiisto-pedagogo, Maíz elmetas farojn historiajn kaj biografajn kun eksterordinaraj kompetenteco, flueco kaj objektiveco. Indikante fontojn kaj referencojn. Prezertante konstatablajn donitaĵojn por ke la konkludoj estu ne la siaj sed tiuj de la legantoj de liaj priskriboj. Definitive, aplikante epistemologian konceptadon de la Historio. Tuj post lia emociplena dediĉo, sur la paĝo 7, malaperas la poeto kaj ekagas la historiisto. Kaj ĉi tiu eltiras la rusan barban batalinton el la anarkiisma "sanktularo" kaj lokas lin fronte al ties propraj kontraŭdiroj, fronte al samaj kontraŭdiroj, kiujn multaj el ni spertus en liaj cirkonstancoj. Li desuprigas la statuon el ties piedestalo, humanigas ĝin, faras, ke ni sentu kiel tiu persono, ke ni faru lin pli nia.

El otoño de Kropotkin turnas nian atenton al kvar regionoj de la vivo de la granda anarkiisma majstro. En la unua, ampleksanta kvaronon de la tuta teksto, Maíz lokas nin ĉe antaŭaj biografieroj, kiuj helpas la leganton kompreni la lastan parton de la

Kropotkin'a vivo: naskiĝo de li en Moskvo, en 1842, sine de aristokrata familio; marŝadoj en Manĉurion kaj Siberion kiel membro de la rusa armeo; sciencaj ekspedicioj al Svedio kaj Finnlando; kontaktiĝo kun la Ĵurasa Federacio kaj kun la Bakunin'istoj de la Unua Internacio; unua arestiĝo pro anarkiisma agado kaj sekva ekziliĝo en Francion kaj Svision; dua arestiĝo kaj fuĝo en Londonon, en 1876.

Nur kvadek jarojn poste, Kropotkin revenis Rusien. Dum tiu tempo, li disvolvis eksterordinaran laboron kiel granda anarkiisma teoriisto kaj intelekta aŭtoritato por la rusa ekzilitaro pere de verkoj kiel *La konkero de la pano; Kampoj, fabrikoj kaj laborejoj; Interhelpo, kiel faktoro de l' evoluo...* Aŭ kiel *La granda Franca Revolucio*, unu el la malmultaj anarkiismaj libroj respektataj kaj aprezataj eĉ de marksistoj, ofte pretaj kontraŭmeti sian "sciencan socialismon" fronte al la, laŭ multaj el ili, "etburĝa deviaciismo" prezentata de anarkiismo. Maíz, krome, priskribas la fiaskintan rusan Revolucion de 1905, kie vidis la lumon la unuaj sovetoj kaj eke de kiu eblis kultivi esperojn pri nova revolucia procezo, en kies kadro eblus reveni al Rusio.

La Unua Mondmilito (1914-1918) signas la duan atento-regionon de la Maíz'a teksto, ĉefe pro la divido, kiun la Kropotkin'a sinteno kreis en la sino de la tutmonda anarkiisma movado, kiam, kune kun i.a. Malato kaj Grave, li apogis la aliancanan blokon fronte al la majoritata kontraŭmilita staro defendata de anarkiismaj eminentuloj kiel Emma Goldman, Aleksander Berkman kaj Errico Malatesta. En ĉi esenca punkto, la objektiveco de la historiisto estas pli ol aprezinda. Aliaj juĝas kaj analizas la kvanton da anarkiismo ekzistantan ĉe homoj, kiuj adoptas certan sintenon. Maíz ne juĝas, sed prezentas atestojn kaj fontojn kaj lasas nin eltiri niajn proprajn konkludojn. Kiel endas.

La anarkiisma tradicio kutime atribuis la revolucian ĝermon al Francio. Fronte al tio, en la sento de Kropotkin, staris la danĝera militema imperiismo de Germanio. Kaj tia juĝo, kiu tiutempe skandalis multajn anarkiismajn

orakolojn, dudek kvin jarojn poste estis apogita de ili mem kadre de la Dua Mondmilito kontraŭ Hitlero.

Ĝis la monato februaro, en 1917, kiam ni trovas Kropotkin'o'n preparanta sian revenon en la revolucian Rusion, lia partopreno en la anarkiisma movado "preskaŭe reduktiĝis al nevidebleco". En tiu reveno lokas Maíz la trian atento-regionon de sia teksto. Temas pri fundamenta momento. Anarkiismaj orakoloj el la jam menciita speco disvastigas la onidiron, ke tiukadre la olda ekzilita anarkiisma batalanto proksimiĝas al la grupoj malplej revoluciaj kaj plej konservativaj el la februara procezo kaj ke li pretas akcepti postenojn. Tio estis nevera. Kerenskij proponis al li la ministerion pri edukado, kaj li, laŭ aserto de la filino, Aleksandra, rifuzis per jenaj vortoj: "Ĉu vi ne scias, ke mi estas anarkiisto?". Male, Nestor Maĥno ĉiam tenis sin esperplena ĉe la reveno de Kropotkin. Same kiel i.a. la sesdek miloj da homoj, kiuj atendis lin ĉe lia alveno al Petrogrado. Plie, estiĝis la onidiro, ke en la urbo Dmitrov la olda anarkiisto vivas komfortplene. Tio estis tute nevera. Emma Goldman tion dementis priskribante la bedaŭrindan situacion, similan

al ekzilo, en kiu li, la edzino kaj la filino vivis. Kropotkin rifuzis ricevi ajnan favoran trakton.

La renkontiĝo de Kropotkin kun Lenin estas priskribita plendetale, surbaze de atesto fare de Vladimir Bonch-Bruevich, sekretario de Lenin kaj amiko de Kropotkin. Jen vere aplaŭdinda ideo de Maíz. La olda anarkiisto kondamnas ĉe la gvidanto de la Revolucio la diktatorajn metodojn uzatajn kaj defendas la federaciismajn principojn. Lenin instigas lin leteri al li siajn kritikojn pri la Revolucio, kaj tion Kropotkin faras en kelkaj okazoj, kun sia fajna revolucia sento kaj tranĉante rekte en la karnon. Aliflanke, Lenin proponas al li publikigi liajn verkojn, kion la olda anarkiisto draste rifuzas. Al la ne malmultaj sociaj aktivuloj kaj intelektuloj, kiuj vizitas lin (inter la unuaj, Ángel Pestaña, ĝenerala sekretario de la hispana anarki-sindikatisma CNT (esperante, NLK, Nacia Labor-Konfederacio), li elmetas siajn kritikojn al la bolŝevistoj, kiuj, liapercepte, donas ekzemplon pri tio, kiel ne endas fari revolucion. La jam aluditaj orakoloj plendas pri lia silento. Kropotkin plene konscias, ke publike loki sin kontraŭ la Revolucio egalas donaci atutojn al la kontraŭrevolucia tendaro por ke ĉi tiu manipulu lian figuron. La fenomenon "revolucio" li traktas



kiel scienca procezo, kies kurson individuaj agadoj ne kapablas ŝanĝi.

La kvara atento-regiono en la teksto de Maíz situas ĉe la morto de Kropotkin, la 8an de februaro 1921, kiam li aĝis 78 jarojn, kaj en lia amasa enterigo. Lenin proponas al la familio ne nur preni sur sin la aranĝon de la funebra ceremoniaro, sed ankaŭ starigi maŭzoleon al la mortinto. La familio rifuzas la proponon. La kadavro de Kropotkin estas translokita de Dmitrov al Moskvo kaj portita al la Salono de la Kolumnoj en la Labor-Palaco, kie ĝi restas tri tagojn. La funebra komisiono postulas de la bolŝevismaj aŭtoritatoj liberigon de anarkiismaj prizonuloj por partopreno en la enterigo. Fine, sep el tiuj estas elkarcerigitaj sub promeso pri reveno. Maíz rakontas, ke ili ĉiuj ja revenis kaj ke el ili kelkaj estis ekzekutitaj de Ĉeka, la bolŝevista polico, kaj la ceteraj jen malaperis, jen estis poste murditaj de la stalinisma reĝimo.

Por multaj homoj, la enterigo de Pjotr Kropotkin konstituas la lastan grandan manifestacion de la anarkiismo en Rusio, funebran ceremonion, kiu, metafore, atestis pri ĝia propra morto.

La restaĵoj de la granda sciencisto de (kaj pri) la anarkiismo kaj patro de la liberecana komunismo ripozas en la moskva tombejo Novodeviĉje. Ĝis tie mi vojaĝintus en ĉi "Kropotkin-jaro" por deklami ĉe la tombo de tiu eminente bona homo, "la avo de la anarkiismo", mian poemon de admiro al li, al lia honesteco kaj al lia verkaro. Poemon kun jenaj finaj versoj:

*Nun utopio
kaj morgaŭ luma fakto:
la anarkio.*

Sanon kaj poezion!
Sanon kaj anarkion!

Kropotkin, cent jarojn poste

Kontribuo de Kani al Vikipedio

En ĵusa esearo publikigita hispanlingve okaze de la centjariĝo de Kropotkin, nome "Kropotkin, cien años después"^[1], oni inkludas diversajn studojn pri la verkaro kaj figuro de la rusa anarkiisto. Menciindas, ke almenaŭ la kunordiganto Jordi Maíz kaj unu el la kontribuantoj, Frank Mintz, estas esperantistoj; tiu laste menciita prelegis ekzemple dum la SAT-kongreso en Barcelono. En tiu ĉi artikolo ni resumu la enhavon de la eseoj; eble iam oni povos traduki esperanten kelkajn el tiuj kaj publikigu ilin per diversaj medioj. En Vikipedio vi povos trovi similan materialan resumon kaj veturi al ligitaj tieaj artikoloj. Ni deziru, ke tio helpas al konstrua debato kaj omaĝo al la figuro de la rusa praulo.

En la unua, nome "Piotr Kropotkin y el darwinismo en construcción", Álvaro Girón komentas la enhavon de "Interhelpo" en la kunteksto de la ideologiaj polemikoj sekve al la disvastigo de la idearo de Darwin. La ĉeftendencaj fakuloj insistas en la konsidero, ke kontraŭ supozita "individua lukto por la vivo" defendita de Darwin, Kropotkin argumentas por "solidareca grupa lukto por la vivo"; male Girón montras kiel fakte Kropotkin nek tiom multe apartiĝas el Darwin nek estas izola figuro en la kunteksto de la tiama fakularo. En la

diversaj komentistoj de la darvinismaj teorioj, Kropotkin sekvas la pionirajn teoriojn de Lamarck kaj nur nuancigas la kontribuon de Darwin, miskomprenitaj de postaj komentistoj, kiuj siavice fakte aludas al troigoj de novdarvinistoj.

En la dua kontribuo, "Las ideas de Kropotkin en España. Su evolución", Francisco Madrid Santos enkuntekstigas la fortan kaj favoran akcepton de la idearo de Kropotkin en Hispanio en la kunteksto de la agititaj jardekoj de la iberan praanarkiismo, nome ekde la diversaj klopodoj konstrui nacian organizon de la Internacia Laborista Asocio en la 1880-aj jaroj kun fokusoj en Katalunio, Madrido kaj Andaluzio, tra la dekadencia jardeko de la 1890-aj jaroj en kiuj nur la klopodoj de la hispana disvastiganto Fermín Salvochea povis disvastigi la kropotkinan idearon ĝis la rekupero de la unua jardeko de la 20-a jarcento.

La teamo de Grupo Redes aliras al la koncepto "interhelpo" el vidpunkto de la solidareco inter grupoj de virinoj kaj spertoj de anarkifeminismo. La kvar ĉefaj ideoj estas jenaj: 1.- la morala progreso de la homaro konstituas etendon de la principo de interhelpo: 2.- la kulpuloj de la detruo de la interhelpo estas la ŝtato kaj la urboj; 3.- la komunuma idealo supervivis diversmaniere spite tiujn kulpulojn; kaj 4.- Kropotkin indikis du ĉefajn tendencojn por la progreso kaj disvolvigo de la homaro nome la persono (individuo) kaj la interhelpo aŭ solidareco kiuj

^[1]"Kropotkin, cien años después" (Kropotkin, cent jarojn poste), Jordi Maíz (kunord.), Fundación de Estudios Libertarios Anselmo Lorenzo, Madrid, 2021. 401 pp.

ŝajnas kontraŭdiraj. Sed la solvo estas serĉi la simbiozon. La sociaj spertoj de virinoj, ekzemple en la zorgo de necesuloj, aparte analizita, montras vojojn. Teorio kaj praktiko interhelpas unu la alian.

José Luis Oyón alproksimiĝas al la ideologio de Kropotkin kaj partikulare al "La konkero de pano" en la geografia nivelo de la urbo. Li eliras el la koncepto de la malriĉo, kiel nura fonto de la riĉo. Malriĉeco devigas laboristojn akcepti malfavorajn dungojn el kio oni produktas la plusvaloron, tio estas la riĉeco de riĉuloj. Tial oni devas analizi la ekonomion, ne ekde la produktado (kion faras marksismo), sed ekde la konsumo, tio estas, la malsufiĉa konsumo fare de malriĉuloj, kiu devigas ilin produkti por riĉuloj. Necesas la integriĝo urbo-kamparo, kaj agrikulturo estu intensiva kaj ĉeurbra kaj ĉirkaŭurba, dum industrio estu discentrigita. Loĝejoj estas altvaloraj en urboj, kvankam ili apartenas al la akumulita laboro, kaj tial ili devus esti de socia posedo, kaj same la publikaj servoj.

Rodrigo Quesada Monge eliras el la centramerika historio de la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj, kun la malsukceso de la centramerika federaciigo, la eksterlanda investado kaj la aneksiemo fare de usonanoj por aliri al la ricevo de la konceptoj "povo" kaj "aŭtoritato" el Reclus kaj Kropotkin. La usona venko en la milito kontraŭ Hispanio de 1898 kaj la kreo de la United Fruit Company en 1899 markis la starton de la usona imperiismo en Centrameriko, kio kulminis en la konstruo de la Panama Kanalo kaj la kontrolon iliaflanke de la itsmo. En tiu kunteksto la kostarika Elías Jiménez Rojas (1869-1957) estis en kontakto kun Kropotkin mem kaj tiun influon sekvis la gvatemala Enrique Gómez Carrillo (1873-127), kiuj helpis la enkondukon de la anarkiismaj ideoj en la mondoregionon.

Susana Sueiro frontas la akran polemikon kiu startis en 1914 kiam Kropotkin kontraŭ la tradiciaj kontraŭmilitismo, kontraŭnaciismo kaj kontraŭimperiismo de anarkiistoj decidis apogi kaj peti apogojn al la francaj klopodoj kontraŭ la centraj imperioj, kiuj laŭ li plej subpremendis la rajtojn de la centreŭropaj popoloj, pli ol la brita, franca aŭ rusa imperioj. Plej parto de anarkiistoj, kvankam agnoskis respekton al la rusa princo, konsideris, ke li eraras tiurilate. Ankaŭ en Hispanio, plej parto kontraŭis lin, kiel Vicente García kaj Anselmo Lorenzo, kiu estis verkinta lian biografion, estis ege impresita pri la afero kaj mortis fakte en 1914 mem. Apogis la tezon de Kropotkin la gazeto "El porvenir del obrero" de Mahón kaj gravuloj kiel Ricardo Mella, Joan Montseny (Federico Urales), Teresa Mañé (Soledad Gustavo), kaj Fernando Tarrida del Mármol. Transatlantike kontraŭis Kropotkin Pedro Esteve, Juan Martínez de la Graña, Marcelo Salinas, Roberto A. Müller kaj Fernando Solano

Palacio, kiuj inter Kubo kaj Novjorko propagandis por neutraleco kaj pacismo, dum William C. Owen defendis la ideon de Kropotkin. Adrián del Valle, kiu poste verkos biografion pro Kropotkin kaj jam dekomence admiris lin, tiam tute kontraŭis la almlitan sintenon, kvankam en sia romano "Jesús en la guerra" (Jesuo en la milito) ĉefe kulpigis la germanan militismon.

Joan Zambrana Capitán analizas la eĥojn de la figuro de Kropotkin en hispana anarkiisma gazeto Tierra y Libertad en la 1910-aj jaroj en tri precizaj aferoj: kampanjo de solidareco al Kropotkin (Decembro 1912 kaj Januaro 1913), la Unua Mondmilito (skandala polemiko en kiu la gazeto aliĝis al la sinteno de Errico Malatesta, Anselmo Lorenzo kaj Eusebio C. Carbó kaj majoritato de anarkiistoj kontraŭ la sinteno de Kropotkin apogi la aliancinojn) kaj la Rusa Revolucio, kiam la dekomencaj iluzioj de anarkiistoj por la revolucio kaj reveno de Kropotkin al Rusio en 1917 post kvar dek jaroj de ekzilo forgesigis la ĝistiamajn malaprezojn de anarkiistoj kontraŭ Kropotkin pro la primilita sinteno

Rafael Cid entreprenas filozofian analizon kontrastante la altruisman idearon de "Interhelpo" de Kropotkin kun la egoismo de "Leviatano" de Thomas Hobbes. Por Hobbes la homoj donas sian aŭtonomecon al la Leviatano, la ŝtato, pere de la reprezentado. La ŝtato faras sin ĉiopova protektanto pli kaj pli aŭtoritata kaj netuŝebla. Kontraste Kropotkin prenas el Karl Fjodoroviĉ Kessler la koncepton de interhelpo por kontraŭi ne la darvinismon mem, sed ties plej radikalan tendencon, nome de Thomas Henry Huxley, defendante la sociablecon, la interhelpon de la grupoj en la historio kaj en la specioj, kies valorojn la ŝtato uzurpas.

Frank Mintz analizas la moralon de Kropotkin, unue ĝenerale kun nuancoj al lia deveno de aristokrato kaj gravulo, poste dum la polemiko pro la apogo de Kropotkin al la alianca flanko, pli ĝuste al Francio kaj kontraŭ Germanio. Tio markis malkonsentojn inter anarkiistoj pri la nekohera sinteno de Kropotkin. Mintz detale sekvas lian evoluon dum lia reveno al Rusio en 1917: dekomence li kontaktis kun altaj sferoj, nome Georgi Lvov kaj Kerenskij por apogi la ŝtaton kontraŭ eblaj revolucioj, poste kun Lenin unue por apogi la novan reĝimon, sed en 1920 kaj 1921 pli kontaktinte kun la rusa realo jam plendas al la leninismaj etosoj por kontraŭi la mankon de libero.

María Migueláñez studas la disvastigon de la verkoj de Kropotkin en Latinameriko kun akso en la areo de Argentino kaj Urugvajo kun grandaj rilatoj al Hispanio (pro elmigrado kaj pro ekzilo de anarkiistoj); tiel la eldonaj klopodoj havis fortajn rilatojn inter Argentino kaj Hispanio, kun fokuso al la epokoj en kiuj estis politikaj persekutoj en unu


el la flankoj. Migueláñez detaligas la eldonojn de broŝuroj kaj libroj kun verkoj de Kropotkin. Malgrandmezure ankaŭ en Brazilo, Usono kaj aliaj areoj kun rilatoj al ne nur hispana lingvo, sed ankaŭ al portugala, angla, rusa, jida ktp.

Javier Colodrón analizas la verkon kropotkinan "Parolo de ribelulo" por aliri al trinivelaj konkludoj en la pensaro de la ruso, nome el pasinteco, el la nuntempo kaj el la estonteco (de Kropotkin mem). El pasinto (revolucia lernejo) PK analizas la fenomenon de la Pariza Komunumo kaj eltiras du konkludojn: nome la kreado de registaro estis eraro, kaj due, la terura subpremado fare de la malamiko de la revolucio montras la abismon inter laboristoj kaj laborekspulatoj, nome la klasbatalo. El la nuntempo PK ĉirkaŭ 1879 analizas la eblojn revoluciajn fidante en instigaj minoritatoj kaj nek komprenis, ke la laborista movado estas ankoraŭ en lernoperiodo nek, ke oni devas atenti pri la strukturo de politikaj oportunoj kaj pri mobilizmekanismoj. El la estonteco PK defendas la nuligon de la reprezenta registaro pere de nova sociordo kun aktiva partopreno.

Carlos Varea studas la aktualan validecon de la kropotkinaj sciencaj postulatoj kiel elprenitaj el lia verko "Etiko", nome la rilato inter la biologia evolucio kaj la homa moralo, kiu tial havus materialisman devenon: plezuro por akompano de samspecianoj, kio rezultas en interhelpo. Tia alproksimigo estis sekvi diversgrade fare de pli modernaj fakuloj, kiel Stephen Jay Gould, Ashley Montagu, George C. Williams, Robert Axelrod, Michael Tomasello kaj aliaj.

Jordi Maíz, kunordiganto de la volumo, rakontas la historion de la Muzeo Kropotkin. La rakonto startas el la tago de la morto de PK la 8an de Februaro 1921, sekvas la kreado de komitato kiu unue aranĝu la funebro, kiu okazis la 13an de Februaro, en kiu jam estis tensio inter la anarkiistoj, kiuj deziras respekti la sintenon de PK, kaj la bolŝevistoj kiuj klopodis kontroli la aferon. La funebra parado en Moskvo iĝis enorma monstro de la ankoraŭa forto de la rusa anarkiismo. Tamen post la funebro, en la komitato BOK de Moskvo kiu klopodis organizi la memoron de la PK montriĝis tensioj inter du tendencoj, nome unu pli anarkista kaj alia pli malferma al konsidero de la scienca heredo, kiu evitus problemon kun la novaj sovetaj aŭtoritatoj. Simila komitato funkciis en Petrogrado kaj ankaŭ aliaj helpaj komitatoj en aliaj urboj. Vera Figner kaj Sofia Kropotkina ĉefis en la komitato kaj la kreata muzeo, dum aliflanke elstaris gravaj anarkiistoj kaj revoluciuloj, kiel Ŝĉegolev kun sia gazeto "Biloe", la eldonejo Golos Truda, Lebedev, Atabekian, Sitin, Gajdovskij (esperantisto) kaj aliaj. La 9a de Decembro 1923 malfermiĝis la muzeo. Komence de 1924 aperis Bulteno pri la muzeo kun propono de

anarkiista verkaro. En 1925 la anarkiista parto de BOK malfortiĝis, kvankam ankoraŭ organizis agadon pri Bakunin (1926), dum la restintaj anarkiistoj estis de tendenco pli mistikisma. Post tio, estis Sofia Kropotkin kiu unue serĉis financojn por pluteni la muzeon kaj ĉar tio ne sukcesis, ŝi devis negoci la transdonon de la multaj havaĵoj donacitaj ĉefe de liberecanoj al la sovetaj aŭtoritatoj (1938), spite demarŝojn fare de ILA (1929-1930). En la 1930-aj jaroj multaj BOK-estroj kaj muzeestroj estis arestitaj, ekzilitaj kaj multaj mortis. Komence de 1939 la muzeo fermiĝis definitive.



Fermas la volumon eseo de Carlos Taibo, kiu lokigas la figuron de Kropotkin ene de anarkiista kanono, nome inter la aliaj plej gravaj anarkiistaj pensuloj, kiel Proudhon, Bakunin, Malatesta kaj Reclus (ĉiuj eŭropanoj kaj viroj) super aliaj kiel William Godwin, Max Stirner, Gustav Landauer, virinoj kiel Voltairine de Cleyre, Louise Michel kaj Emma Goldman, kaj alikontinentanoj kiel ĉinoj, japanoj, hispanamerikanoj ktp. Poste li komparas la figuron de Kropotkin kun tiu de la alia plejgravulo, nome Bakunin, elstarigante tiun aparte kiel afablulo kaj sciencisto, eĉ se ne unuaranga.

Omaĝo de Miguel Fernández



AL NEFORGESEBLAJ KAMARADOJ

La jaro 2020 forprenis multajn amatajn aŭ ŝatatajn homojn. Ĉu pro la terura KOVIM-19, ĉu alikaŭze, forpasis kolegoj, kamaradoj kaj amikoj, kiuj iel aŭ alie mejloŝtonas sur mia Esperanta vojo. La memoro pri du el ili, Antonio Marco Botella kaj Manuel López Hernández (karesnome Manolo López), instigas min skribi ĉi vortojn. Sed mi volas koncernigi ankaŭ aliajn neforgeseblajn kamaradojn proksimajn al ili pri ĉi modesta sed entuziasmoplena omaĝo kuntekste de Sennacieca Revuo, la ĉiujara eldonajo de ilia amata SAT.

Ĉar kaj Antonio kaj Manolo, kvankam malsam-generaciaj, estis fruktoj de la sama arbo: la brava E-grupo de Callosa de Segura (Valencia Regiono). Ĉi grupon fondis la progresema Francisco Zaragoza Ruiz en 1932 tuj post sia esperantistiĝo. En 1934, en Valencio, okazis la unua SAT-kongreso en Hispanio (la 14a en la SAT-historio). Ĝia sukceso kreis etoson favoran al la laborista esperantismo. Ne strange, ke, tiukadre, en la lastaj jaroj de tiu jardeko aliĝis al tiu grupo junuloj tiel entuziasmaj al la esperantismo kiel al la peresperanta sukcesigo de la klasaj



celoj de la laboristaro. La al mi plej konataj jenas: José María Bernabeu, Manuel López Serna (la patro de la menciita Manuel López Hernández, naskiĝinta en 1956) kaj Antonio Marco Botella. Ili ĉiuj fariĝis fervoraj SAT-anoj.

La hispana enlanda milito ĉesigis por multaj jaroj la fruktodonan laboron de tiu grupo, sed “l’ espero, l’ obstino kaj la pacienco” de ĝiaj membroj tute ne ŝrumpis. La 18an de julio 1936, aro da militistoj, inter ili Francisco Franco, kiuj en 1931 ĵuris fidelecon al la Respubliko, puĉis kontraŭ ĝin. Tiele komenciĝis la fame konata hispana enlanda milito, el kiu sekvis pli ol 500 000 (por kelkaj, unu miliono da) mortintoj, duonmiliono da ekzilitoj kaj dekoj da miloj da malaperintoj. Pli ol 100 000 el ĉi lastaj homoj kuŝas ankoraŭ en komunaj fosajoj kaj vojflankoj, kio faras Hispanion – kia honto por la nuntempa hispana demokratio! – la dua lando en la mondo, post Kamboĝo, kun pli da malaperintoj. Kiel sciante, la hispana enlanda milito signis la komencon de naci-katolikisme faŝisma diktaturo, kiu daŭris 40 jarojn kaj elradikigis ajnon kun aromo je libero, progresemo, depostulo de socia justo ktp.

Reage kontraŭ la puĉon, klaskonsciaj laboristoj proklamis la liberecanan revolucion, kadre de kiu oni kolektivigis terojn kaj fabrikojn en diversaj partoj de la lando, tre aparte en Katalunio kaj Aragono. Kaj, por la unua fojo en la Historio, la idearo de Bakunin vidigis sukcese praktikata de 1936 ĝis 1939. La burĝaj demokratioj agis malnoble kaj hontinde. Anstataŭ apogi sian hispanan fraton, ili cinike subskribis la



hontruĝigan Traktaton pri neinterveno, malgraŭ ke ili sciis, ke, jam de la eko de la milito, la faŝismaj reĝimoj itala, germana kaj portugala aktive partoprenis apoge al Franco. Rusio sendis armilojn, tamen ne senpage, sed kontraŭ la tuta or-rezervo akumulita en la Hispana Banko. La plej belan kaj altruisman helpon havigis la t.n. Internaciaj Brigadoj, ĉirkaŭ 60 000 “liber-volontuloj”, kiuj sindone venis Hispanien el 60 fremdaj landoj por provi liberigi la hispanan popolon el la faŭko de faŝismo. Inter ili, troviĝis esperantistoj. Ĉi-lande la internaciaj brigadanoj lasis kortuŝan kaj neforgeseblan ateston pri klas-solidareco, ofte sian sangon kaj multfoje eĉ la propran vivon.

La membroj de la E-grupo de Callosa de Segura, kiel klaskonsciaj laboristoj-esperantistoj, kontraŭstaris la puĉon. Multaj el ili aliĝis al la Popola Armeo de la Respubliko kaj batalis ĉe la frontoj. Post la fino de la milito, en 1939, kelkaj el ili ekziliĝis. Francisco Zaragoza, en Belgion. Tie li aktivis ĉe E-grupoj kaj sukcesis transvivi la



duan mondmiliton dank’ al la solidareco de esperantistoj el diversaj landoj.

Antonio Marco Botella forlasis Hispanion, kune kun pli ol 3 000 milit-venkitoj, sur la brita ŝipo Stanbrook, kiu portis lin Alĝerien. Tie li suferis koncentrejojn kaj la sekvajn mistraktojn kaj malsatojn. Sed lia spirit-forto, samkiel tiu ĉe la ceteraj membroj de la E-grupo de Callosa de Segura, altis. En tiuj koncentrejoj, li iniciatis E-kursojn kaj esperantigis koncentrejanojn. La eĥo de tiuj kursoj transigis la drat-barilojn. Ĝis tioma grado, ke esperantistoj el apudaj lokoj vizitis lin kaj helpis lin. Dank’ al unu el tiuj kamaradoj, Lucien Sovage, militisto, Antonio povis eliri el la koncentrejo en kelkaj tagoj kaj ĝui la amikecon de Lucien kaj de ties familio.

En Hispanio, la situacio estis terura. La Franco’a venko en 1939 kunportis la malaperon de Esperanto ĉi-lande. Multaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis konsiderinda nombro da gravaj politikistoj kaj intelektuloj, estis murditaj de la hispana naci-katolikisme faŝisma diktaturo. La esperantisteco de tiuj viktimoj ĵetis plian ondon da antipatioj kontraŭ Esperanton, kiun, kiel sciante, Hitlero, kunlaboranto de Franco pri masakrado de hispanoj dum la hispana enlanda milito, alnomis “instrumento de juda-framasona konspiro” en sia libro Mein Kampf. El tie, probable, la esprimo “juda-framasona-marksisma” aplikata de la Franco’a reĝimo al ajnaj minimume progresemaĵoj homoj aŭ agoj.

Korespondi kun eksterlandaj “ruĝuloj”, ricevi revuojn el “ruĝulaj landoj”, kunveni por paroli en tiu “ruĝula lingvo”, probable, pri konspiraj “ruĝulaĵoj, estis aktivaĵoj alte suspektindaj kaj, tial, alte riskaj kaj danĝeraj. Hispana abonanto de la internacia revuo Heroldo de Esperanto petis ĝian redaktoron anonci, ke oni ne skribu al li Esperante, ĉar tio morte danĝeras. Ĉiuj hispanaj esperantistaj centroj kaj grupoj estis fermitaj, krom unu, Frateco, de Zaragozo, tamen ne pro preteratento, sed tial, ke en ĝia estraro sidis Franco'isma militisto, kiu, kun la aroganteco propra al tiutavolaj homoj kaj al lia statuso kiel venkinto, defiis eventualajn aŭdaculojn fermi ĝin.

En sia verko Laboristaj Kronikoj, atesto referenca, valora kaj nemalhavebla por ĉiuj interesatoj pri ĉi temo, **Antonio Marco Botella** rakontas, ke, kvankam la sidejo de Frateco restis nefermita, ĝi apenaŭ havis aktivecon. Iam bando da junaj falangistoj enrumpis en la lokalon kaj, en la tradicia faŝista maniero, la nekonatoj komencis ĵeti surplanken librojn, dokumentojn, gravajn historiajn arkivojn ktp., kiujn ili fine bruligis antaŭ la stuporplenaj rigardoj, streĉa muteco kaj prudenta nenifarado de teruritaj estraranoj, kiuj troviĝis tie. Sekvatage, la prezidanto de Frateco, profesia advokato, sendis protestonoton al la provincaj aŭtoritatoj. Tiu protesto neniam estis respondita. La aŭtoritatoj do aprobis tiun agon, se ne diri, ke ĝin ili mem organizis. Pro ĉio ĉi, estrarkunvenoj en la sidejo de Frateco apenaŭis. Sed, krome, kiam oni tie aranĝis E-kursojn, policianoj kutime vizitis la aliĝintojn en ties hejmoj, tre malfrue en la nokto, por pridemandi ilin pri ties intencoj kaj politikaj emoj, kaj por eltiri el ili ties opinion pri la Franco'isma reĝimo. Ĉiujn tiamajn hispanojn teruris tiuspecaj vizitoj, kiuj povus roli kiel antaŭaĵoj de murdoj kaj porĉiamaj malaperoj. Sekvatage la lernantoj do nepre forlasis sian E-kurson.

En sia Laboristaj Kronikoj, Marco Botella rakontis jenon: “En 1947, sub iniciato de katolikaj esperantistoj (en tiu momento progresema avangardo), post longaj senfinaj demarŝoj, oni atingis permeson de la registaro por starigi Hispanan Esperanto-Federacion (HEF), kun sidejo en Valencio.

Grandparte de veteranaj esperantistoj el diversaj hispanaj regionoj aliĝis al tiu Federacio, sed malgraŭ tiu oficialigo la afero nefacile malvolviĝis, ĉar en multaj provincoj la aŭtoritatoj ne permesis malfermon de lokaj Esperantaj societoj. Dum tiuj ankoraŭ danĝeraj jaroj, duonkaŝe funkciis kiel SAT-peranto en Hispanio k-do Manuel López Serna, kiun anstataŭis post plurjara periodo José María Bernabeu, ambaŭ de Callosa de Segura. Junaj esperantistoj de tiu ĉi urbo, J. Altamira, J. M. Bernabeu, A. Sánchez, R.

Salinas k.a. estis arestitaj ĉe Pireneoj mem, kiam ili intencis serĉi la liberon ekster niaj landlimoj. Alia esperantisto de sama urbo, A. Marco Botella, estis ankaŭ enkarcerigita en la prizono de Alicante kun pli ol duoncento da liberecanoj akuzitaj aparteni al politikaj organizoj de la rezistado kontraŭ la reĝimo. La frankismo tute ne cedis”.



Malgraŭe, spitante danĝerojn, la nebridebla **Manuel López Serna** metis sian domon je la servo de la esperantistoj kaj en ĝi kaŝe aranĝis Esperantajn kursojn kaj babil-rondojn.

Kiam mi konatiĝis kun pluraj el la membroj de tiu admirinda grupo, mi ne povis ne rigardi min altgrade premiita de mia sorto. Sed, kiam mi parolis kun ili, estis en rilatoj kun ili, ĝuis ilian bon-homecon, ilian mirindan obstinon por la libero kaj la utopio, mi, filo de paro da venkitoj en tiu milito kontraŭ faŝismo, sentis min la homo plej feliĉa en la mondo. Eĉ se nur pro tio, mia amo al Esperanto ne povus ne eterni.



En la 1990-aj jaroj, Antonio Marco Botella ne malofte venis Madriden por viziti siajn filojn. Li kaj mi kaptis tiajn okazojn por intervidiĝi, preskaŭ ĉiam en la parko nomata El Retiro. Kutime, Antonio unue aliris nepre traktendajn organizajn temojn rilatajn al nia LEA-o, al SAT kaj, ĝenerale, al la movado. Sed tuj poste li kunprenis min al sia amata ĉevaletto: beletro, poezio. Miaopinio, ĉi-terene lia pasio grande superis lian kompetentecon. Plurfoje mi diris al li, ke lia plej bona verko estas liaj travivaĵoj, kiujn parte li donacis al ni, homoj de la sekva generacio, kaj al ĉiuj per siaj

valoraj kaj nemalhaveblaj atestoj en historiaj libroj kiel la jam menciita Laboristaj Kronikoj kaj la duvoluma Analoj de la esperanta movado en Hispanujo. Temas pri verkoj, plie ol de historiisto, de homo pasiigita de belaj idealoj, kiu emocione rakontas sian veron. Temas, krom pri Historio, pri tio, kion la hispana filozofo kaj verkisto Miguel de Unamuno nomis “intrahistorio”, t.e. travivaĵoj de komunaj homoj ene de historiaj eventoj.

Kelkfoje mi sukcesis venigi lin ĉi-teren kaj aŭskulti el liaj lipoj intrahistoriaĵojn, ĉu novajn, ĉu jam de li rakontitajn en liaj verkoj. El ĉi lastaj, min aparte plezurigis jena, okazinta en la jaroj kiam esperantistoj, des pli se membroj de la laborista E-movado, estis rigardataj malamiko de la faŝisma Franco'a reĝimo: Por partopreni en SAT-kongresoj, kelkaj hispanaj SAT-anoj uzis preskaŭ komikan ruzadon, al kiu la ridinde bigota hispana naci-katolikismo lasis al ili aliron. Ili aliĝis al ekskursoj al la franca urbo Lurdo aŭ al Romo por vidi la papon. Jam transirinte la francan landlimon, ili interkonsentis kun la ŝoforo pri la ĝustaj dato, horo kaj loko por revena enbusiĝo kaj, helpe de francaj esperantistoj kaj hispanaj ekzilitoj, ili sin turnis al la kongresejo. Ĉe la reveno al Hispanio, ili kunportis restarigita sian ribeleman spiriton inter la ceteraj ekskursantoj, kelkaj el kiuj reveturis konkeritaj de fervoro al la di-patrino aŭ al la di-representanto. Aliaj kamaradoj eĉ ne revenis Hispanien.

Nur en 1986, kvindek jarojn post la komenco de la faŝista puĉo kaj de la hispana liberecana revolucio, en Hispanio plenrajte renaskiĝis la laborista E-movado. En la kataluna urbo Sant Cugat del Vallès, KAE, kultura grupo provizore kreita por la okazo, organizis la duan el la SAT-kongresoj ĉi-lande okazintaj, la 59an en la SAT-historio. La responsulo de la antaŭkongreso, en la bela Valo Ordesa, ĉe Pireneoj, estis Antonio Marco mem.

Tie niaj bravaj kamaradoj alprenis la decidon krei ĉi-landan LEA-on, nome asocion laboristan kaj SAT-tendencan. Tiucele, oni starigis komisionon estritan de José María Bernabeu kiel provizora prezidanto de la fondota LEA-o. La tiucelajn laborojn kaj demarŝojn **José María Bernabeu** kunordigis sekvajare. En 1988, li kunvokis nin hispanajn SAT-anojn kunveni en Valencio por ĉeesti la fondon de la unua LEA-o en la hispana teritorio sub la nomo HALE (Hispana Asocio de Laboristoj-Esperantistoj).

Kaj tie HALE fondiĝis. Ties unua prezidanto estis Manuel López Hernández (karesnome Manolo López), filo de la veterana E-

batalanto de la brava grupo de Callosa de Segura Manuel López Serna. Instruisto, unue, en A Coruña (Galegio), kaj, poste, sinsekve en Seviljo kaj Moguer (Andaluzio), Manolo estis samgeneracia kiel mi, kvankam ses jarojn pli juna. Baldaŭ ni fariĝis bonaj amikoj. Ne eblis ne simpatii al li. Li kaj lia ĝemela frato, Lorenzo, estis edukitaj de la gepatroj kiel denaskaj esperantistoj kaj klaskonsciaj homoj. López Serna esperantigis la tutan familion. Donis plezuron al la okuloj kaj al la oreloj vidi kaj aŭskulti la López'ojn kunaj, kadre de kongresoj, paroli kun ili, ĝui ilian bonhomecon.

Post elekto de la unua HALE-estraro, k-do Bernabeu proponis min kiel redaktoron de revuo kreota kiel organo de la asocio. Tio prezentis por mi grandan honoron, kaj mi vidis min kapabla alfronti la aspekton pure literaturan de la afero, sed ne ties parton ni diru teknikan: presadon, abonantojn ktp. Plej volonte, k-do Marco Botella tuj proponis sin kiel kunredaktoron. Kaj ni kune komencis labori super tia bela aventuro. En decembro 1988, ni aperigis la unuan numeron de Kajeroj el la Sudo, trimonata organo de HALE, kiun li kaj mi kunredaktis dum pli ol 7 jaroj. Entute, ni publikigis 29 numerojn. Justas agnoski, ke la leonan parton de la eldonlaboroj realigis Antonio, ĉiam entuziasme, akurate kaj serioze, kiel endas.

En 1996, ni transigis la redaktadon de Kajeroj el la Sudo alimanan. En la sekvaj jaroj, la ideologiaj tendencoj de la revuo ĉiam pli distanciĝis disde la kristalklare maldekstra kaj SAT-eca spirito, kiu kreis ĝin kaj HALE-on. Kaj mi, kune kun aliaj fondintoj de HALE, eksciĝis.

La krizo ĉiam pli profundis. Por i.a. provi solvi ĝin, sub la entuziasma impulso de granda anarki-esperantisma batalanto, mia karmemora kamarado **Martín Bustín Benito**



(alinome Marteno), en 2002, hispanaj SAT-anoj kaj eksmembroj de HALE okazigis SAT-kongreson en Hispanio, la 3an en ĉi lando, la 75an en la SAT-historio. Ĉi-okaze, en la urbo Alacant (hispane Alicante). Tie oni alprenis la decidon krei novan LEA-on, laŭan al la spirito de SAT kaj al la origina de HALE. Tiele naskiĝis “SAT en Hispanio-Izquierda y Esperanto”. La unuan parton de tiu nomo, “SAT en Hispanio”, aŭ, simple, SATeH, ni uzas en Esperantujo; la duan, la hispanan esprimon “Izquierda y Esperanto” (esperante Maldekstro kaj Esperanto), ni uzas en niaj rilatoj kun hispanlingvaj homoj kaj institucioj.

Nuntempe SATeH estas viva kaj aktiva LEA-o. En 2013, ĝi sukcese organizis en Madrido la 86an SAT-kongreson. En 2019, pluraj el ĝiaj membroj kontribuis al la sukceso de la 92a SAT-kongreso en Barcelono. SATeH-anoj kutime agadas ĉefe sur la kultura tereno: kunlabore kun la liberecanaj eldonejoj Calumnia Edicions kaj Antorcha, sur la paĝoj de liberecanaj revuoj kaj ĵurnaloj, kadre de kulturaj aranĝoj ĉe najbar-asocioj, ĉe liberaj radiostacioj... Libroservo de SATeH, ĉefe dank’ al la senlaca, zorga kaj fruktodona laboro de k-do Pedro Sanz, fariĝis i.a. unu el la lastatempe plej interesaj eldonejoj en Esperantujo...

Sed ĉio ĉi ja ne ekzistus sen “l’ espero, l’ obstino kaj la pacienco” de tiuj mirindaj frenezuloj pri nia utopio (“estu realisto, alstrebu la utopion”, proklamis francaj junuloj en la revolucia Majo 1968). Francisco Zaragoza mortis en 1997; José María Bernabeu, en



2004; Manuel López Serna, en 2012; lia filo, Manuel López Hernández, karesnome Manolo López, en oktobro 2020; Antonio Marco Botella, en novembro 2020. Aliflanke, Martín Bustín Benito, alinome Marteno, forpasis en 2013.

Al ili ĉiuj, al ĉiuj membroj de la E-grupo de Callosa de Segura, al ĉiuj kamaradoj, kiuj batalis por la laborista esperantismo, por la lumo, flugu ĉi omaĝaj vortoj el mia koro. Iliajn nomojn ni prononcu emocie, lante, laŭte. Ĉar “tio la Historion faras senca kaj metas harmonion en la kosmon”.

Sanon kaj utopion!



Naskiĝo de Brasensa kantaro

Trijara epopeo

Ĝin kunkantu kun la Kompanoj!


Enkonduko.

Ĝis la paper-naskiĝo de la kanzona libro, tri longajn jarojn poste de la Marcel-ideo okazis epizodoj stumbligaj ja kun pipro igante la Marcelan projekton epopeo. Ĉi periodo ŝajnis sub bremsado de ĥimero do el ĝi mi ekemis fariĝi nov-Homero (verŝajne tro moderne, kaj kun pli da modesto). Ekestis ĉi eposo ne vere tre epika sed estu ĝi prefere humura kaj E-pika. Konkludas l' epizodoj (dek unu en ĉi ĝesto) citaĵoj de Brasens': ne nepre el kantaro eĉ kiam ili estas, malsamas l' versa formo por tiuj de la libro ĉefiĝas la gitaro dum tie aleksandro sin trudas kiel normo.

***Precipe ili estas la idoj de l' ĥimero
fervoraj soifantaj poetoj de l' ĉielo***
(« Les oiseaux de Passage » p.192 de l' kantaro)

Far Sir'





Kanto 01

De longe jam, ŝvebadis en la Marcela kapo ideo tute stranga: la nombron de tradukoj Brasensaj duobligi... Ĉu tio pro sun-frapo? «Ne tiom stranga! - grumblis Marcelo pro la jukoj, ĉar ĉi projekton nutros kanzonoj - ja kanteblaj, sed nur kvar aŭ kvin dekoj: modestos ĉi kompilo, sen zorgoj kaprompigaj kaj sen postuloj nepraj!»

La sekvo al li pruvis ke ne! Alarm' gorilo!

(«Le gorille» p.46 de l' kantaro)

— ESPERANTO

Kanto 02

Franclingva eldonisto proponis kuneldonon se estos ĝi dulingva. Nu, duobligus tio paĝkvanton, kontroltaskon kaj eĉ sen melodio pro kostaj kopirajtoj la bezonatan monon. Forestis l' eldonisto, sed restis la ideo. Ĉu pro ĝi, oni risku la morton de la kreo? Aŭ ĉu eldoni saĝe, do sole Esperante?

Pro ĉi ide' se morti, nu bone, sed plej lante!

(«Mourir pour des idées» p.206 de l' kantaro)

— ESPERANTO — FRANÇAIS

Kanto 03

Sendiĝis al konataj kanzonaj fam-fakuloj pri la traktado takta de tekstoj laŭ mezuroj alvoko por kontrolo, fajlad' aŭ kompletigo de provoj aŭ versioj ne taŭgaj laŭ muziko.



Sufiĉe multaj homoj favoris la alvokon eĉ kun titoloj pliaj por nutri l' katalogon. l' projekto ampleksiĝis, kaj ankaŭ la teamo, debatoj tuj stariĝis pri indo de formuloj, ja viglaj kaj riĉigaj, sed kun pli da kvar uloj nur dum la fama tago de sankta Neniamo!

Pluralo ne valoras al homo, kaj tuj kiam kvarope oni plias, jen kretenaro tiam!

(«Le pluriel» ne ene de l' kantaro)


Taverna interno kun kart-ludantoj
David Teniers le Jeune (1610-1690)

Kanto 04

Ĉar temis pri kanzonoj, aldoni notojn indus
(ne nur pied-klarigajn sed ankaŭ ja muzikajn!)
aldoni partiturojn nin tro laborigintus
nur metu ni sur tekston akordojn utiligajn
por la akompanado, plej ofte per gitaro.
Sed ve! Bemolo grava aperis pro l' tiparo:
ĝi mise traktas plurajn simbolojn por muziko.
Kreadon de tiparo rigardas mi hobia
do mi pli taŭgan naskis, sub ŝildo de heliko!

Kun ŝildo ĉe la kleo, ŝveliĝus la La mia!

(«Le petit joueur de flûteau» p.152 de l' kantaro)



Kanto 05

Ĝenataj estas foje franclingvaj tradukantoj
pro l' fakt' ke E-juĝistoj ne estas magistratoj,
ke pro arkaikiĝo de nun en Esperanto,
la vorto « kvarmanulo* » aperas en debato,
eĉ pli, pri «rendevui»: franlingvo tiun verbon
ne havas, ĝi, pro tio, perturbas francan cerbon!
Najbara al la fonto verkiĝu la versio,
sed ŝajnamikojn oni forlasu, antaŭ ĉio
ĉar pri l' afero mirus legantoj alilingvaj!...
(pardonu vi l' ŝajnrimojn en la ŝajnversoj sekvaj):

**Anstataŭ pafe celi al ŝajna malamiko,
prefere oni atendu ke iĝu li amiko!**

(«Les deux oncles» ne ene de l' kantaro)



* kvarmanulo



Kanto 06

Ja viglis la debatoj: se nepras la respekto de la silaba nombro, de taktoj laŭ akcentoj, por esti plenkantebla laŭ celo de l' projekto, plej ofte tute mankas raciaj argumentoj por la decido: kion favori en problemoj kutimaj en traduko, krom laŭ personaj emoj... Ĵanin' en artikolo ĉe l' enkonduka parto «Kompara tekstostudo» ĝin traktis kun spertarto (Mi dankas pro l' titolo, plej taŭga hemistiko lokebla plej facile en miaj aleksandroj) Aperis tamen grava ne nur la semantiko sed eĉ l' puntiliemo de iuj tradukantoj...

**Mi famas kiel ega perversa pug-pinĉisto
Fabelas tio, tial suferas mi de tristo.**

(«Le pince-fesses» ne ene de l' kantaro)

Kanto 07

Ŝanĝiĝas la debato kaj ties debatantoj ne plu kanzonfakuloj, poetoj, versemuloj sed nun asocioj kun tasko, la demandoj pri indo de l' projekto, kun ties mon-postuloj. Pretigas sin l' membraro, kun help' de bild-maketo debati kaj baloti, kaj ĉio dank' al reto. Aperis pri lipharo, kontesto pri detalo ĉe la karikaturoj de l' trobadoro: formo, «Duponta» laŭ desegnoj, «Duponda» laŭ realo. (Al tiuj, kiam buboj, en la Hergé-a normo ne banis, jen klarigo: ĉe nia kant-poeto ĝi ŝlosas l' supran lipon en hara parentezo sed pintas preskaŭ kiel stiril' de biciklo, desegne) sed balote, influis ĝi sen pezo.

**Sapera antaŭtuko, lipharo mia? Spit'!
Ricevu ĉi komparo pugbaton laŭ merit'.**

(«La fessée» p.162 de l' kantaro)



Kanto 08

Sed ve! La kasistino klarigas ke la kosto por kopirajtoj igis l' elspezon elefanta, farante sen diskuto l' projekton tuj krevanta. Ekestis por ni ĉiuj en gorĝo dika osto! Debato baldaŭ tamen stariĝas kaj eĉ vigla:

« — Nu, kiun celon havis finfine ĉi projekto? Ĉu mono aŭ kulturo superis ĉe l' koncepto? — La mona flanko gravas sen esti punkto tikla! Estiel asocio ni celas ne profiton sed tamen indas saĝe eviti deficiton! Sen eblo ĝin varigi, ĝi iĝu aĵo dona! — Atentu vi ke dono similas ne donacon! Ĝi sen problemo estas kelkfoje ece mona, ekzemple per lu-donoj l' iganto nutras l' kason! — Min iom ĝenas tamen ke oni ŝajndonacas kondiĉe ke donacu la ricevanto sumon: videble tio estas kaŝvendi la albumon ne ĉiuj kontrolistoj plenplene malsagacas! — Interesatoj simple fariĝu mem Kompanoj, kaj dote laborilon tuj havu en la manoj! — Ja! Ĉi tekniko estas nelica je nenio! »

Nu, sen tekniko, doto nur estas fi-manio!

(« Le mauvais sujet repenti » ne ene de l' kantaro)

Ne diru :

Ĉi libro kostas 15€
Ĉu vi aĉetas ?



Sed diru :

Ĉi broŝuro estas ilo
kiun ricevas la Kompanoj
por siaj trejnadaj...

Kotizo
estas 15€

Ĉu vi aniĝas ?



Nu... tiel
konceptite...



« kleran figurantinon »,
ili postulis... Mi min demandas
kiel ili komprenas
« kleran »...

Kanto 09

«L' Ravino blua» estis ne blua ino rava, sed por anarkiistoj presejo ege grava. Neniu pli kongruus al nia trobadoro, verkinta liberece sen fi-afekt-pudoro Jam Mikĉjo, ĝia estro, gazetojn, librojn presis por SATaj eldonejoj. Konsento tuj sukcesis : kun taŭga lima dato kaj prezo tre favora, mendiĝis senprokraste la verko trobadora. De tiam, ve! respondis en formo kavalira (pli ĝuste, eĉ husarda) al petoj nur silento, neniu ajn konfirmo kaj same nek demento, letarĝis ĉiuj mendoj en formo plej suspira. Por Mikĉjo formalajtoj agadis tro ĉikane. Li plene liberigis ja plej liberecane kaj iris ekoflegi, nun sen adrenalino, karotojn ĉe l' nokt-blue de l' fundo de l' ravino.



Anarkiistoj estas ne nepre altruistoj.
Anarkiisto estas aparta homo kiu skrupule strat-trairas paseje, nur ĉar tiu hategas la diskutojn kun ĉiaj policistoj.
(El intervjuo. Ne ene de l' kantaro)

Ne plu 'stas
Pireneoj!



Kanto 10

Post, de l' presist' ĝisnuna, l' enraviniĝo blua,
SAT kun Marcelo serĉis por isto pli kongrua,
kaj trafis iun eblan, Pamplonon apudantan,
kun prez' eĉ pli favora ol tiu ravinula.
Responde al la sendo de simpla bit-maketo
alvenis ekzemplero, ja prova, sed terura,
kun kriplaj fuŝ-literoj igantaj ĝin rubeto.
Post revizi' kaj sendo de bit-maketo nova
l' rezulto tiun fojon, ne estis katastrofa.
Post l' telefoninformo (finiĝis la presado),
Marcel', tuj iĝis sola tutSATa ambasado,
kun celo konvencii por zorgi SAT-eldonojn,
samtempe por hejmigi presitajn la kanzonojn
turisme alveturis Eŭskien. Ve! l' presisto
l' unuan bit-maketon misuzis erar-age!
Bedaŭris li l' fuŝfaron, kun honto kaj kun tristo
promesis represadon kaj sendon ja senpage.
Nu! kiu dio, kiu koboldo havas emon
persiste kontraŭstari de l' libro la alvenon?
Bonŝance post ricevo, finiĝis la koŝmaro
kaj tiel l' odiseo de la Brasens'-kantaro.

Feliĉas ja Uliso post longa vivvojaĝo

En fino sin retrovas en lando de l' junaĝo!

(«Heureux qui comme Ulysse» p.190 de l' kantaro)

Kanto 11

La koda nomo estis por ĉi iniciato
GB'2021*, en kiu oni vidas
Georgo-siglon kun l' verka naskiĝdato,
sed tiu Go-Bo fakte la anglan kaŝincitas,
ĉar por kantigi Brasens' en lingv' universala
uziĝas Esperanto, por GB spito sala!
Je dudek centimetroj per dudek unu, l' aĵo
nenorme, tute strange alprenis ĉi formaton,
per tio, tre diskrete, ĝi signas l' naskiĝdaton
(dum male l' dikec-nombro enigme restas kaŝo)!...
Post longaj kaj senfinaj tri jaroj da gravedo
provante evolui ne plu felietone,
ĝemele en centopo al sturmo de l' planedo
naskiĝis fine l' verko, papere kaj kartone...

**Nu, kiam la bebo alvenis al la nesto
ni vidis ke la patro konceptis ĝin kun vesto!**

(«Le bricoleur» p.62 de l' kantaro)

* (legu:GoB' dumil dudek unu)



Dialogoj de la Dioj

Θεῶν διάλογοι

Scenoj de Luciano el Samosato
(Λουκιανός ο Σαμοσατεύς)
Tradukitaj de Gerrit Berveling



<https://www.freepng.fr/>

1 (21) Dialogo inter Areso kaj Hermeso

1 Areso: Kara Hermeso, ĉu vi aŭdis kion Zeŭso minacis al ni, kiel malestime kaj nekredeble? Li diris: Se plaĉos al mi, ŝnuron mi desendos de la ĉielo, kaj vi pendos je ĝi, tutforte provante tiri min suben, sed vane vi klopodos: ĉar vi ne tiros min suben; sed se mi ŝatus tiri vin supren, ne nur vin, sed ankaŭ la teron mem same kiel la maron mi tirus supren kaj igus la tuton ŝvebi aeromeze. Kaj li parolis plu kaj plu – vi ja aŭdis lin. Mi konfesas, ke li nin unuope superas, kaj tion mi ne neos, sed ke nin ĉiujn kune li venkus, tiel ke, se teron kaj maron ni havus kun ni, nia pezo ne superus lin – tion neniam mi kredos.

2 Hermeso: Ŝŝ!, Areso! Ne estas senriske diri ion tian! Ni povus penti pri nia stulta babilo.

Areso: Ĉu vi pensas, ke tion mi diras al ĉiuj, ĉu ne nur al vi sola? Vi ja scias teni vian langon! Sed mi devas diri, kio trafis min pleje kiel ridindaĵo, kiam mi aŭdis liajn minacojn. Mi memoras, ĉe la ribelado de Pozidono, Hera kaj Atena, kiam tiuj planis fermi lin en ferojn, ke li frenezigiĝis je timo, kvankam ili nur estis triopo. Kaj en feroj li estus restinta, kun tuta sia tondrado kaj fulmado, se Tetisa ne kompatus lin kaj alvokus la centbrakan Briareon por helpi lin. Pri tio pensante mi laŭte ridis pri liaj belaj paroladoj.

Hermeso: Silentu, mi diras. Por vi estas danĝere diri tion, por mi aŭdi ĝin.

2 (22) Dialogo inter Pajno kaj Hermeso

1 Pajno: Saluton, ho Paĉjo Hermeso!

Hermeso: Malbontagon al vi. Sed kiel mi estu via patro?

Pajno: Ĉu vi ne estas Hermeso el Kuleno?

Hermeso: Jes. Sed kiel vi do estu mia filo?

Pajno: Bastardo mi estas, estiĝinta el via amo.

Hermeso: Je Zeŭso! Kiam iu virkapro seksumis kun kaprino; sed ho, kiel vi povus esti mia, vi kun tiuj kornoj kaj tia muzelo, vila barbo, fenditaj kaprohufoj kaj vosto super la pugo!

Pajno: Se vi min mokas, paĉjo, vi mokas la propran filon, aŭ pli ĝuste vin mem, ĉar tian filon vi produktis. Mi senkulpas.

Hermeso: Kiun vi nomas via patrino? Eble kaprinon mi forlogis ne rimarkante ĝin.

Pajno: Ne temas pri kaprino, sed bone cerbumu, ĉu ne foje en Arkadio knabinon libere naskitan vi perfortis. Kial viajn ungojn vi mordas tiel forte serĉante? Kial tiel konfuzita? Mi parolas pri Penelopa, la filino de Ikario.

Hermeso: Kion ŝi do suferis, ke ŝi naskis al mi filon similan je kapro?

2 Pajno: Mi diros, kion ŝi mem diris. Ĉar kiam ŝi sendis min al Arkadio, ŝi diris: Infano mia, mi ja estas via patrino, Penelopa el Sparto, sed via patro estas Hermeso, la filo de Maja kaj Zeŭso. Ne zorgu, ĉar kornojn vi havas kaj kaprohufojn, ĉar kiam via patro sekskuniĝis kun mi, li sin ŝanĝis en kapron, por ke restu kaŝite, kaj tial vi fariĝis kaproforma.

Hermeso: Je Zeŭso! Mi memoras, ke foje ion tian mi faris. Mi kiu tiom fieras pri mia beleco, mi via patro, ankoraŭ kun ĉi softa haŭto! Ĉu pri mi oni ridu inter ĉiuj homoj pro mia bela filo?

3 Pajno: Sed vi ja ne devas honti pro mi, paĉjo. Muzikisto mi estas kaj laŭte mi povas fajfi, kaj Dionizo nenion povas fari sen mi, do li faris min sia akompananto kaj kun-festanto. Mi estas la danc-gvidanto, kaj se vi vidus kiom da ŝafaroj mi havas ĉirkaŭ Tegeo kaj Partenio, certe vi ĝojus. Mi estas estro de l' tuta Arkadio. Krome, antaŭ nelonge mi tiel brile batalis flanke je la Atenanoj ĉe Maratono, ke la unuan premion oni donis al mi – la kavon sub la Akropolo. Kiel ajn, iru al Ateno kaj baldaŭ vi eltrovos, kiel grandan nomon tie havas Pajno.

4 Hermeso: Diru al mi. Pajno: ĉu vi edziĝis? Pajno ja estas via nomo, ĉu ne?

Pajno: Kompreneble ke ne, paĉjo. Mi estas romantika, kaj mi ne ŝatus limigi miajn interesojn je nur unu persono.

Hermeso: Vi sendube do serĉos vian feliĉon ĉe la kaprinoj.

Pajno: Bele vi mokas, sed ĉe Eĥoa kaj Pitŭia mi flankumas kaj ĉe ĉiuj Menadoj de Dionizo, kaj tiujn mi ege ŝatas.

Hermeso: Ĉu vi scias, filo – mi ankoraŭ nenion de vi petis.

Pajno: Diru do, paĉjo; mi vidu pri tio.

Hermeso: Venu al mi, estu afabla, kaj atentu, ke vi ne nomu min patro, se iu alia tion aŭdas.

3 (23) Dialogo inter Apolono kaj Dionizo

1 Apolono: Kion ni diru? Ke sampatrinaj ja estas Eroso, Hermafrodito kaj Priapo, sed tute malsamegaj laŭaspekte kaj laŭkutime? Eroso ja estas unuarange bela, kaj arkpafisto kiu superas per sia granda kapablo ĉiujn pafistojn; Hermafrodito estas inaĉa dikulo, duone tia, duone alia laŭaspekte; oni ne povus diri, ĉu viro li estas aŭ virgulino; sed Priapo estas rekte maldece vireca.

Dionizo: Tio, Apolono, apenaŭ estas miriga; sed ja ne kulpas Afrodita, ĉar la patroj estis malsamaj. Krome, se eĉ la patroj estas samaj, ofte el unu utero venas vira bebo, sed alia estas ina, kiel ekzemple okazis ĉe vi kaj via fratino Feba.

Apolono: Jes ja. Sed ni similas kaj havas similajn interesojn. Ambaŭ ni estas arkpafistoj.

Dionizo: Tio estas kiel longe iras la sago, Apolono, sed ne plu. Ĉar Artemisa mortigas vizitantojn de Skitujo, dum vi estas profeto kaj sanigisto de malsanuloj.

Apolono: Kio? Ĉu vi kredas, ke mia fratino ĝojas pri siaj Skitoj? Je la momento, kiam iu Heleno atingas Taŭridon, ŝi pretas kaj atendas la unuan ŝipiston por fornavigi kun li, pro naŭzo je iliaj hom-oferadoj.

2 Dionizo: Jen la plej bona, kion ŝi povas fari. Sed koncerne Priapon – mi rakontos al vi ion vere amuzan. Antaŭnelonge – estis en Lampsako – mi trairis la urbon, kiam li invitis min en sian hejmon, kaj regalis min. Kiam en lia manĝejo ni ekdormis, ĉar ni sufiĉe malsekiĝis, ĉirkaŭ noktomeze nia kuraĝulo leviĝis – sed mi hontas rakonti al vi.

Apolono: Li elprovis vin, Dionizo?

Dionizo: Iel simile.

Apolono: Kiel vi je tio reagis?

Dionizo: Kiel alie ol per ridado?

Apolono: Bonege. Kolero ne helpus, nek perforto; li almenaŭ havas senkulpigon pro tiu atako al vi. Vi estas ja tiel bela.

Dionizo: Se temas pri tio, ankaŭ je vi li povus fari provon, Apolono. Vi estas bela kaj longhara, tiel ke Priapo, eĉ se li estus sobra, vin povus ataki.

Apolono: Ho ne, Dionizo, tion li ne faros. Mi ja ne havas nur longajn harojn. sed ankaŭ mian arkon.

4 (24) Dialogo inter Hermeso kaj Maja

1 Hermeso Panjo, ĉu en la ĉielo ekzistas Dio pli kompatinda ol mi?

Maja Hermeso, kara, tiel vi ne parolu!

Hermeso Kial ne, kiam mi estas tiel okupita, dum mi sola laboregas, kaj krome tiom konfuzita de tiom da malsamaj taskoj? Mi devas esti veka je ekmateniĝo, kaj purigi la manĝoĉambron, atentante pri la kusenoj sur la lito kaj ĉion iom purigante, kaj tiam mi staru preta por Zeŭso je ĉiu eksono, mesaĝisto por porti mesaĝojn supren kaj suben, kaj tuj kiam mi revenas, mi devas disdoni la ambrozion, sen eĉ tempo por min purigi; kaj antaŭ ol alvenis lia lasta akiraĵo, la vinverŝisto, mi kutime ankaŭ verŝis la nektaron. Sed plej grave, nokte estas same. Mi estas la sola kiu perdas sian dormon kaj ankaŭ tiam laboregas – por Pluto, ĉi-foje, agante kiel gvidisto por la animoj kaj pordisto por la mortintoj, kaj poste mi devas ofici kun la Juĝisto Radamantiso. Mia taga laboro, ŝajne, ne estas sufiĉa por mi, iri al la luktejoj, anonci en la parlamento, trejni la parolitojn, sed mi devas elteni ankaŭ kun la mortintoj, ĉar ĉiuj ili bezonas sian parton de mi.

2 Kaj tamen la idoj de Latona povas alterni, oficante en la Ĉielo kaj en Hadeso je la sekvaj tagoj, sed mi devas plenumi ĉiujn ĉi taskojn ĉiutage en ambaŭ lokoj. Jes, kaj la filoj de Alkmena kaj Semela, kies patrinoj estis nuraj virinoj kaj malbone finiĝis, povas satmanĝi sen iu zorgo en la mondo, dum mi, la filo de Maja, la filino de Atlaso, devas stari preta kun mano kaj piedo. Nun mi ĵus revenis de la filino de Kadmo en Sidono, kiam li forsendis min rigardi kiel statas la aferoj pri ŝi, kaj sen lasi al mi eĉ la tempon ree spiri, li sendis min for al Argo por rigardi Danaan, kaj “Poste”, li diras, “prefere vi pluiru de tie al Beotujo, kaj survoje metu rigardon sur Antiopan.” Sed mi estas tute elĉerpita. Se nur estus eble, volonte mi estu vendita sur la vendoplaco, kiel sklavo surtere, kiuj trovas sian sorton tiel malbona.

Maja Sufiĉe, mia fileto! Vi devas fari ĉion, kion via patro deziras. Vi estas ankoraŭ juna. For nun al Argo, kiel al vi estas ordonite, kaj poste al Beotujo, aŭ vi povus ricevi la vipadon de la babilemuloj. Amantoj havas akrajn humorojn.

5 (1) Dialogo inter Prometeo kaj Zeŭso

1 Prometeo Liberigu min, ho Zeŭso; mi jam terure suferis.

Zeŭso Mi liberigu vin, ĉu vi diras? Pli pezajn ĉenojn vi ja devus porti, kaj la tutan Kaŭkazon sur via kapo, kaj ĉiujn tiujn dek ses vulturojn por forŝiri vian hepaton, kaj ankaŭ por elfosi viajn okulojn, ĉar vi faris tiajn kreaĵojn, kiuj estas la homoj por ĝeni nin, kaj fajron vi ŝtelis kaj vi produktis virinojn. Kial mi ankoraŭ rakontu, kiel vi trompis min dismetante la viandon, ĉar vi servis al mi ostojn volvitajn en graso, tenante por vi mem la pli bonan porcion.

Prometeo Ĉu mi ankoraŭ ne estas sufiĉe punita pro tio, tuttempe najlita sur Kaŭkazo, kun tiu malbenita aglo, kiu manĝis mian hepaton?

Zeŭso Estas eĉ ne plej eta porcio de tio, kion vi meritas.

Prometeo Sed mi repagos por mia liberiĝo. Zeŭso, tre gravan informon mi donos al vi.

2 Zeŭso Vi provas trompi min, Prometeo.

Prometeo Kion bonan tio liverus al mi? Vi same bone sciis, kie estas Kaŭkazo kaj ankoraŭ havus amason da ĉenoj, se oni kaptus min ĉe iu trukaĵo.

Zeŭso Unue vi diru, kiu estas tiu valora rekompenco de vi?

Prometeo Supozu, ke mi diros al vi, kion en via ekspedicio vi celas, ĉu tiam vi fidus ankaŭ miajn aliajn profetaĵojn?

Zeŭso Certe ja!

Prometeo Vi celas Tetisan, por amindumi kun ŝi.

- Zeŭso** Ĝis nun vi pravas, sed kio sekvos? Ĉar mi supozas, ke veron vi diros.
- Prometeo** Ne rilatu kun tiu filino de Nereo, ĉar se idon ŝi havos, ĝi traktos vin kiel vi traktis Kronon.
- Zeŭso** Ĉu vi celas, ke mi estos eksigita el la reĝeco?
- Prometeo** Tion mi ne esperas, Zeŭso, sed io simila minacas, se vi umados kun ŝi.
- Zeŭso** Saluton do pri Tetisa; kaj vin, Prometeo, pro tio ĉi devas vin liberigi Hefajsto.

6 (2) Dialogo inter Eroso kaj Zeŭso

1 Eroso Se mi eĉ farus ion malbonan, Zeŭso, mi petas, pardonu min, ĉar nur infano mi estas kaj ankoraŭ sen cerbo.

Zeŭso Vi infano, vi Eroso, kiu estas multe pli aĝa ol Iapeto! Nur ĉar vi barbon ne havas nek grizajn harojn, ĉu vere vi kredas, ke oni prenu vin por bebo, dum oldulo vi estas, fripono!?

Eroso Kion grande mi misfaris al vi, ke fripono vi min nomas, kaj eĉ pripensas meti min en ĉenojn?

Zeŭso Atentu, ho fripono! Ĉu vi kredas, ke neniel gravas, ke vi ridindigas min tiel ofte, ke vi ŝanĝis min en preskaŭ ĉion sub la suno – satiruso, taŭro, orpluvado, cigno, aglo? Tamen ankoraŭ neniam vi iĝis iun virinon enamiĝi je mi en mia propra aspekto, kaj kiom mi scias, mi ne bezonas danki vin pro miaj konkerajoj, sed magion mi devas uzi por konkeri la belulinojn, kaŝante mian memon. Sian taŭron aŭ cignon profunde ili amas, sed kiam ili min vidas kiel reale mi estas, ili estas morte timigitaj.

2 Eroso Tio estas nur natura. La aspekto de via vizaĝo estas tro por mortidevaj virinoj kiel ili.

Zeŭso Sed kiel do Apolono tiom popularas ĉe Bakĥo kaj Hiacinto?

Eroso Tamen ankaŭ de li Dafna forfuĝis, malgraŭ ĉiuj liaj belaj bukloj kaj senbarba vizaĝo. Sed se vi deziras, ke ili enamiĝas je vi, vi ne devas svingi vian ŝildon nek kunporti kun vi la fulmon, sed faru vin tiel alloga kiel vi nur povas kaj milda aspekte. Lasu vian hararon buklo kreski ĝis la ŝultroj, suprenligu ĝin per rubandoj kiel Bakĥo, portu la purpuran robon kaj orajn sandalojn, kaj envenu dancante laŭ la muziko de flutoj kaj timpanoj, kaj vi konstatos ke postkuros vin pli ol ĉiuj tiuj Bakĥantoj kune.

Zeŭso For kun vi! Prefere ili ne konsideru min aminda, se por tio mi devus esti tia.

Eroso Lasu do ĉiujn ideojn de romantikeco, Zeŭso. Tio estas sufiĉe simpla.

Zeŭso Ho, ne! Miajn inojn mi deziras, sed mi volas sukceson ĉe ili sen tiom da penado. Nur tion promesu, kaj mi vin liberigos.

7 (3) Dialogo inter Zeŭso kaj Hermeso

Zeŭso Ĉu vi konas tiun belan filinon de Inaĥo, ho Hermeso?

Hermeso Jes. Ioan vi celas?

Zeŭso Ne plu infano ŝi estas, sed bela bovideto.

Hermeso Vera mirakleto! Kiel ŝi ŝanĝiĝis?

Zeŭso Pro ĵaluzo Hera ŝanĝis ŝin. Sed ankaŭ alian ne jam aŭditan petolaĵon ŝi faris pri la kompatindulino: gardiston mult-okulan, Arguson, ŝi starigis tie, kiu paŝtas la bovideton, mem neniam dormante.

Hermeso Kion do pri tio ni faru?

Zeŭso Vi flugu suben al Nemeo – Arguso tie gardas sian gregon – kaj mortigu lin. Tiam Ioan trans la maron al Egiptujo transportu kaj tie ŝanĝu ŝin en Izisan. Poste ŝi estu Diino de la tiea popolo, kiu kreskigas la akvojn de Nilo kaj sendas al ili ventojn kaj savas la maristojn.

8 (5) Dialogo inter Zeŭso kaj Hera

Hera 1 Depost kiam tiun knabon ĉi tien vi portis, tiun Frigian knabon de la Monto Ida, Zeŭso, vi min neglektas.

Zeŭso Kio, Hera? Jam ĵaluza? Pro *li* eĉ, kvankam li estas tiel simpla kaj senofenda? Mi supozis, ke vin nur ĝenas miaj diversaj inaj partneroj.

Hera 2 Estas aĉe kaj tute neakcepteble pri vi, la Mastro de ĉiuj Dioj, trompi min, vian laŭleĝan edzinon, por descendi al la tero, ŝanĝigante en oron, satiruson aŭ bovon por adulti. Sed viaj inoj restas ja sur la tero, sed tiu knabo de la Idamonto: vi ekkaptis lin kaj flugigis lin ĉi tien supren, mia bela reĝo de la birdoj! kaj vi enigis lin en nian familion trans mia kapo, laŭdire kiel vinverŝiston. Ĉu tiel terure vi bezonis vinverŝiston? Ĉu do Heba kaj Hefajsto strikas? Kaj de li vi ne povas akcepti la pokalon, sen kisi lin antaŭ ĉies okuloj, kaj lian kison vi trovas pli dolĉa ol la nektaro mem, kaj tiel daŭre kaj plu vi petas trinkaĵon, eĉ se vi ne soifas. Foje vi eĉ nur prenas ekguston kaj redonas al li la pokalon, kaj kiam li trinkis, vi reprenas ĝin kaj kie li tuŝis ĝin per la lipoj, vi ĝin tuŝas, tiel ke vi povas samtempe kisi kaj trinki. Antaŭnelonge vi, la Reĝo kaj Patro de ĉiuj, flankenmetis egison kaj fulmon, kaj eksidis kun li por ludi ĵetkube, vi kun via granda barbo sur via kapo! Ĉion mi vidas. Ne kreu, ke vi trompas min!

Zeŭso 3 Kaj kio, mia kara, estas tiel terura, se mi kisas ĉarman knabon kiel tiu, se mi trinkas kaj ĝuas samtempe la kison kaj la nektaron? Se vi lasus lin kisi vin ĝuste unufoje, neniam vi plu grumblus min, ke lian kison mi pli ŝatas ol nektaron.

Hera Knabamantoj povas paroli tiel, sed mi esperas, ke neniam mi fariĝos tiel stulta, ke miajn lipojn mi prezentos al tiu Frigia knabaĉo. Ho, tiu iniĝinto!

Zeŭso Ne insultu mian etan karegulon, mi petas, nobla Hera. Ĉi tiu iniĝinta fremdulo, ĉi tiu knabaĉo, al mi estas pli dezirinda kaj kara ol – mi ne diros, timante ke vin mi faros ankoraŭ pli kolera...

Hera 4 Nu, ek do kaj nuptu lin, kiom min koncernas. Sed mi esperas, ke vi memoras, kiom pro tiu vinverŝisto vi maldece kondutas al mi.

Zeŭso Kia stultaĵo! Mi supozas, ke nian vinon ni ricevu de via filo Hefajsto, kiu ĉirkaŭskuiĝas, tuj de la forĝejo, ankoraŭ malpura de la fajreroj, ĵus demetinte la prenilojn. Mi imagas, kiel la pokalon mi ricevu de tiuj malpuraj fingroj liaj, kaj inter ĉiuj glutoj da vino mi kisu lin! Ho, eĉ vi, lia propra patrino, ne ŝatus kisi lian vizaĝon, tute nigran de fulgo. Tio ja estus pli bona, ĉu ne? Hefajsto estus vinverŝisto multe pli taŭga por la Dioj, kaj Ganimedo estu forekspedita hejmen al la Idamonto! Li estas tro pura, kaj havas ĉarmajn fingrojn, li ne estas mallerta, prezentante la trinkaĵojn, kaj kio enuigas vin pleje: lia kiso estas pli dolĉa ol nektaro.

Hera 5 Ha, nun vi plendas, ke Hefajsto lamas, kaj liaj fingroj ne estas sufiĉe bonaj por via pokalo, kaj li estas tute fulgokovrita, kaj lia aspekto perturbas vian stomakon! Vi estas tia depost kiam la Idamonto produktis tiun longharan belulon. Antaŭe tiajn aferojn vi eĉ ne rimarkis. La fajreroj kaj la forĝejo neniel malhelpis vin transpreni la vinon de li.

Zeŭso Kara Hera, per via ĵaluzo vi nur faras vin mem malfelica, kaj min pli enamiĝinta je li; se vi ne ŝatas ricevi vian trinkaĵon de bela knabo, via propra filo povas servi al vi, kaj vin, Ganimedo, tiam mi havos nur por mi mem, por priservi min, transdoni du kisojn ĉe ĉiu trinkaĵo, unu kiam vi ĝin prezentas, kaj la duan kiam mi ĝin redonas. Kio nun? Vi ja ne ploras? Ne timu: se iu ajn volas ĉagreni vin, li tion bedaŭros!



9 (6) Dialogo inter Hera kaj Zeŭso

Hera 1 Tiu Iksiono, Zeŭso, kia persono viaopinie li estas?

Zeŭso Honesta viro, ho Hera, kaj bona kundrinkanto. Li ne estus nia gasto, se li ne meritus nian tablon.

Hera Sed li ne taŭgas, ĉar li malbone kondutas. Do ne plu invitu lin.

Zeŭso Kion li malbonkondutis? Ĉar, mi kredas, ankaŭ mi tion sciuj.

Hera Komprenoble – tamen mi hontas diri tion. Tiom estas, kion li kuraĝis!

Zeŭso Sed se ion hontindan li kuraĝis fari, des pli da kialo por tion rakonti al mi. Li ja ne provis perforti iun, ĉu? Mi supozas, ke mi povas elpensi, kion hontindan eble li provis, kion vi ne ŝatus mencii.

Hera 2 Min mem, ho Zeŭso, jes, kaj ne iun alian, jam longtempe. Komence mi ne komprenis, kiom implicas, kiam daŭre li gapadis al mi. Li singultis kaj ploretis, kaj kiam drinkinte la pokalon mi donis al Ganimedo, li petis trinkaĵon el la sama pokalo, kaj tiun ricevinte, meze de la trinkado li ĉesis kaj kisis la pokalon, levante ĝin al siaj okuloj, denove fiksrigardante al mi. Tuj mi konsciis, ke tio estas signoj de amo, kaj longtempe mi hontis mencii tion al vi, supozante ke unue pasu lia unua freneziĝo. Sed ĉar nun efektive li kuraĝas ektaŭsi la temon al mi, mi postlasis lin ploranta kaj kurbigita planken, kaj ŝtopante miajn orelojn, ke liajn terurajn plendojn mi ne plu aŭdu, mi nun revenas rakonti ĉion al vi. Lian punon mi lasos en viaj manoj.

Zeŭso 3 Kia damninda fiulo! Rekte kontraŭ mi – ataki la nupton de Hera! Ĉu tiom ebria de la nektaro? Sed de tio *ni* estas kulpaj; ni estas tro intimaj kun la homoj, invitante ilin kundrinki kun ni. Do ne eblas kulpigi ilin, kiam ili la saman trinkaĵon ricevas kiel ni, kaj rimarkas la belecon de la ĉielaj sinjorinoj, kiajn neniam surtere ili vidis – se tiam ili enamiĝas kaj deziras tiajn belulinojn por si mem ... Efektive, Amo estas sufiĉe perforta potenco, kaj ne nur pri homoj, sed eĉ ankaŭ por Dioj ofte li estas mastro.

Hera Amoro estas via mastro, regas vin kaj direktas vin kiel oni diras, je la nazo. Kaj kien ajn ĝi kondukas, vi sekvas, kaj eĉ ne gravas al vi ŝanĝiĝi en kion ajn laŭ lia deziro. Nu, vi ja estas nur ludilo de Amoro. Mi jam nun povas vidi, kiom vi simpatias kun Iksiono, ĉar foje lian edzinon vi forlogis kaj tiu donis al vi Peritoon.

Zeŭso 4 Ĉu vi ankoraŭ memoras ĉiun fojon, kiam mi teren descendis por iom da plezuro? Ĉu vi scias, kion laŭ mi ni faru pri Iksiono? Ni ne punu lin nek fortenu lin de nia tablo – estus tro tradicie. Ne, ĉar li enamiĝis, kaj kiel vi diras, li ploras kaj suferas netolereble ...

Hera Rapide, ek kun ĝi! Mi ja timas, ke vi havas impertinentan sugeston.

Zeŭso Tute ne. Ni faru modlaĵon laŭ vi el nuboj, kaj ĉiuvespere post la manĝo, kiam pro amo li ne povas ekdormi, kiel estas nur nature, ni prenu ĝin kaj metu ĝin tuj apud li. Tiel li povos esti for de sia mizero, kaj samtempe kredi, ke li ricevis kion li deziras.

Hera Neniam! Li estu damnita, ĉar li estis fikema pri iu, kiu estas pli alta ol li.

Zeŭso Tamen, mia kara, eltenu. Kian malutilon al vi farus Iksiono se li amorus al nuboj?

Hera 5 Tiam oni prenos min por nuboj kaj mi estos ridindigita, ĉar oni ne vidos la diferencon.

Zeŭso Kia stultaĵo! La nuboj neniam povus fariĝi Hera nek vi – nuboj. Iksiono estos trompita, jen ĉio.

Hera Sed ĉiuj homoj estas tiel aĉe edukitaj. Eble li surtere distrumpetos sian historion al ĉiuj, asertante, ke li akompanis Heran kaj partoprenis la liton de Zeŭso. Eble li eĉ asertos, ke mi enamiĝis je li, kaj oni lin kredos, nesciante, ke efektive li estis kun tiu nuboj.

Zeŭso Bonege – se ion tian li asertas, li estos forsendita al Hadeso kaj ŝnurita al rado – tion neniel li ŝatos – kaj sur tiu rado li rondiros plu kaj plu poreterne, kaj suferos turmentojn senfine, ne kvazaŭ pune pro sia amo – ĉar tio ne estas krimo – sed pro sia fanfaronado.

10 (4) Dialogo inter Zeŭso kaj Ganimedo

1 Zeŭso: Jen, Ganimedo, ni ja atingis la celon, kisu min do, por ke vi spertu, ke la hokan bekon kaj la akrajn ungegojn kaj la flugilojn mi ne plu portas. Ĉar vi ja pensis ke mi estas birdo.

Ganimedo: Homo, — sed ĵus vi estis ja aglo? De alte vi plonĝis por forkapti min meze el mia ŝafaro! Kien formalaperis ĉiuj viaj plumoj? Ĉu vi plumŝanĝiĝas do? Vi aspektas tute alie!

Zeŭso: Ne homon vi vidas, ho knabo, nek aglon, sed jen mi estas la Reĝo de ĉiuj Dioj; porokaze mi min aliformis.

Ganimedo: Kion vi diras? Vi do estas la granda Pajno!? Kial vi do ne portas la paŝtistan ŝalmon nek la kornojn? Kial viaj kruroj ne estas vilaj?

Zeŭso: Ĉu nur tiun vi opinias granda Dio?

Ganimedo: Jes! Ni oferbuĉas al li fekundan bokon, ĉe tiu spelunko, kie staras lia statuo. Sed mi supozas ke vi estas iuspeca homrabisto.

2 Zeŭso: Diru do, ĉu neniam vi aŭdis la nomon Zeŭso? Ĉu lian altaron vi ne vidis sur la monto Gargaro? De tiu Dio kiu igas pluvi kaj tondri kaj fulmadi?

Ganimedo: Vi do, ho bonulo, asertas esti la ulo, kiu antaŭ nelonge sendis al ni ĉiun tiun hajlon? Kiu laŭdire loĝas tie supre kaj produktas tiun bruadon? Tiu al kiu mia patro oferis virŝafon? Nu do, kion mi misfaris, ke vi forkaptis min, ho Reĝo de la Dioj? Eble la lupoj jam disŝiras la ŝafojn, atakante ilin nun solajn.

Zeŭso: Do, ĉu ĉiam vi zorgas pro la ŝafoj? Vi ja senmortiĝos kaj eterne vivos ĉi tie kun ni.

Ganimedo: Kion vi diras? Ĉu vi do ne reportos min hodiaŭ al la monto Ida?

Zeŭso: Nepre ne! Tiam mi estus agliĝinta por nenio!

Ganimedo: Sed mia patro min serĉos ja kaj kiam li ne trovos min, li ĉagreniĝos, kaj poste mi nur akiros batojn ke la ŝafaron mi forlasis.

Zeŭso: Sed kie li vin trovu?

Ganimedo: Ne vere: mi jam sentas hejmsopiron al li. Se vi min portos malsupren, mi promesas ke li oferbuĉos al vi plian virŝafon, interŝanĝe por mi. Ni havas trijaran, tiun grandan, kiu kondukas al la paŝtiĝejo.

3 Zeŭso: (*Transŝultre al Hermeso*) Kiel agrable senkulpa estas ĉi knabo! En tio li estas ja nur infano. (*Al Ganimedo*) Sed, Ganimedo, ĉion tion vi devos formeti de vi kaj forgesi: la gregon kaj la monton Ida; ĉar nun vi estas ja ĉielulo, vi povos fari multan bonon ĉi tie por via patro kaj via patrujo, kaj anstataŭ fromaĝo kaj lakto vi manĝos ambrozon kaj trinkos nektaron; fakte vi mem distribuos ĝin, verŝante al ni ĉiuj; sed ĉefe: ne plu homo, sed senmortulo vi fariĝis, kaj vian stelon mi igos brili plej klare en la ĉielo — vi estos plene feliĉa.

Ganimedo: Kaj se mi deziras ludi, kiu ludos kun mi? Sur Ida ja estis multaj samaĝuloj.

Zeŭso: Ankaŭ tie ĉi vi havos kunludanton: jen Eroso kaj multege da ludiloj. Nur kuraĝon, estu gaja kaj ne daŭre sopiru plu suben.

4 Ganimedo: Sed kiel mi povos utili al vi? Aŭ ĉu ankaŭ ĉi tie mi povos paŝti gregojn?

Zeŭso: Ne, sed vi verŝos la vinon, kaj atentos pri la nektaro kaj ĝenerale prizorgos la simpoziojn.

Ganimedo: Tio ne malfacilas. Mi ja scias verŝi lakton kaj disdoni la lignajn ujojn.

Zeŭso: Ho jen — denove li parolas pri lakto, opiniante ke li priservos mortemulojn. Tie ĉi estas la ĉielo, kaj ni trinkas, kiel mi diris, nektaron.

Ganimedo: Ĉu ĝi pli dolĉas, Zeŭso, ol lakto?

Zeŭso: Baldaŭ vi vidos. Tuj kiam vi ĝin estos gustuminta, vi ne plu deziros lakton.

Ganimedo: Kaj kie dumnokte mi dormos? Ĉu ĉe tiu knabo Eroso?

Zeŭso: Ne — ĝuste tial mi ja rabis vin, ke kune ni dormu.

Ganimedo: Ĉu vi ne sola povas ekdormi, ĉu prefere vi dormas kun iu alia?

Zeŭso: Jes, kun iu kiel vi, Ganimedo, tiel bela.

5 Ganimedo: Kiom do utilas beleco por via dormo?

Zeŭso: Ĝi enhavas ian sorĉon kaj alportas ĝin pli kviete.

Ganimedo: Strange! Mia patro ĉiam abomenis dormi kun mi kaj matene plendis, ke mi forigis lian dormon per mia turniĝado, piedbatoj kaj parolado dumdorma. Tial kutime li sendis min dormi ĉe panjo. Jen vi, se nur pro tio, kiel vi diras, vi forkaptis min, resendu min do tuj al la tero, aŭ neniam vi plu dormos. Mi ja ege vin ĝenos per mia daŭra turniĝado.

Zeŭso: Per tio vi preparus al mi nur plezuregon, se mi maldormus kun vi, ofte kisante kaj vin brakumante.

Ganimedo: Vi mem do decidu. Sed eble mi ekdormos, dum vi min ĉirkaŭkizados.

Zeŭso: Tiam mi scios, kion fari! Sed nun forportu lin, Hermeso, trinkigu lin ĝis senmorteco kaj tiam rekonduku lin por ke li priverŝu al ni. Sed unue instruu al li, kiel manipuli pokalon.

11 (7) Dialogo inter Hefajsto kaj Apolono

Hefajsto: 1 Ĉu vi jam vidis, ho Apolono, la ĵusnaskitan bebon de Maja, kiel bela ĝi estas kaj alridas ĉiujn? Klare, ke fariĝos vera trezoro!

Apolono: Tiu bebo, ho Hefajsto, ĉu vera trezoro? Nu, ĝi jam estas multe pli aĝa ol Iapeto, se temas pri friponaĵoj.

Hefajsto: Kion ĝi povis misfari? Ĝi apenaŭ naskiĝis!

Apolono: Demandu Pozidonon – ĝi rabis lian tridenton – aŭ Areson – ĝi rabis lian glavon el ĝia ingo – por ne menci i min mem – ĝi senarmiligis min, kaptante sagojn kaj arkon.

Hefajsto: 2 Tiu etulo ĉu ĉion ĉi? Ĝi apenaŭ povas stari, kaj estas ankoraŭ en bebaj vindaĵoj.

Apolono: Vi mem vidis, ho Hefajsto, li nur venu al vi!

Hefajsto: Li jam estis ĉe mi.

Apolono: Kaj kio okazis? Ĉu ankoraŭ ĉiujn ilojn vi havas? Nenio perdita?

Hefajsto: Ĉio estas tie kaj en ordo, Apolono.

Apolono: Kiel ajn, vere atente trakontrolu.

Hefajsto: Ho Zeŭso! La tenajlon mi ne plu vidas.

Apolono: Atente traserĉu la volvaĵojn de la bebo.

Hefajsto: Ĉu jam enutere li ekzercis sin, ke tiel lerte li ŝtelas?


Apolono: 3 Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis lin paroli? Li jam havas langon ege lertvoĉan kaj parolfluan. Kaj li volas fariĝi nia mesaĝista knabo. Kaj hieraŭ Eroson li defiis por lukti kun li, kaj iel li ekkaptis ties piedojn el sub li kaj metis lin planken. Dum oni ankoraŭ gratulis lin, kaj Afrodita lin brakumis pro la venko, li ŝtelis ŝian zonon, kaj antaŭ ol Zeŭso ĉesis ridadi, ankaŭ ties sceptron krome! Kaj se lia fulmo ne estus tro peza kaj timige varmega, ankaŭ tiujn li estus preninta.

Hefajsto: La etulo estas tro tranĉa por vortoj, laŭ via rakonto.

Apolono: Jes, kaj li ankaŭ jam pruvis sin muzikema.

Hefajsto: Kiel tion vi povas aserti?

Apolono: 4 Ie li trovis mortintan testudon, kaj el ĝi fabrikis al si muzikilon; brakojn li ja



<https://www.freepng.fr/>

fiksis sur ĝin, kaj jugon, krome ŝraŭbojn li enmetis, kaj sep kordojn li streĉis trans ĝi; ĉarman melodion, ho Hefajsto, per tio li ludis, kaj bone agorditan, tiel ke eĉ mi verdiĝis pro ĵaluzo malgraŭ mia multjara praktikado sur la harpo. Eĉ nokte, Maja rakontis al mi, li ne plu volis resti enĉiele, sed volis subiri rekte en Hadeson pro scivolemo – ion rabi de tie, sendube. Flugilojn li havas sur siaj piedoj, kaj li petis iun fari por li bastonon kun mirindaj potencoj, kaj per ĝi la animojn de mortintoj li kondukas suben.

Hefajsto: Mi donis tion al li kiel ludilon.

Apolono: Nu, tion li repagis al vi.

Hefajsto: Bone, ke vi memorigas min. Mi iros repreni ĝin, se, kiel vi diras, ĝi estas trovebla en liaj vindaĵoj.

12 (9) Dialogo inter Pozidono kaj Hermeso

1 Pozidono: Ho Hermeso, ĉu mi povos paroleti kun Zeŭso?

Hermeso: Nepre ne, Pozidono,

Pozidono: Tamen, anoncu min al li.

Hermeso: Mi diras, li ne estu ĝenata; estas malĝusta momento, pormomente vi ne povos vidi lin.

Pozidono: Kial do? Ĉu li kunestas kun Hera?

Hermeso: Ne, estas io alia.

Pozidono: Mi jam komprenas! Ganimedo estas ene.

Hermeso: Ankaŭ ne tio. Sed li ne sentas sin bone.

Pozidono: Kiel, Hermeso? Vi diras ion teruran!

Hermeso: Mi hontas diri, tia ĝi estas.

Pozidono: Ne necesas antaŭ mi — mi estas ja via onklo.

Hermeso: Li ĵus... naskis bebon, Pozidono.

Pozidono: Malaperu vi! Li naskis, ĉu li? Kaj kies idon? Li ja ne estas kaŝe herm-afrodita? Sed ankaŭ lia ventro neniel signalis, ke li gravedas...

Hermeso: Vi pravus. Ja ne ĝi portis la feton.

Pozidono: Mi scias jam: el la kapo li naskis denove, samkiel Atenan! Li havas vere naskeman kapon.

Hermeso: Ne, ne! La idon de Semela li portis en la femuro.

Pozidono: Ho la belulo! Li naskas bebojn el iu ajn parto de sia korpo! Sed kiu estas tiu Semela?

2 Hermeso: Tebanino, unu el la filinoj de Kadmo. Kunestante kun ŝi, li faris ŝin graveda.

Pozidono: Kaj poste, Hermeso — *li* do naskis anstataŭ ŝi...?

Hermeso: Ekzakte ja, kvankam ŝajnas al mi nekutime. Ĉar ĉe tiu Semela enŝteliĝis Hera — vi ja scias kiel ĵaluzo ŝi estas — kaj konvinkis ŝin, ke ŝi petu Zeŭson, ke li venu al ŝi kun tondroj kaj fulmoj. Kiam li do obeis kaj aperis kun sia fulmotondro, ekbrulis la pajla tegmento, kaj Semela mem konsumiĝis en la flamoj. Al mi li ordonis, ke mi ektranĉu la ventron de la virino kaj metu en lin la feton (ĝi estis sepmonata kaj ne jam plenkreskis); kaj kiam mi ekagis, li disŝiris al si la femuron kaj enmetis ĝin, por tie maturiĝi, kaj nun, jam en la tria monato, li naskis ĝin kaj sentas sin ne bone pro la naskospasmoj.

Pozidono: Kie nun estas la bebo?

Hermeso: Mi portis ĝin al la monto Nisa kaj donis ĝin al nimfoj por eduki. Dionizo li nomiĝas.



<https://www.freepng.fr/>

Pozidono: Ĉu mia frato do estas ambaŭ por tiu Dionizo, patro kaj patrino?

Hermeso: Ŝajnas. Mi foriras, mi devos alporti akvon por purigi lian vundon kaj por fari ĉion necesan al akuŝinto.

13 (8) Dialogo inter Hefajsto kaj Zeŭso

Hefajsto 1 Kion, ho Zeŭso, vi volas, ke mi faru? Mi ja venis, ĉar vi ordonis, kun mia hakilo ĵus tiom akriĝita, ke eĉ tra ŝtonojn mi tranĉos per unu bato.

Zeŭso Bonege, ho Hefajsto. Nun frapu mian kranion en du pecojn.

Hefajsto Ĉu vi volas eltrovi, ĉu mi frenezas? Diru, kion vere vi deziras de mi.

Zeŭso Ekzakte tion: fendu mian kranion. Se vi ne obeas, mi estos tre kolera – kaj vi ja scias, kia tiam mi estas. Bato per tuta via forto. Ek do, rapide! La naskospasmoj, kiu ŝrikas tra mia cerbo, murdas min.

Hefajsto Atentu, Zeŭso, alie mi vundos vin. Mia hakilo estas tre akra, kaj ne sensange nek laŭ Elitŭia ĝi helpas ĉe la naskiĝo.

Zeŭso Haku do, Hefajsto, ne timu! Mi certas, ke estas bone por mi.

Hefajsto En ordo. Kion alian mi faru? Estas ja via ordono. Huj, kio estas tio? Junulino en armaĵo! Ne estis eta problemo en via kapo. Ne mirige, ke vi estis tiel koleriĝema, kovante en via cerbo grandan junulinon kiel tiu – kaj krome kun tuta kiraso! Ne nur kapon tie vi havis, sed tutan kazernon, dum ni ne sciis. Ŝi eksaltas en militdanco, skuante la ŝildon, celdirektante la lancon, plena je batal-spirito. Kaj plej mirige, vidu kiel bela kaj adolta ŝi fariĝis en tiel malmulte da tempo. Grizajn okulojn ŝi havas, sed ili bele agordiĝas kun ŝia kasko. Do, Zeŭso, nun pagu por mia servado kiel akuŝisto, prezentante ŝin al mi kiel edzinon.

Zeŭso Tio ne estas ebla. Ŝi postulas resti poreterne sola, kvankam miaflanke mi ne kontraŭus.

Hefajsto Nur tion mi esperis aŭdi. La ceteron lasu al mi. Mi ŝin kunrabos.

Zeŭso Faru tion, se vi povas. Sed mi certas, ke ion maleblan vi deziras.

14 (10) Dialogo inter Hermeso kaj Helioso

Hermeso 1 Kara Helioso, Zeŭso diras, ke hodiaŭ vi ne veturos, nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Vi devos resti hejme, kaj tuta tiu tempo devos esti unu longa nokto; la Horoj do povos maljungi siajn ĉevalojn, kaj vi povos estingi vian fajron kaj ĝui belan longan nokton.

Helioso Novaĵo nenatura estas, Hermeso, kiun vi venas diskonigi. Ho, ion tian neniam mi aŭdis! Li ja ne pensas, ke mi forlasas mian irejon aŭ iras ekster la limoj, ĉu ne? Li ankaŭ ja ne ĉagreniĝas je mi, ke tial li decisis fari la nokton trioble longa?

Hermeso Tute ne. Kaj tio ne daŭros poreterne; sed estas lia persona deziro, ke li havu nokton pli longan ĉi-foje.

Helioso Kie nun li estas? De kie vi estis sendita kun tiu ĉi mesaĝo?

Hermeso El Boetio, kara Helioso, de ĉe la edzino de Amfitriono. Li estas kun ŝi. Li amas ŝin.

Helioso Ĉu unu nokto do ne sufiĉas?

Hermeso Tute ne. De ĉi sekskuniĝo devas iu veni, kiu pretas por grandaj kaj multaj Laboroj; oni do ne povas fari juston al tio en nur unu nokto.

Helioso 2 Nu, espereble li faros sukceson el tiu laboro, kvankam, mi konfesu, io tia ne okazis en la tempo de Krono (estas bone, ni estas solaj). Tiu neniam dormis for de Rea, nek forlasis la ĉielon por lito en Tebo, sed tiuepoke tago ĉiam estis tago, kaj nokto – nokto, ĉio strikte en propraj limoj, sezonoj kaj ĉio, neniam kun tiaj strangaj ŝanĝiĝoj. Ne, *Krono* neniam iel rilatis al mortemulino. Nun, tamen, por iu mizera inaĉo, ĉio devas esti turnita kaposuben, miaj ĉevaloj fariĝas rigidaj manke de moviĝado, la vojo iĝas malglata, tri tagojn senintermite ne uzata, kaj

la homoj havas teruran tempon en ĉi mallumo. Tion ili ekhavas la ĉi amaferoj de Zeŭso! Ili atendu en la mallumo dum horoj, ĝis li finis sian laboron pri la ulo, kiun vi menciis.

Hermeso Silentu, ho Helioso, aŭ viaj paroloj kaŭzos problemojn. Mi nun ekiras al Selena kaj al la Dormo, kaj al ili la ordonojn de Zeŭso mi transdonos. Ŝi prenu la tempon kaj li ne forlasu la homojn, por ke ili ne konsciu, ke la nokto daŭras tiel longe.

15 (13) Dialogo inter Zeŭso, Asklepio kaj Heraklo

Zeŭso 1 Ĉesu, ho Asklepio kaj Heraklo! Vi aspektas kiel du homoj. Tio ne konvenas ĉe la tablo de la Dioj.

Heraklo Sed, Zeŭso, ĉu vere tiun farmaciiston vi volas sur kuŝloko pli alta ol la mia?

Asklepio Je Zeŭso: mi ja estas pli bona ol vi.

Heraklo Kiel, ho konfuzito! Ĉar Zeŭso vin trafis fulme pro via malpia agado, sed nun senmortecon vi ja rricevas, – ĉu nun li vin kompatas?

Asklepio Eble vi forgesis, Heraklo, kiel sur la monto Ojta ankaŭ vi mort-bruligis vin, ke nun vi mokas min, ke mi cindriĝis?

Heraklo Tio ne signifas, ke niaj vivoj estis samaj. Mi estas filo de Zeŭso, kaj ĉiujn tiujn Laborojn mi plenumis, purigante la mondon, venkante monstrojn, punante violentulojn; sed vi estas nura drogotranĉisto kaj ĉarlatano, eble utila inter suferantaj homoj por disdoni trinkaĵojn, sed sen ajna vireca faro por montri.

Asklepio Ĉu nenio direblas pri tio, kiel mi kuracis viajn brulvundojn, kiam antaŭnelonge vi alvenis duone bruldifektita? kiel via korpo estis tute aĉa, inter la ĥitono kaj poste la fajro? Krome se nur tio: mi ankaŭ neniam estis sklavo kiel vi, neniam kardis lanon en Lidujo, en purpura vestaĵo, batata per la ora sandalo de Omfala. Eĉ pli: neniam mi murdis mian edzinon kaj miajn infanojn en atako de frenezo.

Heraklo Se vi ne ĉesas insulti min, tre baldaŭ vi konstatos, ke via senmorteco ne multe helpos. Mi ekkaptos vin kaj ĵetos vin kapantaŭen el la ĉielo, tiel ke vian kranion vi rompos, kaj eĉ la sanigisto Apolono tiam ne multe povos fari por vi.

Zeŭso Ĉesu! Ne perturbu mian festenon, aŭ vin ambaŭ mi forsendos de la tablo. Sed estas nur racie, Heraklo, ke Asklepio havu lokon pli altan ol vi, ĉar li mortis antaŭ ol vi.

16 (14) Dialogo inter Hermeso kaj Apolono

Hermeso 1 Kial tiel sombra vi estas?

Apolono Mi estas malfeliĉa en la amo, Hermeso.

Hermeso Tio estas malĝojiga. Sed kio kaŭzas tiun vian malfeliĉon? Ĉu vi ankoraŭ lamentas pro Dafna?

Apolono Ho ne! Mi nun lamentas pro mia Lakona amato, la filo de Ojballo.

Hermeso Ĉu mortis Hiacinto?

Apolono Jes ja!

Hermeso Kiu tion faris, Apolono? Kiu estis tiel neatingebla por sorĉo, ke li mortigis tiun amindan knabon?

Apolono Mi mem, propramane.

Hermeso Kio? Ĉu vi frenezas, Apolono?

Apolono Ne. Estis malfeliĉa akcidento.

Hermeso Kiel? Rakontu, kio okazis.

Apolono 2 Li lernis ĵeti la diskon kaj mi instruis al li, sed tiu damna vento Zefiro tion faris; jam longtempe li amis lin, sed la knabo ne volis atenti pri li. Nu, kiel kutime, mi ĵetis la diskon, kaj Zefiro de la Taugeto ekflugis kaj ĵetis ĝin sur la kapon de la knabo. Sango ekfluis, kie ĝi lin trafis, kaj li tuj mortis, la kompatindulo. Mi refulmis al Zefiro kaj forpelis lin, tute ĝis

la monto. La knabon mi igis enterigi en Amiklo, kie lin falĉis la disko, kaj la teron mi igis kreskigi el lia sango la plej belan kaj dolĉan floron, kiu portas la literojn de lamentado pri la mortinto. Ĉu vi pensas, ke estas senkaŭze, ke mi ne estas konsolebla?

Hermeso Jes, Apolono: vi ja sciis, ke mortemulon vi prenis kiel amaton; do ne lamentu pri lia morto.

17 (15) Dialogo inter Hermeso kaj Apolono

Hermeso 1 Mi kredas, ke nura kriplulo kaj nura artisto kiel li edziĝis al la du plej belaj, Afrodita kaj Ĥarisa!

Apolono Tio estas nura hazardo, karulo! Sed kio mirigas min, estas, ke ili eltenas vivi kun li, specife se ili vidas lin trempita je ŝvito, kurbiĝanta super sia forno, kun rusto sur la tuta vizaĝo. Kaj tamen ili brakumas tiun ulon, kisas lin kaj dormas kun li.

Hermeso Tio ĝenas ankaŭ min, kaj faras min ĵaluza pri Hefajsto. Vi povas paradi pri via bela hararo, Apolono, kaj ludi sur via harpo, fieri pri via belo, kaj mi pri mia bela aspekto kaj mia liro, sed kiam temas pri dormotempo, ni dormu solaj.

Apolono 2 Kutime mi estas malfeliĉa en la amo; minimume miajn du specialajn gekarulojn mi perdis, Dafnan kaj Hiacinton. Dafna tiom malamis min, ke prefere ŝi ŝanĝiĝu en arbon ol partopreni mian apudecon, kaj Hiacinton mortigis tiu disko. Kaj nun mi portas florkronojn.

Hermeso Kaj foje mi kun Afrodita – sed mi ne fanfaronu.

Apolono Mi scias. Oni diras, ke ŝi donis al vi Hermafroditon. Sed diru al mi, se vi povas, kial Afrodita kaj Ĥarisa ne ĵaluzas inter si.

Hermeso 3 Kara Apolono, ĉar Ĥarisa estas kun li sur Lemno, kaj Afrodita enĉiele. Krome, Afrodita pleje plektiĝas kun Areso, kaj sendube apenaŭ interesiĝas pri tiu forĝisto.

Apolono Ĉu vi pensas, ke Hefajsto scias pri ĉi tio?

Hermeso Kompreneble ja, sed kion li povas fari, se li vidas ke Areso estas tiel bela junulo kaj samtempe militisto? Li do restas kvieta. Sed li minacas, ke iun kaptilon li inventos por ili, por kapti ilin en reto sur la lito.

Apolono Tio estas nova por mi; sed volonte mi mem falos en tiun kaptilon.

18 (16) Dialogo inter Hera kaj Latona

Hera Kara Latona, tre belas la infanoj, kiujn vi donis al Zeŭso.

Latona Ja ne ĉiuj, kara Hera, ni povas naski infanojn kiel estas Hefajsto.

Hera Sed tiu, kvankam kripla, ja estas ege utila! Li estas mirinda fakulo, kaj bone elkonstruis nian ĉielon, kaj li edziĝis je Afrodita kaj por ŝi tre aktivas, sed koncerne viajn ambaŭ infanojn – la unua estas iom tro vireca kaj vagadas tra la montaro, kaj lastatempe migrante eĉ ĝis en Skitujon, ĉiuj scias kiajn aferojn ŝi tie manĝas, fremdulmurdante kaj imitante la Skitojn mem, kiuj estas ja antropofagoj; sed Apolono ŝajnigas sin ĉioscia, kaj montras sin kiel arkpafiston, muzikiston, kuraciston kaj aŭguriston, kaj eĉ fondis orakolon en Delfo, kaj en Klaro, kaj en Kolofono, kaj en Didimo, trompante siajn klientojn, liverante komplikajn respondojn, torditajn inter du eblaj signifoj, tiel ke ne estas risko



<https://www.freepng.fr/>

erari. Tiel li riĉiĝas, ĉar estas amasoj da stultuloj, kiuj volonte fariĝas viktimoj de trompisto. Tamen pli inteligentaj homoj travidas tiajn misterotrompaĵojn. La profeto mem ne sciis, ke sian karulon li mortigos per tiu disko, kaj ne antaŭdiris, ke Dafna forkuros de li, malgraŭ ĉiu lia beleco kaj mirinda hararo. Do mi ne komprenas, kial vi pensis, ke vi havas pli bonajn infanojn ol Nioba.

Latona 2 Rilate al tiuj miaj infanoj, la fremdulmurdintino kaj la pseŭdoprofeto, kiel vi nomas ilin, mi scias, kiel vin ĝenas vidi ilin inter la Dioj, kaj precipe, se la unua estas laŭdata pro sia beleco, kaj pro sia muzikado ĉe la simpozioj la dua estas admirata de ĉiuj.

Hera Ho Latona, vi igas min ridi. Kiu admirus tiun muzikiston, kiun pri muzikado venkus Marsiaso kaj vivantan senfeligus per siaj propraj manoj, se la Muzoj preferus juĝi honeste? Sed nun oni trompis kaj false ĉe la voĉdonado li perdis, la kompatindulo, kaj devis morti. Kaj via ĉarma virgulineto estas tiel bela, ke kiam ŝi malkovris, ke Akteono ŝin vidis, ŝi timis ke la junulo disrakontos al ĉiuj, kiel aĉa ŝi estas, kaj incitis siajn hundojn kontraŭ li. Por mi ne gravas, diri ke, mem estante virgulino, neniam ŝi estus akuŝistino.

Latona Ho Hera, vi grande pensas, ĉar vi vivas kun Zeŭso kaj dividas lian tronon, kaj tiel vi ne atentis, se aliajn vi ofendas. Sed ne longe daŭros antaŭ ol ree mi vin vidos plori – la sekvan fojon, kiam denove li subeniros al la tero kiel taŭro aŭ cigno.

19 (11) Dialogo inter Afrodita kaj Selena

Afrodita 1 Kion nun mi aŭdis pri vi, ho Selena? Onidire, ĉiufoje kiam vi atingas Karion, vi haltigas vian bestaron kaj rigardas al Endimiono, kiu ekstere dormas laŭ ĉasista maniero, kaj foje vi eĉ forlasas vian irejon por subeniri al li.

Selena Demandu vian propran filon, ho Afrodita; li en tio estas kulpa.

Afrodita Lasu; petolulo li estas. Vidu, kion li faris al mi, sia propra patrino. Unue li malsuprenigis min al Ida por ĉasi Anĥizon la Trojanon, kaj poste al Monto Libano, al tiu Asiria knabo; poste Persefonan li enamigis je tiu knabo, kaj rabis al mi la karulon. Tial ree kaj ree mi minacis, ke se li ne ĉesos, mi disbatos lian pafilaron kaj deŝiros liajn flugilojn. Lastfoje mi eĉ prenis mian sandalon por lia postaĵo. Sed iel, kvankam pormomente li timas, kaj petas pardonon, ne longe daŭras ĝis ĉion li estas forgesinta. 2 Sed diru al mi: ĉu Endimiono estas bela? Se jes, vi vere estas senkulpa.

Selena Mi trovas lin vere tre bela, Afrodita, speciale se li dormas kun sia mantelo sub si sur la roko, kun la lancoj ĝuste elŝoviĝantaj el lia mano, dum tiujn li tenas, kaj la dekstra mano kurbigita ĉirkaŭ la kapon kaj ĉirkaŭanta la vizaĝon, formas belan bildon, dum senstreĉe li dormas kaj plej imageble kore li spiras. Tiam piedpinte mi aliras rapide, por ne vekti lin pro timo, kaj tiam – vi ja povas diveni; ne necesas rakonti, kio poste okazas. Vi ja ne forgesu, ke mi mortas pro amo.

20 (12) Dialogo inter Afrodita kaj Eroso

Afrodita 1 Ho mia filo Eroso, atentu, kion vi faras. Mi ne celas surtere, kie la homojn vi ekcitas agi kontraŭ si mem aŭ reciproke, sed ankaŭ enĉiele, kiam Zeŭson vi montras polimorfa, ŝanĝante lin en kion ajn hazarde vi ŝatas, kaj kiam Selenan vi forkaptas el la ĉielo, Helioson foje lasas for-revadi flanke de sia Klimena, forgesante pri sia ĉevalkurado. Faru sentime, kion vi ŝatas pri mi, mi ja estas via patrino. Sed vi eĉ havis la trokuraĝon, ke Rean mem, kiu jam estas grizharulino kaj patrino de tiom da Dioj, vi igis pederastiĝi kaj sopiri pri tiu Frigia knabo, kaj nun vi frenezigis ŝin, kaj ŝi jungis aron da leonoj, kaj kunprenis siajn Koribantojn, kiuj same estas frenezaj, kaj kun ili ŝi nun vagadas supren kaj suben ĉe la monto Ida. Ŝi kriadas pri Atiso, dum la Koribantoj interfrapas siajn armilojn per glavoj, aŭ disŝutas siajn harojn kaj freneze ekkuras tra la montaro, blovas la kornojn, tondras sur la tamburoj, aŭ tintigas la cimbalojn; estas nura ĥaosa frenezo ĉie sur la Idamonto. Do ĉion mi timas; jes, via patrino timas pri tio, kio okazas, ĉar vi estas nura ĝeno, kaj mi timas, ke foje Rea, ekfrezeziĝe, aŭ pli verŝajne ankoraŭ klaramense, ordonos al siaj Korubantoj kapti vin kaj meti vin antaŭ la leonojn. Tion mi timas, se vin mi vidas tiel kuri tiajn riskojn.



Eroso 2 Ne timu, panjo! Pri la leonoj mi jam kutimas. Ofte mi eksidas sur ilia dorso, kaptas iliajn kolharojn kaj rajdas sur ili, kaj ili ludas kun mi, lasas min meti la manon en la buŝon kaj lekas min tutaĵe, kaj poste lasas elpreni ree la manon. Sed kion tempon Rea havos por atenti pri mi? Ŝi pensadas daŭre nur pri Atiso. Kiel ajn, kian malbonon mi faras, montrante kio estas belo? Estas afero de la rigardanto reteni la manojn de tio, kio estas bela; oni pro tio ne kulpigu min. Aŭ ĉu prefere Areson vi ne plu amu, kaj li ĉesu ami vin?

Afrodita Kiel saĝa vi estas: ĉion vi ja regas, ĉu ne? Sed foje memoru miajn dirojn!

21 (17) Dialogo inter Apolono kaj Hermeso

Apolono 1 Kial vi ridas, ho Hermeso?

Hermeso La plej ridiga, kion mi vidis, Apolono.

Apolono Diru do, ke ankaŭ mi aŭdu kaj kunridu.

Hermeso Afrodita estas surprizita kun Areso, kaj Hefajsto kaptis ilin ambaŭ.

Apolono Kiel? Sonas kvazaŭ bonan historion vi havas por rakonti.

Hermeso Delonge, mi pensas, pri tio li sciis, kaj li ĉasis ilin, kaj ĉirkaŭ la lito nevideblajn ŝnurojn li pendigis, kaj foriris al sia kameno. Poste Areso kaŝe eniris, mi supozas, sed Helioso lin vidis kaj sciigis al Hefajsto. Kiam ili do suriris la liton, estis en la agado kaj iĝis inter la kaptilojn, la ĉenoj faldiĝis sur ilin, kaj Hefajsto ekstaris tie. Afrodita do – hazarde nuda – havis nenion por kovri sian seksparton, sed Areso unue provis eskapi kaj esperis disŝiri la ĉenojn, sed poste, komprenante ke li estas kaptito, li petegis.

Apolono 2 Kaj kio poste? Ĉu Hefajsto liberigis ilin?

Hermeso Ankoraŭ ne, sed li kunvokis la Diojn, kaj montris al ili la adulton. Nudaj tie ili ambaŭ kuŝas, kunligitaj nudaj, kaŝante sian vizaĝon kaj ruĝiĝante, kaj mi devas diri, ke mi trovas tion tre agrabla vidaĵo. Nu, ili estas preskaŭ en agado.

Apolono Ĉu tiu forĝisto ne hontas montri tiun insulton al lia nupto?

Hermeso Ne, absolute ne. Li tie staras ridanta pri ili. Mi miaflanke, se diri la veron, envias je Areso, ne nur ke li konkeris la plej belan Diinon, sed eĉ estas kunĉenita al ŝi.

Apolono Ĉu vi volas diri, ke en tiuj cirkonstancoj al vi ne gravus esti ĉene ligita?

Hermeso Ĉu vi, kara Apolono? Venu, ekrigardu! Se vi ne havus la saman deziron, ilin rigardante, certe vi meritus mian laŭdon.

22 (18) Dialogo inter Hera kaj Zeŭso

Hera 1 Mi hontus pri tia filo, ho Zeŭso, se estus mia. Li estas molaĉa, tiel degenerinta stultulo, metante rubandojn en la hararo, foruzante plimulte sian tempon kun stultaj virinoj, mem pli ineca ol iu ajn elinter ili, dancante laŭ tamburoj, flutoj kaj cimbaloj. Jes, li similas je io ajn, krom je vi, Zeŭso, lia patro.

Zeŭso Jes, Hera, tiu portanto de inaj rubandoj, tiu ‘pli granda softulo ol iu ajn ino’, submetis Lidujon kaj la loĝantaron de Tmolo, kaj submetis la Trakojn; ekspedicion li faris kontraŭ Hinduĵanoj kun tiu armeo da virinoj, venkanta iliajn elefantojn kaj vizitante ilian landon, kaj kiam ilia reĝo kuraĝis leviĝi kontraŭ li nur iomete, li faris lin kaptito kaj forportis lin; kaj dum ĉion ĉi li faris, la tutan tempon li dancadis kaj baŭmis, kaj nur uzadis sorĉbastonojn el hedero, ebria kaj ensorĉita kiel li estis, laŭ via esprimo. Kaj se iu kuraĝas komenti pri liaj ritoj aŭ insulti lin, li punas tiun pendigante lin sur vinberbranĉoj kaj igas la patrinon de tiu viro disŝiri lin en pecojn, kvazaŭ li estus cervido. Ĉu vi ne vidas kiel virece kuraĝa, kaj tute laŭ sia patro li estas? Se tiujn agadojn akompanas ĝojo kaj softa vivado, kial grumbli je li, specife se vi imagus, kia li estus se sobra, se ĉi tion li jam faras dum iom ebrieta?

Hera 2 Ŝajnas ke vi plene apogas lian inventon – la vinberon kaj ties sukcon – kvankam vi ja vidas, kiel ebriuloj kondutas, skuiĝante kaj fariĝante perfortemaj, tute frenezigitaj de sia drinkaĵo. Prenu ekzemple Ikarion, la unuan al kiu la vinon li donis – li estis mortigita de la kuntrinkantoj per pioĉoj.

Zeŭso Tio nenien kondukas. Ĉar ne la vino nek Dionizo mem faris tion, sed troa drinkado, kaj la forglutado de la nemiksita vino. Sed la viro, kiu modere trinkas, fariĝas pli gaja kaj pli bona kunulo, kaj neniam traktas iun el siaj amikoj kiel Ikario estis traktita. Mi vidas, Hera, kio estas malbona kun vi; vi ankoraŭ ĵaluzas kaj ne forgesis pri Semela, se ĵuĝi laŭ tio, kiel vi kondamnas Dionizon.

23 (19) Dialogo inter Afrodita kaj Eroso

Afrodita 1 Kial, ho Eroso, ĉiujn ceterajn Diojn vi venkis – Zeŭson, Pozidonon, Apolonon, Rean, min mem, vian patrinon –, sed vi detenas vin nur de Atena kaj por ŝia torĉo fajron vi ne havas, via sagujo estas sena je sagoj, vi mem sen pafilo kaj sen celado?

Eroso Mi ŝin timas, panjo. Ŝi timigas min per siaj flagretantaj okuloj, kaj ŝi terure similas viron. Ja, kiam mian arkon mi vibrigas kaj sekvas ŝin, mi ektimas je ŝia unua eksvingo de la hartufo, kaj tuj ektimas kaj lasas miajn sagojn fali.

Afrodita Ĉu Areso ne estas multe pli timiga? Tamen lin vi senarmiligis kaj venkis.

Eroso Ne. Li bonvenigas min kaj instigas, sed Atena ĉiam kolere rigardas al mi. Foje kun mia torĉo mi fuĝis apud ŝin, tuj ŝi diris: “Se vi venas tro apude, ho kiom mi estas la filino de Zeŭso, mi ja trapikos vin per mia lanco, aŭ ekkaptos vin je la piedo kaj ĵetos vin en Tartaron, aŭ propramane mi disŝiros vin en pecetojn kaj” – multajn minacojn samspecajn ŝi ĵetis al mi. Krome tiel nigre ŝi rigardis al mi, kaj ho – sur sia brusto ŝi portas tiun timigan vizaĝon kun la senpent-hararo – tio pleje min timigas. Anserhaŭton tio donas al mi, kaj tuj kiam mi vidas ĝin, mi forfuĝas.

Afrodita 2 Sed ĉu Atenan vi do timas, kiel vi diras, kaj Gorgonon, kvankam la fulmon de Zeŭso vi ne timas? Sed kial la Muzoj por vi restas nevundeblaj kaj ekster viaj sagoj? Ĉu ankaŭ tiuj skuas plumojn kaj montras siajn Gorgonojn?

Eroso Tiujn mi respektas, panjo. Ili estas tiel honorindaj, ĉiam kun io por pripensi, aŭ okupitaj pri sia muziko. Ofte mi staras apud ili, ravita de ilia muziko.

Afrodita Lasu ilin do, se ili estas tiel solenaj. Sed kial Artemisan vi ne vundas?

Eroso Tute neblas kapti ŝin; ĉiam ŝi foriĝas trans la montojn. Krome, ŝi nun havas propran amon.

Afrodita Pri kio temas, infano mia?

Eroso Ĉasas ŝi cervojn kaj cervidojn, postkurante ilin kaj kaptante, aŭ mortpafante ilin. Nur tio okupas ŝin. Sed tiu ŝia frato, kvankam ankaŭ li estas arkpafisto kaj traf certa --

Afrodita Mi scias, karulo, ofte vi trafis lin per viaj sagoj.

24 (25) Dialogo inter Zeŭso kaj la Suno

Zeŭso 1 Kion vi faris, ho plej aĉa el la Titanoj? Ĉion surtere vi neniigis, konfidante vian ĉaron al stulta knabo. Kelkajn lokojn li bruldifektis veturante tro apude al la tero, kaj aliloke ĉion li frostigis, komplete forprenante de tie la varmon, metante ĥaoson kaj konfuzon en la tuta vasta mondo. Ho, se mi ne konscius, kio estas okazonta, kaj debatus lin per mia fulmo, nenio plu estus restinta el la homaro. Vere povran veturiston vi metis en vian ĉaron – eĉ se li estis belaspekta!

Suno Mi eraris, Zeŭso, sed bonvolu ne koleri min, ke mi cedis al mia infano, kiu multe petadis. Mi ja ne povis antaŭvidi, ke rezultos tiom da malbono.

Zeŭso Ĉu vi ne sciis, kiel delikata operacio estas, kaj ke ĉe plej eta devojiĝo ĉio pereos? Ĉu vi ne sciis, kiel la ĉevaloj plenas je fervoro kaj bezonas ekzaktan kondukadon? Iom tro malstrikte, kaj ili forigas la bridstangon el inter la dentoj, kiel kompreneble kun li ili faris, forkurante kun li, jen dekstren, jen maldekstren kaj suben supren laŭplaĉe, kaj li ne sciis kiel trakti ilin.

Suno 2 Ĉion ĉi mi sciis. Tio ja estas, kial tiel longe mi rezistadis kaj ne volis konfidi al li la kondukadon. Sed kiam li ekploris kaj petegis, kaj lia patrino Klimena aldone, mi instalas lin en la ĉaro kaj instruis lin, kiel konduti, kiel longe li supreniru, lasante kuregi la ĉevalojn, kiel longe li descendu denove, kaj kiel teni la bridojn kaj regi sian impetan ĉevalaron. Jes, kaj mi avertis lin, kiel danĝere estas ne konduki ĝuste, sed la kompatindulo kun tiom da fajro suriris kaj subenrigardis trans la vakua spaco, perdis la sinregadon kaj ĉu mirige? Tiam la ĉevaloj, sentante, ke ne estas mi sur la ĉaro, ne plu submetiĝis al la knabo, kaj forlasis sian irejon kun ĉi teruraj rezultoj. Li perdis la bridojn – mi supozas, ke li timis elfali, kaj ekkaptis la apogrelon. Sed, ho Zeŭso, sian punon li jam ricevis kaj mia ĉagreno estas sufiĉe da puno por mi.

Zeŭso Sufiĉe da puno, vi diras – por tia misfaro? Nu jes, ĉi-foje mi pardonas vin, sed se ree ion tian vi misfaras, aŭ eksendas iun alian por anstataŭi vin, mi kaptos miajn fulmojn, kiuj pli varmas ol via fajro. La knabon liaj fratinoj entombigu apud Eridano, la rivero kien li falis post la elseliĝo. Ili verŝu plorojn el ambro sur lin kaj ŝanĝiĝu en poplojn pro ĉagreno, kaj vi prefere riparu la ĉaron – rompiĝis la akso kaj unu el la radoj kurbiĝis – ekkaptu la ĉevalojn kaj pluiru ilian rondon. Kaj mi esperas, ke ne baldaŭ tion ĉi vi forgesos.

25 (20) Dialogo inter Apolono kaj Hermeso

Apolono 1 Ĉu vi povas rakonti al mi, ho Hermeso, kiu el ĉi du estas Kastoro kaj kiu Polukso? Mi ne povas distingi ilin.

Hermeso Kiu hieraŭ estis kun ni, estas Kastoro, ĉi tiu Polukso.

Apolono Kiel tion vi scias? Ili aspektas same.

Hermeso Ĉar tiu, Apolono, havas signojn de mistraktado fare de kontraŭulo, kiam li estis boksanta, precipe de Bebrikso, la filo de Amuko, kiam tiu vojaĝis kun Jasono en la ekspedicio. La alia ne havas tian rekonilon; lia vizaĝo estas senvunda.

Apolono Dankon, ke tion vi rakontis. La cetero ja identas, la duona ovoŝelo surkape, kaj stelo super ĝi, la lanco en la mano, kaj por ambaŭ jen blanka ĉevalo; ofte Polukson Kastoro mi nomis aŭ Kastoron Polukso. Sed estas io alia, kion vi rakontu al mi. Kial neniam ni vidas ilin kune? Kial ili alternas esti mortinto kaj esti Dio?

Hermeso Tio estas pro ilia frata amo. Kiam unu el la idoj de Leda devis morti, kaj unu iĝi senmorta, ĉi-maniere la senmortecon ili disdividis.

Apolono Ne vere sprita maniero, laŭ mi, ĉu ne? Ĉi-maniere ili eĉ ne vidas unu la alian, kaj tio estas ja, kion pleje ili deziris, mi supozas. Kiel ja eblas, se unu estas kun la Dioj kaj la alia kun la mortintoj? Alia afero: mi estas profeto, Asklepio kuracisto, vi instruas luktadon kaj estas mirinda trejnisto, Artemisa estas akuŝistino, kaj ĉiu helpas Diojn aŭ homojn. Sed kion ni povas ilin lasi fari? Tiaj fortuloj ne povas nur pleniĝi sin tuttage frandante.

Hermeso Neniul vi zorgu. Ili servu al Pozidono; ili rajdu super la maro, kaj se ŝipistojn ili rimarkas en ŝtormo, ili subeniĝu sur la ŝipon kaj tenu la veturantojn sekuraj.

Apolono Bone. Ho Hermeso, tio estas utila tasko kaj sava.

Notoj

- La ĉapitro-ciferoj inter parentezoj prezentas la originalan ordon.

- Hefajsto = Hefesto



<https://www.freepng.fr/>

¹ Iliado 8:17-27.

² Iliado 1:396 k.s.

³ Lukiano (same kiel Cicerono, *De Naturo Deorum*, III,22) sekvas Herodoton, II,145 farante Pajnon la filo de Penelopa. Ekzistas alia versio de lia naskiĝo, kies ĉefa fonto estas la Homera *Himno al Pajno* 34, kie lia patrino estas la filino de Driopso.

⁴ Vidu ĉe Herodoto, 6:105, Eŭripido, *Ion*, 492 ks.

⁵ Hermafrodito estas filo de Hermeso, Priapo de Dionizo; Eroson foje oni indikas filo de Areso, foje de Zeŭso, aŭ eĉ de Hermeso; Lukiano eble konsideris lin filo de Areso prefere ol de Zeŭso.

⁶ Vidu Eŭripido *Ifigenia en Taŭris*.

⁷ Ganimedo.

⁸ Kastoro kaj Polukso, la Dioskuroj.

⁹ Heraklo kaj Dionizo.

¹⁰ Ŝajne Lukiano tie ĉi eraras.

¹¹ Nekontentaj sklavoj povis peti esti vendataj,

¹² Heziodo *Teogonio* 560 k.s.; 637 k.s.

¹³ Zeŭso detronigis sian patron Krono.

¹⁴ Heziodo *Teogonio* 120 & 134.

¹⁵ Interalie dum ĉasado pri Antiopa, Eŭropa, Danaa, Leda kaj Ganimedo.

⁶ Ganimedo. Vidu 10 (4).

⁷ Vidu 6 (2).

⁸ Unu el la Titanoj, patro de Prometeo.

¹⁹ Kiam Zeŭso kolera ĵetis el la ĉielo Hefajston, tiu surteriĝis sur Lemnoso – *Iliado* VII:35.

²⁰ Diino kiu helpas ĉe la naskiĝoj.

²¹ Alkmena, patrino de Heraklo.

²² La Dek Du Laboroj.

²³ Tamen Apolonio de Rodiso *La Argonaŭtiko* II 1235 k.s. rakontas, ke Krono seksumis kun Filera, filino de Okeano, el kio rezultis Ĥirono, parte Dio, parte ĉevalo, kiu poste instruis Aĥilon..

²⁴ Ĉar li resurektigis homojn el la morto. Hadeso akuzis Asklepion antaŭ Zeŭso ke la nombro de la mortoj terure malkreskis; kolera fine Zeŭso trafis Asklepion per sia fulmo.

²⁵ Vidu Sofoklo *Traĥiniaj*.

²⁶ Reĝino de Lidujo, kiel kies sklavo Heraklo tri jarojn laboris.

²⁷ Megara. Vidu en Eŭripido *Herkulo Furioza*.

²⁸ Monto.

²⁹ laspeca irido, kiu portas la literojn AIAI [ve!].

³⁰ Vidu *Iliado* XVIII 382, Heziodo *Teogonio*, 945-946, nomas ŝin Aglaja, plej juna el la Ĥaritoj.

³¹ Vidu 21 (17).

³² Artemisa kaj Apolono.

³³ Hiacinto.

³⁴ Unu el la kromnomoj de Artemisa estis *Elitŭia* (Diino de la akuŝoj), kvankam Homero *Iliado* XI 270 kaj XIX 119 parolas -plurale- pri filinoj de Hera. Heziodo *Teogonio* 922 nomas ŝin filino de Hera kaj Zeŭso.

³⁵ Eroso.

³⁶ Adoniso.

³⁷ La Suno.

³⁸ Atiso.

³⁹ Penteon disŝiris lia patrino Agava. Vidu *Eŭripido* *Bakĥaj*.

⁴⁰ Apolodoro III 14:7.

⁴¹ Klasikepoke vinon ĉiam oni miksis kun akvo.

⁴² Lia filo Faetono.

⁴³ Teokrito 22:26 kaj Apolonio de Rodiso II 1 k.s.



B. Vanzetti

N. Sacco

14an de julio 1921

MORTKONDAMNO de SACCO kaj VANZETTI

Laŭ la Cenona Kvinopo

La 14an de julio 1921 per unua verdikto Nicola Sacco kaj Bartolomeo Vanzetti estis mortkomdamnitaj en Dedham (Masaĉuseco). La 27an de aŭgusto 1927 ambaŭ ili estis elektroekzekutitaj en la malliberejo Ĉarlestono apud Bostono. Tiuj du eventoj levis protestondegojn tra la lando, eĉ tra la tuta mondo. Surstrataj manifestacioj, peticioj, telegramoj, artikoloj... Tra la popolamasoj flirtis kolektiva sento montranta, ke Sacco kaj Vanzetti enkarnigas ne nur la laboristan klason fronte al la "Kapitalo", sed ambaŭ ili reprezentas, konscie aŭ ne, sociojn kun gloraj pasintecoj, kies filoj estis devigataj ekziliĝi pro la perturboj de la jarcento. Kaj ilin Usono elĵetas post foruzado de iliaj laborfortoj. Krome laŭ multnombraj homoj, kiuj batalis unue por reviziado de la proceso kaj poste favore al forpardono, Sacco kaj Vanzetti frontlinie rolis en la batalo por la justo, la homaj rajtoj kaj la civilaj liberecoj, kontraŭ tiuj, kiuj regas je kia ajn kosto por sekura ordo kaj "konservinda identeco".

Kelkfoje asertoj konsideras la proceson de Sacco kaj Vanzetti kiel parodion de proceso kun jam antaŭdecidita verdikto. Ja, abundis tiam la neregulaĵoj, sed ĉefe la ekstera klimato forte premis sur la debaton. Hodiaŭ plu la justica eraro ne povas esti centprocente pruvita. Sed tio ne malhelpas, ke la

konvinkon de la ĵurianoj ŝajne nutris partiecaj konkludoj de la instrukcio, la persona implikado de la juĝisto Thayer, kaj kelkaj dokumentoj, el la Buroo de la Enketoj, kiuj poste montriĝis malveraj. Krome antaŭjuĝo pri kulpeco pezis sur ambaŭ juĝitojn, simple ĉar ili estis italoj kaj anarkiistoj. Kaj ankaŭ aldoniĝis la misvaloro de la ekspertoj kaj de akuzaj atestoj.

Sacco kaj Vanzetti estis kondamnitaj laŭ malfidindaj konjektoj, kiuj verŝajne ne persistus antaŭ restudo de la afero, se la advokatoj de la du anarkiistoj sukcesus agnoskigi la diversajn demarŝojn por reviziado de la proceso. Sed ĉiuj fiaskis kontraŭ obstina rifuzo de la juraj instancoj en Masaĉuseco, inkluzive tiun senditan al la Supera Kortumo de tiu ŝtato, malgraŭ la konfeso en novembro 1925 de dudek-trijara portugalo, Celestino Madeiros, mort-kondamnito pro murdo de kasisto, kiu konfesis, ke li mem partoprenis en la atako, pri kiu estis kulpigitaj Sacco kaj Vanzetti, sed ili, ne.

Centoj da verkoj (poemoj, romanoj, filmoj, teatraĵoj, pentraĵoj, ktp) ankaŭ pruvadis engaĝiĝon de artistoj tra la mondo. Inter ili elstaras en 1971 la filmo *Sacco e Vanzetti* de Giuliano Montaldo kun la mondfama kanzono de Joan Baez, kiu aludas pri la ĉi-sekva interveno de Vanzetti. (*Vidu lastpaĝe*).

Vanzetti kondamnita kun Sacco al elektroekzekuto respondis la 9an de aprilo 1927 al la juĝisto Thayer:

“ Sen tiu afero mi estus travivanta oratorante ĉe stratanguloj antaŭ malŝatantaj homoj. Mi povus esti mortonta nekonata, ignorata fiaskulo. Nun ni ne estas fiaskuloj. Jen nia kariero kaj nia triumfo. Neniam en nia tuta vivo povus ni esperi fari tiom por toleremo, por justo, por reciproka kompreno inter homoj, kiel hodiaŭ ni nepropravole faras. Niaj vortoj, niaj vivoj, niaj suferoj - nenio! La forprenado de niaj vivoj, vivoj de bona ŝuisto kaj malriĉa fiŝkolportisto - ĉio! Tiu ĉi lasta momento estas nia, tiu agonio estas nia triumfo. ”



Hela Ella

Doziero de
Marcelo Redulez



Tiel komenciĝis...

Jam de junaĝo



Tiel daŭris...

Plenkreska senpaŭze



Tiel finiĝis.

Ĝis morto.


SIAN TUTAN VIVON ELLA FITZGERALD DEDIĜIS AL ĴAZ-ARTO!

El la mizero

Voĉo kiel liber esprimilo

Spite al rasismo

Muziko kiel universalismo



Per sia voĉo Ella Fitzgerald (1917-1996) transformis siajn personajn tragediojn kaj la konfuzajn tumultojn de sia epoko en puran ĝojon. Kromnomita Reĝino de la Svingo, kiel ikono por la ĵazo, ŝi dediĉis sian tutan vivon al muziko.

Ekzistas anekdotoj, kelkaj kontraŭdiraj aŭ misteraj, aliaj neutilaj aŭ tromalkaŝemaj, rilate la biografion de Ella, sed ŝi elektis ne konsideri ilin. Ŝi vivis en epoko kaj mondo de l' ĵazo, kie la aristoj ne elverŝis siajn ĝojojn aŭ ĉagrenojn kaj foje mizerojn, el kiuj ili ĝuste foje penis eliri partigante sian arton kun la publiko. Jen bonfara formo de diskreteco kaj modesteco antaŭ tiuj, kiuj ne sukcesis elturniĝi kaj por kiuj necesis nepre malfermi spacojn por libereco, beleco kaj vivsenco, por elteni la ĉiutagaĵojn; Malnova heredaĵo de solidaraj praktikoj en la kotonkampoj inter mistraktadoj kaj ritoj per tranĉoj aŭ Vuduaj dancoj liberigaj kaj savaj.

Kelkajn biografojn ĝenis la manko da sensaciaĵo ĵaz-karikatura (drogo kaj dekadenco) en la vivo de Ella. Tial ili gloris ŝin, pretekstante ke ŝia voĉo transpasas la kadron de ĵazo, kiel varieteulinon, stelulinon, artistinon, kiu fariĝus alia ol la bela voĉo kaj eminenta ĵazkantistino, kiu ŝi estis. Ili ne hezitas prezenti ŝin kiel artistinon surprotektitan de siaj sinsekvaj manaĝeroj, artistinon naturan kun neordinara talento sed sen alia decidpovo, ol tiu diktita de nepraj produktobezonoj. Senkarna portreto facile pentrebla sed fine malĝusta rilate la potencon de ŝiaj verkaro kaj esprimado.

Skua junaĝo

Ella Fitzgerald estas dujara, kiam ŝia patrino elmigris el la suda ŝtato Virginio al Novjorko. Ŝi kreskis en malfacilaj cirkonstancoj, kiuj pli-graviĝis pro la dekjara ekonomia krizo post la Granda Depresio okazinta en 1929. Senlaboreco frapis la popolon. Duobla tragedio por dektri-jara Ella pro la forpaso de ŝia patrino, dum ŝi neniam konis sian patron. Tial ŝi restadis kelkajn monatojn en porjunulina pun-domo, kie ŝi suferis rasistajn ĉikanadojn kaj insultojn, eĉ perfortojn far la blankulaj vartistoj kaj vartistoj (ĉu ankaŭ seks-perfortojn? Eble, laŭ kelkaj fontoj. Tamen pri tio Ella mem neniam poste aludos), antaŭ ol sole vivteni sin sur la stratoj en Harlemono. Sed en 1932, 50% de la usonaj laboristoj estas senlaboraj. Sklaveco estis abolita kaj la negroj



ne ricevis laboron. Voĉoj aŭdiĝas por ke pluaktivantaj negroj estu maldungataj kaj anstataŭigataj de blankuloj.

Norma Miller, dancistino, amikino de Ella memoras: «Segregacio estis totala. Ni, negroj, ne rajtis eniri butikojn, provi aĉetontan ĉapelon. Ne ekzistis negra kasistino. Ni estis limigitaj en nia kvartalo. Ne for sur la sama strato staris la dancejo Cotton Club. Ni ne rajtis tien eniri. Ne rajtis tie labori. Tiu formeto devigis nin ĉion fari inter ni. Ella estis naŭva, nek eleganta, nek kulturita. Nur si mem. Ni estis la juna generacio. Ŝi surprizis nin. Ŝi estis junulino de sia epoko. Ŝi volis eskapi el sia mizera vivo.»

Kaj la industrio de la vivanta spektaklo elmontris sin kiel eskaprimedon, alternativon. Kaj por satigi tiun sukcesoifon kaj artan esprimon, la kluboj kaj teatroj organizis amatorajn konkursojn. En 1934, kiam la harlema teatro Apollo en Novjorko iniciatis siajn prezentojn «noktoj de l' amatoroj», Ella Fitzgerald, nur adoleskantino, revis sian vivon kiel dancistino. Kiam siavice ŝi troviĝis sur la scenejo, la animanto akceptis ŝin mokante ŝiajn vestojn kaj la petola publiko huis ŝin. La etoso de tiuj vesperoj estis senkompata. Sed surprize post kandidatinoj pli lertaj ol ŝi por la danco, la maldiketa deksesjarulino tremanta sur siaj tro magraj kruroj rezignas sian koregrafion kaj lastminute decidas kanti laŭmodan ŝlagron The Object Of My Affection aŭ Judy. Nur post la dua strofo kvietiĝas la krioj. Ŝia unika tono kaj ŝia ŝajne denaska svingemo kaptis la publikon kaj la ĵurio selektis ŝin. Ŝi gajnis la unuan premion (25\$) kaj trovis sian vojon. Por Ella jen komenco de rapida soro. Nuboj ŝajne ekforvaporiĝis el ŝia vivo, kvankam ŝi estis ĉagrenega pro la morto de

sia patrino tri jarojn antaŭe. Kelkaj monatoj sufiĉis por ke la eksknabino el Virginio fariĝis stelulino kaj fine unu el la plej eminentaj kantistinoj de ĉiuj tempoj, la «First Lady of Song» (Unuaranga Damo de la Kantarto).



Fulmrapida soro

Chick Webb ne tro bonvoleme konsentis aŭskulti tiun junulinon malgraŭ la insisto de sia kunmuzikisto Bardu Ali. Sed nur post du strofoj kantitaj sen akompano li jam estis konvinkita. Li volis dungi Ellan, sed ŝi estis neplenkreska orfino kaj tial ne rajtis subskribi laborkontrakton. Tial Chick Webb kaj lia edzino decidis adopti Ellan. Chick Webb instruis al Ella la bazojn de la ĵazmuziko kaj i.a. la bitmuzikon. 'Beat', tiu aparta ritmo, kiu svingigas. Kaj jam en 1935 kun lia orkestro ŝi ekprofesiĝis kantante en la muzikejo Savoy kaj registris ŝlagrojn kiel (If You Can't Sing It) You'll Have to Swing It, Love and Kisses kaj A Tisket, a Tasket. Ĉi-lastata atingis la unuan rangon sur la listo de la furorŝlagroj. Tiu unua sukceso de Ella fontas el propra ideo modernigi infankanzoneton. Kaj pro ĝi ĉiuj serĉis tiun damnan flavan korbeton! Chick Webb kaptos tiun etoson kaj registrigos al Ella tutan serion da humuraj kanzonetoj. El tiuj fruaj sukcesoj elstaras ankaŭ Mister Paganini. Ŝi estas nur deknau-jara, kiam ŝi registras ĝin, tamen longe ĝin akompanos intensa emocio dum ŝiaj koncertoj. Kaj de post la morto de Chick Webb en 1939 la sama orkestro nomiĝis Ella Fitzgerald and Her Famous Orchestra (kaj ŝia fama orkestro).

Ĉiuj orkestroj volis dungi la kantistinon. Ŝi registris diskojn, kantis por la renoma elsendo *Coast to Coast* (de bordo al bordo) de Benny Goodman, animis noktoklubojn kaj dancejojn de Bostono al Filadelfio, de Ĉikago al Nov-Orleano.

Pri tiu epoko Ella rakontis:

«Mi aŭskultis min kanti kaj mi aŭdis knabineton, kio mi tiam estis. Tio ridigis min. Mia voĉo estis malfirma kaj tre milda. Sed kiel la cetero, ĝi maturiĝis. Kaj mi feliĉas, ĉar mia voĉo tiel infanece sonis. Sen ĝi, nenio same okazus.»

«Sur scenejo Ella estas kiel en la vivo: diskreta kaj timema. Ŝi similis knabinon.», memoras Johnny Mathis.

La sukceso malfermis por ŝi ankaŭ la pordojn de la hollywooda kinarto. Ŝia nomo aperis inter duarangaj aktoroj de du muzikaj komedioj. Sed la hollywoodaj briloj ne tiel logis ŝin kiel la rekta kontakto kun publiko sur scenejo.

Ŝi mirigis siajn publikojn ne per siaj roboj sed per siaj voĉo, humuro kaj humaneco. Samkiel multaj negraj artistoj tiuepoke ŝi estis viktimo de diskriminacio malgraŭ sia famo. Modo tiam postulis de artistinoj, kaj aparte de la negraj, ke ili

teksto daŭrigota sur paĝo 62a

ŜIN ILI

Kvankam handikapita pro infana tuberkulozo, William Henry Webb, kromnomata **Chick**

Webb (1905-1939) tre frue elmontris pasion por drumado.

Energiplena adoleskanto el Baltimore li alvenis en Novjorkon. En 1925 li kreis sian propran jazorkestron. Sian precizecon kaj potencon drumkvaliton Chick Webb trudis al sia bando. En la tridekaj jaroj dank' al regulaj kontraktoj kun la fama dancejo Savoy Ballroom en Harlemo, Chick Webb sukcesis stabiligi la muzikistaron de sia orkestro kaj trudi al ĝi disciplinon. Ekde 1933 la bando distingiĝis per la orkestr-adoj de Edgar Sampson. Tiam "Chick Webb kaj lia orkestro" venkis ĉiujn orkestrkonkursojn. Kaj ĝi atingis atingis apogeon post dungo en 1935 de la adoleskanta Ella Fitzgerald. Chick Webb, kiu ĉiam zorgis pri sia arto, spite al sia malsano, forpasis kvar jarojn poste pro tuberkulozo.



Nomita inter la plej eminentaj trumpet ludistoj, **Dizzy Gillespie** (1917-1993)

ŝveligis siajn vangojn kiel

bufo. Li grandparte ŝuldas sian vastan popularecon al sia talento, kaj krome al siaj entuziasmo, vivĝojo kaj sprita humuro. Kiel kunkreinto de bopo li instigis por enŝovo de afrikokubaj ritmoj en ĵazon. Lia instrumento distingiĝis pro sia alsupre oblikva sonfunelo. Li komencis ludi per tiu instrumento ekde la 1950aj jaroj. Li ludis nekredeble rapidege kaj li enŝovis en siaj komponaĵoj kaj improvizadoj novajn harmoniojn, kiuj liberiĝis de la antaŭmilitaj ĵazsonoj. Vojaĝema, verŝajne ankaŭ por eskapi la usonajn rasismajn streĉojn, li transportis febrajn etosojn tra Eŭropo, Mez-Oriento kaj Sud-Ameriko. Sed pro evoluanta socipolitika ordo en 1964 li anoncas sian kandidatiĝon por la Prezidenteco. Mezŝerce, mezserioze, kiel sur scenejo.

Trans ĉiuj ĵazaj stiloj kaj genroj, trans ĉiuj skolaj kvereloj, al neniu venus la ideo kontesti la titolon

reĝo de l' ĵazo al **Louis Armstrong** (1901-1971) pro plej grava ĉefrolo en la historio de la muziko. Per sia granda talento li, unua, sukcesis sonigi kaj brili tiun muzikon tra la tuta mondo. Dank' al sia bonhumoro li disvastigis ĵazon naskiĝintan en la koro de la afrik-amerikaj animoj kaj dank' al li ĝi ricevis tutmondan agnoskon kiel puran artaĵon. Virtuozaj trumpetistoj, li inventis kaj popularigis la improvizadojn kaj la formon instrumento/voĉo/instrumento kun orkestro kiel nura reliefiganto de la solisto.

Li jam estis stelulo, kiam li registris tri diskojn kun Ella. Samepoke li registras siajn tutmonde famajn *Hello Dolly* (Saluton Dolly) en 1964



kaj *What a wonderful world* (Kia mirinda mondo) en 1967.

Kiel pioniro li devis ĉie kaj ĉiam subiĝi al la medio, kiun li celis konkeri. Kvankam la kondiĉoj estis ofte malfavoraj, li tamen senŝanĝe montris transdonemajn ridemon kaj homvarmon. Ne pensu, ke tio estis pro naiveco. Male, li tre bone komprenis la situacion sed siacele uzis tiujn rimedojn kiel Trojoĉevalon. Ĉio, kion li volis denunci aŭ promocii, li esprimis per sia muziko. Kaj li ludis ĉie por ĉiu: en prizonoj same kiel en la Blanka Domo. Tra la tuta mondo. Okaze de sia 65a naskiĝtago li ricevas la usonan honormedalon de la Libereco.

La mizera infano muzikis ĝis sia forpaso pro pulm- kaj kor-malsano. Miloj da admirintoj grupiĝis ĉe lia ĉerko kaj lian funebran ceremonion satelitoj elsendos por televido.

Lia verkaro ampleksas pli ol trimil komponaĵojn, inter kiuj multaj elstaraj. Ĝi estas la plej vasta el la jazhistorio. **Duke Ellington** (1899-1974) estas

verŝajne la nura ĵazulo konsidera kiel vere aŭtenta artisto, honorita kiel komponisto pli ol kiel instrumentisto. Li estis ankaŭ pianisto kaj dirigento. Li ĉiam konsideris sian muzikistan laboron kiel konstruadon de verko, ambicante krei novan muzikan lingvaĵon kapablan esprimi en sia formo mem la sentojn, kolorojn kaj karakterojn de la usonaj negroj. De profana ĝis sakra, de opera ĝis danca, tra blusa kaj gospela, lia muziko pretendas al agnosko de la negroj en la kulturo. Dikkvin-jara li jam komponis sian unuan muzikaĵon. En 1926 li estras jazorkestron en la fama novjorka Cotton Club. Kaj li monde vojaĝas. Dum sia kvindekjara kariero li ĉie ricevis premiojn kaj plej distingajn honoraĵojn.



AKOMPANIS



Sian unuan kontrabason **Ray Brown** (1926-2002) senpermeso prunteprenis el la muziklernejo de Pitsburgo por sursceneje ludi. Kvankam komence esperplena pianisto,

li estis mallaborema lernanto, kiu konjektis pli facile ludi per kvar kordoj ol okdekklavoj! Grava eraro! Sed de tie lia vivvojo kondukis lin al gloro kiel eminenta ĵazo kontrabasisto. Dudek jara li atingas Novjorkon kaj estas rekrutita de Dizzy Gillespie, dank' al kiu li perfektigis sian arton ludante inter elstaraj muzikistoj. Lin karakterizis nekredbla ĝusteco, horloĝopreciza ritmo kaj laŭta sonorado, subtene valorigante siajn kunludantojn. Tiam li renkontis Ellan kaj por akompani ŝin, li kreis triopon. Ella kaj Ray geedziĝis en 1947. Ili adoptis la nevon de Ella, naskitan en 1949, kiun ili nomis Ray Brown junior. Kvankam la paro oficiale disiĝis en 1953, ili plu longe

Kompreneble nenombreblas ĉiuj, kiuj akompanis Ellan dum ŝia tuta vivo, tra ŝia kariero, laŭ ŝiaj turneoj kaj vojaĝoj. Tial malfacila estis la elekto por la ĉi tie prezentitaj proksimumoj. Inter ili ja mankas gravuloj, kiel ekzemple Frank Sinatra kaj Oscar Peterson... Vasta estas la ĵazmondo plena je talentaj homoj, kiuj sub scenejaj lumoj aŭ en ombro alportis ion al Ella aŭ/kaj reciproke.

kunlaboros kadre de la bando Jazz at the Philharmonic. Basisto modeste rolas kiel tiu, kiu (sub)tenas la tutan ensemblon. "Kiam vi estas perdita, aŭskultu la bason" ofte aŭdeblas. Li tenis tiun rolon trans ĉiuj atendoj, proponante al siaj partneroj firman soklon sur kiu ili povis senbride improvizi. Kiam li pace mortis dum siesto, homoj atendis lin por vespera koncerto.

William James Basie, laŭnome **Count Basie** (1904-1984) naskiĝis en ŝtato

Nov-Jerzejo kaj eklernis pianon kun sia patrino. Adoleskanto li jam elmontras sian inspiron por improvizado akompanante silentajn filmojn en kinejoj. En 1924 li transloĝiĝas en Harlemon kaj dungita en unu el la unuaj bandoj de Duke Ellington kaj pruvas sian pianistan talenton. La laŭdire malamika rivaleco inter tiuj du elstaraj ĵazuloj restas legendo. Reale ambaŭ bele rilatis, ĝentlemane respektis la alian, konsiderante reciproke artan valoron. Count Basie grupigis propran orkestron ekde 1935, kiuj pli kaj pli ampleksiĝis kaj sukcese atingis scenan pinton dum mondaj

turneoj. En la kvindekaj jaroj kun surkape kapitana kaskedo li dirigentas kvazaŭ ŝipestro kaj akompanas la plej eminentajn kantistojn, inter kiuj Ella. Virtuozo komence de la paŝa pianludado, kun ĉefrolanta maldekstra mano, li poste disvolvis ardan, solidan svingon kun pli diskreta, kvazaŭ sindetena, maldekstra mano. Por li gravas la svingado kaj tial li favoras la kuprojn kaj akcentas riĉajn ritmaranĝojn.

En 1960 li kunanimas la inaŭguran ceremonion de la prezidenteco de JF Kennedy. Li ricevis multajn rekompencojn, kiel Grammy Awards por "plej bona ĵaz-spektaklo" kaj ĝismorte muzikos. Li forpasis pro kancero en Florido.

Manaĝero, koncerto- kaj diskoproduktisto **Norman Granz** (1918-2001)

promociis ĵazon kiel muzikon aŭskultendan komforte sidante kiel klasikaj de la 20a jarcento. Ĵazo tiam el fumoplenaj kluboj konkeris novajn publikojn kaj tiel li famigis



multnombrajn ĵazajn muzikistojn kaj kantistojn, inter kiuj Ella. Por ŝi li eĉ kreis muzikeldonejon Verve hodiaŭ plu internacie konata. De komence li samtempe batalas kontraŭ rasismo kaj segregacio. Ekde 1944 por siaj koncertoj nomitaj Jazz At The Philharmonic (JATP) li vole miksis blankajn kaj negrajn muzikistojn. Kaj ĉiu egale ricevis saman salajron. Li rifuzis ludigi sian orkestron, kie la publiko ne estis miksitaj. Kaj ĝis meze de la sesdekaj jaroj tiuj decidoj pruvis lian engaĝiĝon firman, daŭran sed ankaŭ lacigan. Dank' al siaj entreprenemo, persistemon kaj amon al ĵazo, li sukcesis organizi turneojn en la plej prestiĝaj koncertejoj tra Usono, Kanado, Eŭropo kaj Japanio. Li pasigis siajn lastajn dekkvin vivjarojn en Svisio.



Daŭrigo de la paĝo 59a

aspektu glamuraj kaj sekslogaj. Estis tiama kulturo. Sed Ella neniel apartenis al tiuj kategorioj. Ekde la fino de sia adoleskeco ŝia pezo fuŝis ŝian vivon. La ĵurnalistoj moknomis ŝin «la abundulino». Iun tagon post paneo de lifto, en kiu ŝi restis blokita, la komento estis kaŭstika: Tri viroj helpe al pezulino de la kanzonarto. Ŝi verŝajne hontis pro la humiligoj kaj fitraktoj, kiujn ŝi junaĝe suferis. Oni mokis ŝin, ĉar ŝi trodikis, kaj la gazetaro scipovis uzi personan malfacilan frutempon por kritikaĉi la artistojn. Kaj eĉ pli vikle kontraŭ virinoj.

Responde Ella kantis: «Mi scias, ke mi ne estas glamura, sed tio ne plu ĝenas min. Ĉar Dio donis al mi tiun artkapablon, mi sursceneje kantadas.



Chick Webb kaj Ella Fitzgerald

Laura Mvula raportas: «*Ella tiel fordonis sin dum spektaklo, ke ŝi multe ŝvitadis. Korpon kaj animon ŝi dediĉis al muziko. Sentrompe. Ŝi estis ĵazpionirino kaj kun ŝi, ĉio ŝajnis ebla, kvazaŭ ŝia voĉo ne konus limojn. Kaj dank' al ĝi kaj muzikkreado ŝi penetris teritoriojn, ĝis tiam neniam imagitajn. Jen parto de la mistero de la kreado.*»

Spite do al la tiuepokaj standardoj de la modo, Ella, kun sia aspekto kutime de fakinstruistino por piano aŭ bibliotekistino, surprizis enirante sur la scenejon. Tamen ŝi estis la kantistino de la orkestro de Chick Webb. Kelkaj muzikistoj, post lia morto, ne ŝatas, ke ŝi transprenis la gvidrolon. Ili taksas ŝin severa kaj malafabla. Laŭ ili rolo de kantistino estas kanti. Do ŝi kantu kaj cetere mutu kaj plu restu trankvila.

Post milita sufero

En decembro 1941 Usono engaĝiĝis en la dua Mondmilito. Multaj muzikistoj estis rekrutitaj kiel soldatoj. La fama orkestro de Ella estis disigita en 1942. Ella komencis individuan karieron.

Sed la romantikeco de la baladoj de la juna Sinatra kaj la sentoplena svingo de Glenn Miller pli bone spegulis la morozecon de milita lando. Ella malaperis el la furorlisto. La magazino Ebony tiam demandis: kiu do estas la muzika stilo de Ella hodiaŭ? La respondo de Ella mirigis ĉiujn. En 1944 ŝi regis jam skatkantadon, interpretis bluson, sambon kaj gospelon, ankaŭ kristnaskajn kantojn. Post du turneoj kun Dizzy Gillespie, ŝi bonvenigis la bebopo-revolucion kaj eksplodigis la svingokodojn per improvizadoj de frenezaj skatkantadoj. Neniu antaŭe tiel faris je tiu nivelo. Dum sia solkantadoj ŝi tiel facile kaj talente ludis per sia voĉo, kiel trumpetisto aŭ saksofonisto ludis per sia instrumento. Kiel tio eblis? Jen mirinda fenomeno de la naturo.

La bopo malfermis novajn perspektivojn por ĵazo. La eksploda miksado de ege rapidaj ritmoj

Kenny Barron, ĵazpianisto, memoras: «*Ella havis esceptan muzikan oreilon. Ne sufiĉas konis la harmonion kaj la teorion. Necesas scipovi aŭdi. Ĉiuj eminentaj kantistoj havas bonan muzikan oreilon, eĉ se ili ne estas tro scipovaj. Ili scias, kien vi iras kaj kien ili devas konduki la muzikon.*»

kaj novaj, tre kompleksaj harmonioj perfortis la konvenciojn de la sving-muziko. La elekto de Ella montris sian grandan muzikan aŭdacon kaj ankaŭ sian artan konsciencon. Ŝi sciis, ke ŝi devis esplori tiujn novajn kaj fascinajn teritoriojn. Certe estis perturbe transiri de statuto de juna kantistino al tiu de plenposeda muzikistino. Kvazaŭfantaste.

Dum siaj koncertoj ŝi amuze ankaŭ imitis voĉojn kaj gestojn de aliaj famaj artistoj, kiel Louis Armstrong. Kun la orkestro de Duke Ellington ŝi turneis tra Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Ŝi ekis la koncerton per *Take the 'A' Train*. Ella estis unu el la malmultaj artistoj, kiuj kantis parolojn sur tiu muziko.

En 1947 Ella kaj Ray Brown, kontrabasisto de la orkestro de Dizzy Gillespie geedziĝas. Muziko plenigas la vivon de la paro. Ella amas la infanojn. Ŝi longe sopiris naski propran sed la vivo male decidis. En 1949 kun Ray ili adoptas la filon de la duon-fratino de Ella. Ili nomas lin Ray Jr. Sed en ilia medio, privata vivo estas fuŝita, ĉar ne eblas trovi ekvilibron inter profesia kaj persona vivoj. Ella kaj ŝia edzo penas kombini paran vivon kun la senĉesaj turneoj. Tio damaĝas. Karierismaj virinoj ofte diris al siaj

infanoj, ke ili tuj revenos kaj revidis ilin nur dekkvin tagoj poste. Fine la geknaboj ne plu sciis, kiu estis tiu virino, kiu envenis hejmen. Ella kaj Ray fine divorcis en 1953. Tamen ili neniam ĉesis kune muziki kaj turnei. Konklude ŝajnas ke la ama vivo de Ella neniam estis tre arda.

Al tutmonda gloro

En la 1950aj jaroj, la kariero kaj vivo de Ella novdirekte orientiĝis. Ŝia manaĝero Norman Granz, malfermis por ŝi la pordoj al tutmonda gloro dank' al la diskeldonejo Verve, kiun li kreis speciale por ŝi. Amika helpo de Marilyn Monroe ankaŭ impulsis ŝin samdirekten. Post la milito la usonanoj estis sufiĉe riĉaj por aĉeti la novajn LP-diskojn kaj stereoaparatojn, por aŭskulti ilin. Norman Granz celis produkti altkvalitajn albumojn registritajn kun orkestro. Estis finita la tempo de infanaj kaj humuraj kanzonetoj. Ella maturiĝis, kiel virino, kiel artistino, kaj dank' al Norman Granz, ŝi reinventis sin. Komence ŝi ne bone komprenis lian celon kaj malaprobis, ke Norman malproksimigis ŝin de ŝia ĵazo. Ŝi demandis sin, kiu ŝatos aŭdi ŝin kanti tion? Sed estis amuze kaj ŝi ekkonis multegajn novajn fervorulojn tra la mondo.

Norman Granz havis la ideon krei la serion Great American Songbook (Granda Usona Kantlibro), kiu ekvivalentas la klasikan usonan muzikon komponitan i.a. far Cole Porter, George Gershwin kaj Duke Ellington. Norman antaŭsentis, ke Ella estus ideala interpretistino de la eminentaj usonaj komponistoj. Kaj la mirindaj albumoj sekve registritaj pruvis, ke li pravis. La homoj taksis tiujn kanzonojn malseriozaj... ĝis kiam ilin

kantis Ella. Temis pri aŭdaca veto de Norman kaj Ella, deziri eternigi tiujn verkojn dirante: usonanoj devas fieri pro tiuj kanzonoj, do jen kiel interpreti ilin. Disvastigante la usonan repertuaron kaj malkovrigante la ĵazon en Berlino, Helsinki kaj Tokio, Ella nobeligis ambaŭ ilin. Konsiderante ŝian deirpunkton, jen heroaĵo! La Songbooks (Kantlibroj) starigas la kantistinon laŭ statuto de Super-Stelulino. Tamen la impresarioj kaj televid-produktistoj daŭre ekskludas negrajn geartistojn. Tiu situacio naŭzas kaj incitegas Ellan kaj Normanon. Ella ambicius animi propran elsendon, tamen klarvide ne tro kredis pri ĝi pro la situacio.

«Nu, ni ĉiuj rajtas revi...»

Ella laŭlonge de sia kariero ĉion kantis kun la plej imponaj grupoj kaj solistoj kiaj Oscar Peterson, Count Basie, Roy Eldridge aŭ ankaŭ la triopo Tommy Flanagan. Ŝi ankaŭ kunkantis kun la plej talentaj ĵazkantistoj inter kiuj Nat King Cole, Frank Sinatra kaj Louis Armstrong. Kun ĉi lasta ŝi registris la mondfaman albumon Porgy and Bess sed ankaŭ Ella kaj Louis Again.

Ella genie inkludis aliajn kanzonstilojn en sia skato*. Ŝi ne kontentiĝis kantadi sur silabojn. Ĉiu noto integriĝis en strukturo de akordo jam ekzistanta. Kaj eblis retrovi la saman akordostrukturon en ĉiu rekantaĵo. Jen ŝia genio: nekredbla kapableco improvizi. Improvizado estas la plej ekstaza atingo por kantisto. Ella prenis sur sin nekonsidereblajn riskojn tute leĝere. Kaj neniam ŝi stumblis. Estis vertiĝdone. Kanti jam estas afero; improvizi, skatadi jen alia afero. La muzika lingvaĵo estas tute alia.

En la sudaj ŝtatoj la malmola realeco de rasismo frapis Ellan kaj Normanon. En 1955 en Hustono (Teksaso) tri policistoj envenis en la kulisojn por

* *Vidu noton ***skati paĝon 69*

teksto daŭrigota sur paĝo 66a



Louis Armstrong kaj Ella Fitzgerald



Indotitas Scivina / Pirm Template Studio

AKTIVULA AGO FAVORE AL LA CIVITANAJ RAJTOJ

Marilyn Monroe ŝategis la ĵazkantistino Ella Fitzgerald, al kiu en 1955

ĉiuj famaj kluboj en Holivudo plu rifuzis malfermi siajn pordojn. Tiam en Usono rasapartigo daŭre furoris. Tial ŝi traktis kun la klubestro...

Marilyn Monroe (1926-1962) asertis «La homo, kiun mi preferas, kiel estulon kaj kiel kantistino, estas Ella Fitzgerald.» Marilyn, kiu dum morozaj tagoj, enlitiĝis kun ĉampan-botelo aŭskultante diskojn de la ĵazartistino. Meze de nigra periodo de rasapartigo la aktorino glore kulminis, kiam ŝi eksciis, ke ŝia preferata kantistino ne rajtas kanti en la noktoklubo Mocambo, fama klubo sur Sunset-bulvardo en Holivudo, kutime vizitata de famuloj. Marilyn pensis: «Mi eble povas ion fari. Ŝi

grave rolis en mia vivo. Ĉu mi ne helpu ŝin ludi en Mocambo?»

memoras Bonnie Greer, verkistino de la teatraĵo Marilyn kaj Ella. Tiam Norma Jeane Mortenson (naskiĝnomo de Marilyn), pli aktivulino favora al la civitanaj rajtoj ol seks-simbolo, vokas la estron de tiu prestiĝa loko, kies pordoj restas obstine fermitaj al la estonta First Lady of Swing. Oficiale ĉar ŝi neniel prezentas logon por publiko... Se vi surscenigas Ellan, mi promesas veni kun amikoj ĉiun vesperon dum ŝia dungado ĉe unuaranga tablo de via klubo» klarigas Michel Macaire el la asocio La geamikoj de Ella Fitzgerald, historiisto de ŝia kariero. Bonnie Greer aldonas: Kvazaŭ Angelina Jolie vokas al teatreto kaj dirus kantigu ŝin kaj mi ĉeestos ĉi-vespere. Vi povas averti la ĵurnalistojn kaj anonci mian ĉeeston. Giganta vico atendas por vidi ŝin.»

Kiam ili vidas alveni Ellan Fitzgerald, kaj konstatas, ke ŝi estas negrino, dikulino, kiu ne stele brilas kaj svingas sian vivon, multaj tute ne komprenas, kio okazas» rakontas la ĵazkantistino Anne Ducros. Kaj la afero funkcias... Marilyn estas certa, ke tiu amo sukcesos, ĉar la voĉo de Ella estas nekredebla. Universala estas kion ŝi donas.»



La homo, kiun mi preferas, humane kaj kiel kantistino, estas Ella Fitzgerald»

Marilyn

Nedifektebla amikeco

Ĉu tiam Marilyn respektis sian promeson? Ni ne vere certas» notas Michel Macaire. Eble, sed ŝi tamen tiel sukcesis en marto 1955 sore startigi la karieron de Ella sur vastaj scenejoj! Sekve al la sukceso en Mocambo, Ella estis dungita en multaj grandaj spektaklejoj. Tamen ne ĉiuj egale traktis ŝin, daŭre pro la samaj kialoj: ŝia haŭtkoloro kaj tropezo. Kelkaj estroj postulis, ke ŝi eniru tra flankaj pordoj kaj ne tra la ĉefa enirpordo. Kiam Marilyn ekkonsciis pri tio, ŝi pluhelpis al sia amikino. En Ella: A Biography of the Legendary Ella Fitzgerald, la biografo Geoffrey Mark rakontas, ke Marilyn veturis en Koloradon por spekti sian amikinin sur scenejo. Surloke ŝi vidis, ke la kantistino ne rajtis eniri en la salonon tra la ĉefa

enirpordo. Reage la aktorino avertis la posedantojn, ke ŝi rifuzas eniri, kaj konsentos nur se ankaŭ la kantistino rajtas paŝi tra la ĉefaj enirpordoj. Konsekvence, de post tiu incidento ĉiuj klub- kaj koncertej-estroj digne akceptos Ellan Fitzgerald.

Kaj Ella dum sia tuta vivo memoris pri tiu ŝuldo» al Marilyn, dank' al kiu ŝi ne plu kantis nur en intimaj klubetoj, kiel dum la dudek antaŭaj jaroj. Kaj la fortajn amikajn ligojn inter tiuj du esceptaj artistinoj (kelkaj ne hezitas paroli pri fratineco») rompos nur la abrupta vivforlaso de la blondulino.

Fontoj:

Eltiraĵo el magazine "20h30 le samedi" elsendita la 14an de decembro 2019, ĉe la franca televidkanalo France 2.

https://www.francetvinfo.fr/societe/video-l-arrangement-de-marilyn-monroe-avec-le-patron-du-mocambo-pour-aider-ella-fitzgerald-a-s-y-donner-en-spectacle_3744457.html

Vanityfair: Rakonto: La bela amikeco inter Marilyn Monroe kaj Ella Fitzgerald

<https://www.vanityfair.fr/culture/people/story/la-belle-amitie-entre-marilyn-monroe-et-ella-fitzgerald/12548>

priserĉi en la loĝio de Ella. Ella rakontis: «Amikoj ludis per kubetoj kaj ili arestis min. Ili enkarcerigis min! Unu el la policistoj diris «Norman, mi devus mortigi vin.» kaj Norman respondis: «Mi nuligos la spektaklon. Jam dumil homoj sidas tie, vi elturniĝu.» Li aplombe alfrontis. Jam en la posttagmezo li forprenis la ŝildojn, kiuj anoncis «rezervita por blankuloj / rezervita por negroj». Mi vere ridis! Ni ne rajtis manĝi, tamen ĵus alveninte, en la prizono ĉiuj petis de mi aŭtografon.» Kiam ili alvenis al la policejo, la ĵurnalistoj jam staris tie. Norman komprenis, ke temis pri embusko. Sekve li procesis kontraŭ la polico por rericervi sian kaŭcion. Pli bone estis ne inciti Normanon Granz.

En 1958 la usona muzikindustrio kreis la premiojn *Grammy Awards* por rekompensi la artistojn. Jam en tiu jaro Ella Fitzgerald ricevas du premiojn. Kiel unua negrino tiel honorigita, ŝi signas la vojon al Dinah Washington, Dionne Warwick, Aretha Franklin, Natalie Cole k.a.

En 1960 dum memorinda koncerto en Berlino ŝi donas kvinminutan version de *How High The Moon*. Ŝia arto apogearas. Entute pli ol kvardek kanzonoj: infanaj, simfoniaj, popularaj, ĵigaj, bebopaj, ŝlagraj, reala elverŝo de pura ĝojo kaj inventemo. Kaj ŝi pasis de kanzono al alia sen konscii pri la vasteco de sia repertuaro. Ankaŭ reaŭskultante ŝian interpretadon de la malnova kanzono *Sweet Georgia Brown* eblas konvinkiĝi pri ŝia svingosenco, tuŝi ŝian potencon sed ne eblas rezisti al ŝia transdono de vivĝojo per ŝia talento. Jen io, kio igas la vivon sur tero pli milda, eĉ ĝuinda.

Male al multaj negraj ĵaz-muzikistoj, Ella Fitzgerald neniam provokis skandalan tumulton. Ŝi nek drinkis, nek konsumis

toksojn, kaj restis diskrete senreaga fronte al la rasa – gravigita de seksa – diskriminacio. Tiun formon de senreaga diskreteco, evidenteco Ella elektis kiel sintenon por ebligi dediĉon de sia vivo, anime kaj korpe, al sia arto, al ĵazo, al ceteraj muzikistoj, siaj publikoj sen ajna rezervo, kaj foje ankaŭ iom al sia familio, siaj proksimuloj, siaj personaj esploroj aŭ al

helpobezonantaj homoj, sia privata mondo. Tamen, kvankam Norman Granz luktadis kontraŭ ĉiuj antaŭjuĝoj, kiuj trafis la kantistinon, kvankam la gazetaro ne hezitis kromnomi ŝin Unuaranga Damo de l' Ĵazo dum antaŭe neniu negrino estis nomita Madame (Sinjorino), Ella Fitzgerald ne eskapis el la rasista, diskriminacia situacio. Foje arestita pro falsa preteksto post koncerto, foje blokita en flughaveno, ĉar ŝi devis lasi sian lokon al blankulo, ŝi decidis diskrete senreage alfronti rasismon. En 1968, ŝi verkis kaj registris sian ununuran kanzonon omaĝe al Martin Luther King, murdita en aprilo la saman jaron.

Ekde la fino de la 1950aj jaroj kaj dum pli ol dudek jaroj Ella kantadis dum sinsekvaj turneoj.

Ella, piliero de Jazz at the Philharmonic por senfina turneo

Ŝi sursceneje aperis en dekoj da landoj sur ĉiuj kontinentoj. La orkestro Jazz at the Philharmonic multege vojaĝis. Kvazaŭ ĉiutage nova urbo, nova lando, nova koncertejo, nova publiko... Norman Granz konsideris tiujn koncertojn kiel armilojn kontraŭ antaŭjuĝoj. Liavorte tiu orkestro estis «demokratio de talentoj, kie haŭtkoloro nenion valoras.» Li estis justa kaj konscia pri la haladzaj efikoj de segregacio. Tiutempe tiu egalrajta vidpunkto estis revolucia ĉe blankulo.

Tamen la rilatoj inter Norman Granz kaj Ella foje estas malfacilaj. Li ofte trudas al ŝi siajn muzikajn elektojn kaj lia postulo ĉion estri pezas pli kaj pli. Norman ĉiam diris al Ella kaj Count Basie, kiujn kanzonojn ili ludos, kantos, per kiu kanzono komenci..., kvazaŭ ili estus nur peonoj.

Li foje estis malafabla, ĉar li volis ĉiam, ĉiujn, ĉion kontroli. Iun tagon dum Frank Sinatra parolis kun Ella, Norman aliris por diri al Frank per kiu kanzono li komencu la koncerton. Frank forpelis lin el la koncertejo. Orgojla, Norman asertis al Ella, ke neniam plu ŝi kunlaboros kun Frank. Ella restis senvorta, egala al si mem.





“Gravas
ne de kie vi venas,
sed kien vi iras.”

Ella hejme

Plej grandan parton de sia vivo Ella Fitzgerald pasigis vojaĝante pro turneoj. Ŝi tiel oferis sian personan kaj familian vivon. Inter du turneoj ŝi vivis kun sia filo en Los-Anĝeleso. En la 1950aj jaroj la enloĝantoj de Beverly Hills malaprobis la enloĝadon de negroj en sia kvartalo. Kvankam jam fama stelulino, Ella ne povas akiri domon. Norman aĉetos ĝin propranome. Ŝi konfesis, ke ŝia plej granda bedaŭro estis, ke ŝi ne pasigis sufiĉe da tempo kun sia filo, Ray Brown Jr.

Ray Jr bedaŭras: «Ni estis malkunaj dum longaj periodoj kaj ni ne sciis, kiam ni revidos nin. Foje mi sentis min soleca kaj muziko helpis. Muziko konfortigas la koron. La kanzono de Ella -, kiun mi preferas estas How Long Has This Been Going On. »

Ella: «Kvankam oni multe kantadas, antaŭ vasta publiko, kiam oni revenas hejmen, eblas senti sin soleca. Oni bezonus iun por partigi siajn problemojn. Fidinda homo, al kiu eblus konfidi intimaĵojn al neniu alia direblajn. Sen viro, hejmo ne estas hejmo. Mi ŝategas mian laboron, tial mi ne reedziniĝis. Mi neniam povos ĉesi kanti kaj tiu viro devus akcepti, ke mi adoras mian profesion. Mi devus malpli labori, esti dommastrino. Ja, vere eblas. Kaj kiu ne tion spertis, ne vivis. Virino devas vivu tiun sperton kaj mi pli kaj pli sentas tiun bezonon. Mia filo grandiĝas kaj mi deziras pasigi pli da tempo en mia hejmo... Sed mi adoras kanti kaj mi opinias, ke se mi devus ĉesi kanti, mi ne scius, kion fari. Post unu libertempa semajno mi pretas reforiri. Muziko kaj publiko ankaŭ

estas mia familio, kaj mi bezonas scii, kiel ĝi fartas.»

Ray Jr forlasis la hejmon en la 70aj jaroj. Li fariĝis muzikisto. Dum dek jaroj Ella kaj Ray kvazaŭ ne havis kontaktojn. Ŝi pasigis sian vivon sur la vojoj. Kiam ŝi ne laboris, ŝi restis sola hejme. Neniam Ella povus esti dommastrino, kuiri por viro. Ŝi preferis kanti por li. Kaj ŝi estis ĉiam preta por forflugo. Ŝi pli feliĉis antaŭ publiko, kiu kriis «Ella, ni amas vin!» Ŝiaj akompanantoj raportis, ke ĵus elirinte el la scenejo, ŝiaj unuaj vortoj ĉiam rilatis al la publiko kaj neniam al ŝia propra sukceso.

Panjo Ĵazo

Fine de la sesdekaj jaroj Ella estas invitita por televidelsendoj kun la plej eminentaj steluloj. Sed kvankam kromnomata «Unuaranga Damo de la Kantarto» nur unu elsendo estis al ŝi entute dediĉita. Ŝin amis, admiris kaj respektis la publiko. Ankaŭ la muzikistoj. Ŝi penis elteni proprajn streĉojn kaj ĉagrenojn. Sed ŝi havis personan rimedon por transformi suferon, malbonon, afliktiĝon, honton en ion pozitivan. Ekzemple en ĝojon. Post sesdekjara kariero la infanoj nomas ŝin: Mama Jazz (Panjo Ĵazo). Ŝin tio kortuŝas. Ray Jr, ŝia filo, rakontas: «Iun tagon mi troviĝis en Ukrainjo. Malvarmegis, terure frostis. Ni kurante eliris el la koncertejo kaj saltis en la buson. La vitroj estis kovritaj de prujno. Kaj tiam mi aŭdis frapi ĉe la fenestro. Ekstere staris viro, kiu diris: Mi adoris vian patrinon, ŝi estis mirinda homo.

teksto daŭrigota sur paĝo 70a

LA MORITATO DE **MACKIE MESSER**

La Moritat von Mackie Messer fariĝis mondkonata pro la Trigroŝa Opero de Berthold Brecht originale kreita en 1928. Brecht uzis la stilfiguron de Moritato* por informi la publikon jam en la komenco de la opero pri la persono de Mackie Messer. Diversaj kantistoj poste interpretis la kanton laŭ propra maniero, i. a, Louis Armstrong. Origine la kanto estu kantata laŭ la tono de gurdo.

Kiam Ella okaze de sia fama koncerto kantas en Berlino en 1960, neniu alia usona artisto venis tiel proksime de Sovet-Unio. Unu jaron antaŭ la konstruo de la Muro. Norman Granz sugestis al Ella kanti la freŝdatan ŝlagron Mack the Knife, traduko de la Moritato. Ŝi konsentis sed ne sentis sin certa memori la parolojn. Kaj meze de la kanto efektive pro memorvakuo Ella rimarkinde improvizas. Profesiece, ŝi senhezite daŭrigas sian interpretadon alternante skatkantadon kaj improvizitajn parolojn. Ĉi tiu versio de Mack the Knife restas kiel unu el la plej famaj sukcesoj de Ella. La sekve eldonita LP-albumo Ella in Berlin estis pli ol milionope vendita kaj ricevos du Grammy-Awards rekompencojn.

Du jarojn poste Ella revenis en Berlinon. La registrado de tiu koncerto en la tiama Sportpalaco restis zorge protektata de Norman Granz de 1962 ĝis 2020. Tiam retrovita funde de skatolo, ĝi estis eldonita sub titolo Ella: The Lost Berlin Tapes (La perditaj Berlinaj bendoj) en oktobro de tiu sama jaro. Ĝia publika versio de Mack the kniffe estas rete aŭdebla ĉe Jutubo: https://www.youtube.com/watch?v=lhg2VlayHTI&feature=emb_title

Ĉu ankaŭ vi skatkantu meze de la Moritato pri Mackie Messer, tradukita de K. Schulzer en Esperanton kaj publikigita en la kanzonaro Verda Trobadoro de SAT-Junulfako?



B. Brecht



K. Weill



Teksto:
Bertold Brecht ;
muziko: Kurt Weill
Traduko: K. Schulze

Skatu!***

Kaj la ŝarko havas dentojn,
Montras ilin sen hezit'
Kaj Macheath** tranĉilon havas,
Kaŝas bone ĝin al vid'

Ĉe Tamizaj akvoj verdaj
Oftas nun subita mort'
Ne la peston tion kaŭzis,
Estas la Macheath-a ord'


Jenny Towler oni trovis
Kun tranĉil' en la korsaj',
Mackie sur la kaj' ne scias
Ion pri ĉi maljustaj'.

Kaj Schmul Meier** malaperis
Kiel kelka riĉa vir'.
Lian monon havas Mackie
Sen riproĉo pri l'akir.

Dum la Soho-brulo mortis
Sep infanoj kaj oldul'.
En l'amaso staras Mackie
Lia scio estas nul'.

Ho, de l' ŝarko la naĝiloj
Ruĝas ĉe la sangverŝad';
Mackie Messer krimas gante,
Zorgas lerte pri kaŝad'.

Ĉar sen lumo estas unuj,
Kaj aliaj en la lum'.
Nur ĉi lastajn oni vidas,
Sed ne tiujn en mallum'.



* Moritato: el la germana Moritat estas kanto prezentita de surstrata kantisto (akompanata de gurdy) kun plejparte monotona melodio, kiu rakontas teruran, plorigan historion (montritan per bildoj sur tabulo), kiu finiĝas per instrua moralo.

** prononcu: Mekhit; Ŝmul Majer

*** «Skati» NePIVa verbo laŭ «skatkantado» el Eo-Vikipedio: onomatopeaj silaboj improvizitaj nur voĉe uzataj de ĵazaj kantistoj kiel imitaĵo de muzikiloj.

Kaj li volis donaci al mi florbukedon... (...) De tempo al tempo mi diris al ŝi, ke mi baldaŭ rehejmiĝos. Ŝi respondis, ke ŝi kredos, kiam ŝi vidas min. Fine mi vere revenis nur kiam mi eksciis, ke ŝi estis grave malsana. Niaj vojoj fordisiĝis. Tamen mi neniam vidis tiom da sindonemo ĉe iu, kiu scias, ke ne plu longe daŭros la vivo. Ŝi ĉiutage zorgis pri aliuloj. Nekredebla afableco.»

Ella multe amis la infanojn kaj kreis fondaĵon. Ĝi ebligas edukadon, sanprizorgojn kaj loĝadon por bezonataj infanoj. Tuj kiam ŝi vidis bebon, ŝi alproksimiĝis, milde salutis kaj ekkantis.

Meze de la okdekaj jaroj evento ŝajne anoncis la finon de la kariero de la artistino. Atestanto raportas: «Ni turneis jam de dekdu tagoj kaj jam kvarfoje koncertis. Ni estis en la hotelo Hilton ĉe la Niagara akvofalo. Mi ĵus pagis la restadon, kiam la pordoj de la lifto malfermiĝis kaj mi ekvidis Ellan kun mano sur brusto. Ŝi alkroĉis sin al Peter, la organizanto de la turneo. Ŝi diris, ke ŝi ne plu povis spiri. Ŝi suferis kor-malforton.»


Fontoj:

El la retejo jazzhot.net internacia revuo pri ĵazo ekde 1935:

<https://www.jazzhot.net/PBCPPlayer.asp?ID=1901715>

El la filmo de Leslie Woodhead: Ella Fitzgerald - Just One of Those Things

El la retejo de nacia radio France-Musique <https://www.francemusique.fr/jazz/10-petites-choses-que-vous-ne-saviez-peut-etre-pas-sur-ella-fitzgerald-34001>



Kun rasismo ni devis
vivi. Kaj hodiaŭ ni daŭre
vivadas kun.»

Ray Brown Jr

Ella kaj Picasso

Norman Granz estis kolektanto de verkoj de Picasso. Li persone konis la pentriston kaj iun tagon li proponis al Ella renkonti lin.

Ella respondis: «Ne, hodiaŭ posttagmeze mi devas fliki ŝtrumpojn.»

Hela Ella

SVINGU VIVO!



Pri ŝia arto

HELA ELLA



Indotitas Squad Print Template Studio

Ella Fitzgerald sendube estas unu el la plej eminentaj kantistinoj de la 20a jarcento, kaj certe la elstara ĵazkantistino. Ĵazambasadorino tra la tuta mondo, samgrade kiel Luis Armstrong aŭ Duke Ellington, al sia eksterordinara talento ŝi ŝuldas universalan agnoskon kaj ĉiajn honorojn. Ŝin rekompencis dektri Grammy Awards, akcepto en la Blanka-Domo far Ronald Reagan, omaĝo de Bill Clinton kaj ordenoj de Komandoro pri Artoj kaj Beletroj far la franca kulturministro Jack Lang en 1990. Longe de ŝia vivo entute dediĉita al kantarto, ŝin akompanis multaj talentoplenaj muzikistoj, kiaj i.a. Chick Webb, Dizzy Gillespie, Duke Ellington, Louis Armstrong, Count Basie, Oscar Peterson, Paul Smith, Tommy Flanagan, Jimmy Jones, Jimmy Rowles, Ray Brown, Coleman Hawkins, ktp.



Ŝi ne lasis sin kapti de ununura stilo, sed male montris sian kapablon prikanti muzikgenrojn tiel diversajn kiel la popolan kanzonaron, varieteon, realisman repertuaron, ĵazon, muzikan komedion, bosanovon, kaj eĉ ritmenbluson, kaj popmuzikon...

Ofte ŝin vokis kinistoj por filmoj: *Pete Kelly's Blues* (Jack Webb, 1955), *Saint Louis Blues* (Allen Reisner, 1958), *Let No Man Write my Epitaph* (Philip Leacock, 1960), *Duke & Ella in Antibes* (Norman Granz, 1966).

Ella havas larĝe malfermitan menson. Jen unu el ŝiaj ĉefaj kvalitoj. Ŝi ne lasis sin kapti de ununura stilo, sed male montris sian kapablon prikanti muzikgenrojn tiel diversajn kiel la popolan kanzonaron, varieteon,



>> Serve al la muziko



>> Kristalvoĉo

realisman repertuaron, ĵazon, muzikan komedion, bosanovon, kaj eĉ ritmenbluson, kaj popmuzikon kun sama feliĉiga sukceso, sen streĉa klopodo kaj daŭre kun rafineco. Tre diskreta, kvazaŭ timema, ŝi verŝajne suferis pro manko de amo dum sia infanaĝo. Tion ŝi provos kompensi per amo de la publiko. Ankaŭ grandanima kaj zorgema ŝi kapablis same entuziasmigi homamasojn kiel siajn akompanantojn. Ella ricevis kromnomon «Kristalvoĉo» post reklamfilmeto favore al kasedoj Memorex, dum kiu ŝi rompis glason simple per sia voĉo. Ŝia tonetendo havis trioktavan atingopovon (dukajduonan laŭ aliaj fontoj). Tio ebligis al ŝi ĉiajn harmoniajn aŭdacojn. Ŝian kantadon ne kolorigas blusoplenoj, kiel ekzemple ĉe Billie Holliday, kvankam ŝi pruvis, ke ŝi kapablis ĝin kanti kun intensega emocio. La arto de Ella estas la celebrado. Ŝi varme, pasie kantas. Kaj ŝia voĉo plenas je vivmildeco kaj lumiga ĝojo. Tio tenas ĝin for de ribelema krio. Dank' al perfekta prononcado Ella, kiel neniu alia, valorigas la vortojn. Ŝia neniam trompebla ritmosento kaj ŝia voĉa fluo

ebligis al ŝi improvizi kiel instrumentisto. Ella, kiu suferis dum sia tuta vivo komplekson pro sia neloga korpaspekto, kompensis tiun handikapon per eksterordinaraj voĉaj kvalitoj: ĉi tiuj rivelas graciecon, elegantecon kaj rafinitecon, kiuj donas al ŝia kantarto forton de ĉarmo kaj seduktado. Kaj kvankam senigitaj de erotikaj ecoj, kiel ekzemple ĉe Billie Hollyday, ili tamen same ensorĉadas.

Ella estas rimarkinda aparte pro sia disponebleco serve al la muziko. Kaj ŝia malfermemo ebligas al ŝi brile kanti la diversajn stilojn. Ĉiam el siaj samtempe personaj kaj respektemaj interpretadoj ŝi ekfajrigas flamojn, kapablaj igi fascinajn melodion, kiu restus sengusta sen la varma sindonemo de la kantistino.

Voĉa potenco, neriproĉebla tekniko, fantazio, humuro, delikateco, eleganteco, tenereco, ĉarmo, mildeco, rafiniteco, malstreĉeco, svingemo, perfekta parolturno, klareco de la prononcado, kontrolo kaj majstreco, atentemo, disponebleco, totala manko da neutilaj troigemo kaj emfazemo, jen la karakterizoj de ŝia kantarto, kiuj radiigas varmon, lumon kaj grandanimon, kaj kronas Ella-n Fitzgerald kiel la Primadonon de l' ĵazo.

Fonto: *Ella Fitzgerald All my life*
- Ed. Le Monde du Jazz -
teksto Rémy Reamackers –
feb. 2009.



Lasta verko de Christo kaj Jeanne-Claude: Triumfa Arko en Parizo

Laŭrenco Septier


Ĝenerala enkonduko

Multaj homoj asertas, ke iuj nuntempaj artistoj faras absolute ion ajn, kaj deklaras: «tio ne estas arto!», kaj se la lasta verko en Parizo de Christo renkontis vastan sukceson, kritikojn ankaŭ ĝi ricevis tute same: «tio ne estas arto!» Nuntempa arto ne estas io spontana, sed venas post longa historio de tio, kion oni nomas «arto», kies «signifo», rolo, socia rilato kun «spektantoj», ne estas samaj laŭ la tempo, laŭ la socia kaj historia kunteksto.

Memkompreneble, ne eblas ĉi tie eĉ resumi tion, dikaj libroj ekzistas, eĉ enciklopedioj, pri tio. Ni ekos je la fino de la deknaŭa jarcento en Okcidento, kiam multaj ŝanĝiĝoj aperis.

Laŭ iuj tio komenciĝas kun *Paul Cézanne*, laŭ aliaj kun *Édouard Manet*. Jes ja ankaŭ aliaj, sed tiam oni pensis unue pri pentrarto kiel «ĉefo» de l' artoj (tute apude kun skulpturo kaj desegno). Tiam pentrarto ne plu estis ligita al eklezio, oni jam delonge ne plu pentris nur pri religiaj epizodoj aŭ temoj, la pentrado per oleo sur aŭtonoma tolo jam delonge anstataŭigis la freskon, la temoj ŝanĝiĝis ĝis io, kion oni foje taksis «vulgara», ekz. realismo, ekz. *Gustave Courbet*. Sed pentrarto restis pentrarto, io inter ideoj (foje ne tre definitaj) kaj ĉefe «talento» por bone kaj bele pentri, allogi por la spektantoj, same kiel faras lerta metiisto. Ĝis fino de l' deknaŭa jarcento, pentri estis pli lerte fari iun bildon, ol «pensi». Tiam iu *Marcel Duchamp*, dekomence pentristo mem, komplete modifis tion kaj lia vojo iris de strikta pentrado ĝis, i. a., tiuj famaj *Ready-Made*.

Depost liaj esploroj, arto povas esti absolute io ajn, eĉ nenio¹, sen ia ajn prikonsidero, ĉu la artisto materie ĝin faris aŭ ne (pri tio, bv. vidi en LKK 163 mian tradukon de «*Marcel Duchamp parolas pri Ready-Made*»).



Por sufiĉe multe da homoj, produktaĵoj kiel tiuj de Christo «ne estas arto». Rapide ni solvu la problemon: unue, Christo lernis ekde 1953 pentrarton, skulpturon kaj arkitekturon en la belarta lernejo de Sofia (Bulgario), due li estas agnoskata, kiel artisto, de aliaj artistoj el la tuta mondo, li mem diras, ke liaj produktaĵoj estas artaj verkoj, kaj l' oficialaj institutoj (muzeoj, galerioj, kolektoj) ankaŭ aprobas tion. Do, simple socie, li estas artisto; kiel dirus *Simon Leys*, pomarbo produktas pomojn, do Christo, artisto, produktas artajn verkojn. Por mi, tio sufiĉas. Alidirite kaj krome: «Artisto ne estas metiisto; liaj verkoj ne estas objektoj sed agoj. (...) tio [la formo] estas maŝino produktanta signifojn.» (*Oktavio Paz pri Marcel Duchamp*) aŭ: «Pentrado estas *cosa mentale*»² (*Leonardo da Vinci*).

En la t. n. nuntempa arto, ni diru ekde 1945, troviĝas multaj ĝenroj, kiuj prilaboras plej

¹vd. la libron *Six Years: The dematerialization of the art objet from 1966 to 1972*, – *La malmateriigo de la arta objekto de 1966 ĝis 1972*, New York, 1973

² Mensa afero

diversajn materiojn laŭ multegaj manieroj kaj intencoj. De, tamen, pentrado, al videoarto, fotografio, *performances* (± spektakloarto), korpa arto, instaladoj, skulpturo, arto *in situ* (surloka), ĝis komputilarto, retarto, ktp. El ĉio tio du i. a. nuntempe estas interesaj rilate al Christo: konceptarto, landarto.

L'unua proponas traktadon de arto ja estetike, sed per konceptoj kaj ideoj pri ; tamen konceptarto ne nur estas ideoj kaj konceptoj, sed diversaj proponoj per tekstoj, desegnoj, projektoj, kiujn oni do povas materie ekspozicii ; ĝi ne estas specifa periodo, nek strukturita movado. Krome ankaŭ intuicio intervenas. Oni trovas bonajn informojn en la libro, kiun mi citis je noto 1, aŭ tutsimple sur la reto. La dua temas pri artistoj, kiuj laboras en la natura spaco, plejofte tre grandskale, per diversaj transformadoj de la naturaj elementoj. Plejofte la verkoj estas en vastaj pli malpli dezertaj lokoj kaj foje iom post iom malaperas pro erodo, pluvoj, ks. Unu el la plej famaj inter tiaj verkoj estas *Spiral Jetty* (Spirala Ĝeto) de *Robert Smithson*. La verkoj de *Richard Long* ankaŭ estas famaj.

Verkoj de Christo estas kaj konceptaj: projektoj, multaj antaŭdesegnoj, studoj, ks, kaj landartaj ĉar li laboras rekte ĉu en naturo, ĉu kun monumentoj, do urbe, kiujn li kovras per tolaĵo.

Nun mi devas precizigi, ke li konstante laboris kun sia edzino, *Jeanne-Claude Denat de Guillebon*, do la vera aŭtoro de la verkoj estas *Christo et Jeanne-Claude* esp. *Christo kaj Johan'-Klodja'*, ne nur de sola Christo. (Fakte mi preferas poste daŭre uzi ilian neesperantigitajn nomojn, kaj faros same kun aliaj por faciligi traretan serĉadon).

Eta biografio

Christo Vladimiroff Javachev naskiĝas la 13-an de junio 1935 en Gabrovo (Bulgario), mortas en Novjorko la 31-an de majo 2020.

Jeanne-Claude Denat de Guillebon naskiĝas la 13-an de junio 1935 (same!) en Kazablanko (Maroko) kaj mortas en Novjorko la 18-an de novembro 2009.

Li lernas en la Belarta Akademio de Sofio (Bulgario) kie li nur povas tie resti kvar jarojn anst. ok, ĉar li ne estas «pura» bulgaro, antaŭ ol iri en Pragon, 1956.

Ŝi lernas latinan lingvon kaj filozofion en Tuniso.

³ Multaj nomoj pri arta ĝenroj estas en la angla kaj malfacile tradukeblaj sen perfidi iliaj senson. Ĉi tiu normale signifas spektaklon» sed en la arta kampo tiu signifo komplete ŝanĝiĝis al specifa, tial oni plejofte uzas la anglan terminon.

⁴ Sama rimarko. Tie, mi fonetike esperantigas.

Post duonjaro kiel studento en la Belarta Akademio, 1957 en Vieno (Aŭstrio), li alvenas en Parizon.


En 1958 ili ekkonatiĝas. Lia propra laboro konsistas el pakitaj ĉiutagaj objektoj (la «inventaroj»).

Ekde 1961 naskiĝas (i. a.) projektoj por paki publikajn konstruaĵojn, kiuj estas iliaj ambaŭaj verkoj.

En 1964 ili establiĝas en Novjorko. Ekde tiam iliaj verkoj estas pli kaj pli grandskalaj kaj imponaj, tra la tuta mondo, en Svisio, Germanio, Usono, Aŭstralio, Italio, Francio, Japanio, Britio. Pluraj el ili ne estas pakitaj konstruaĵoj sed aliaj materioj kaj rimedoj estas uzitaj (vd. ĉi tie la postajn fotojn, kaj iru reten!)

Ne eblas verki bibliografion ĉar ekzistas multaj libroj en pluraj lingvoj, oni mem trarete serĉu.

La verkoj



Pro la amplekso de l' verkoj, necesas multaj kunlaborantoj por ilin realigi: arkitektoj, diversaj metiistoj inter kiuj alpistoj ; por la *Reichtag* en Berlino, 11 uzinoj laboris por prepari ĉiujn materialojn, 220 laboristoj estis dungitaj, kaj ankaŭ 600 neprofesiaj dungitoj. Al tio aldoniĝas administraj kunlaborantoj por trovi la necesajn subtenojn kaj permesojn de oficialaj instancoj kaj aŭtoritatoj. Ankaŭ la financa aspekto estas grava, kaj la mono trovata per vendado de desegnoj, pentraĵoj kaj aliaj,

realigitaj por la projekto. La projekto mem pleojfite de l' unua ideo ĝis konkreta realigo, povas necesigi plurajn, eĉ multajn jarojn (sesdek jaroj por la nuna Triumfa Arko, unue konceptita en 1961). La flanko arkitektura kaj urbaniza estas parto de l' projektoj. La plej grava karaktero de tiuj verkoj estas la nedaŭro, portempeco, efemereco kaj uzo de tolo tradukas tion.

Unuaj verkoj: pakitaj objektoj (i. a. «Inventaroj»), 1960-aj jaroj

Kiam Christo estis en Bulgario, kie tre forta stalinismo regis, li estis devigita fari social-realismajn desegnojn kaj pentraĵojn pro kiuj li ricevis kritikojn ĉar ekzemple li desegnis kamparanojn ripozantajn (imagu!!!), trinkante kuŝantajn en fojno. Alveninte en Parizon, li renkontis artistojn de la t. n. Nov-realistoj franca movado, kiuj laboris i. a. kun ĉiutagaj



objektoj. Ek de tiam li forlasis pentrarton kaj ekuzis tolon ne plu por pentri, sed por paki objektojn. La objektoj foje ankoraŭ aperis, pakitaj per travidebla plasto, aŭ ne. Lu artkritikisto *David Bourbon* trovis belan frazeton por tion resumi: «*Revelation through concealment*» (revelacio per kaŝado). Tio restos fakte kiel moto de Christo kaj Jeanne-Claude.

Aliaj verkoj

Nun, iomete da «intimaj» verkoj, kiuj estis faritaj komence de la 1960-aj jaroj, la **Store Fronts** (Butikaj montrofenestroj) de 1964.

Konstruitaj, kiel pentraĵoj/muraj skulpturoj, ili aspektas, kiel montrofenestroj, sed interne, laŭlonge de la vitro, estas papero aŭ tolo por «kaŝi» la supozitajn montritajn objektojn kaj tio kreas strangan impreson, specon de enigmo.




Pakitaj konstruaĵoj kaj aliaj grandskalaĵoj

Ekde 1961, Christo kaj Jeanne-Claude kunlaboras pri pli ampleksaj projektoj. Mi elektis sep el ili. Ankaŭ estas multaj ne realigitaj projektoj, aŭ forlasitaj.

Valley Curtain, Rifle, Kolorado, 1970-72 (Kurteno por la Valo)

Pakita portreto de Jeanne-Claude, 1963, oleo sur tolo

La unua verko de Christo kaj Jeanne-Claude en naturo. Dudek ok monatoj estis necesaj por prepari ĝin, kunlabore kun inĝenieroj. Kiel ĉiam poste, multaj kunlaborantoj estis necesaj por produkti tiun efemeran verkon, eble la plej efemera ol ĉiuj, ĉar post 28 horoj necesis malmunti ĝin pro vento de pli ol 100 km/h.



Surrounded Islands, Biskayne Bay, Miami, Florida, 1980-1983 (Ĉirkaŭitaj insuloj)
Laŭ mi, tiu verko estas unu el iliaj plej belaj. Pri multaj flankoj, ĝi estis vera defio pro la loko kaj la akva dimensio: por «paki» tiujn dekunu insulojn, necesis la kunlaborado de du advokatoj, iu marbiologiino, du ornitologoj, maringeniero, kvar specialistaj inĝenieroj, kaj entreprenisto. Permesoj estis petitaj al naŭ oficialaj instancoj. 430 personoj estis

necesaj por realigi l' aferon. Poste, memkompreneble, oni ĉion demetis sen okazi damaĝon.

Kiel kutime, la verko estis financita nur de la vendo de Christo kaj Jeanne-Claude verkoj: ili neniam akceptis ion de sponsoro, aŭ iun ajn stipendion. Tio estas parto de ilia ideo pri entuta financa aŭtonomeco.



La «Nova Ponto» pakita, Parizo, 1975-1985

Ĝi estas la plej olda ponto de Parizo, fr. «Pont Neuf» ekkonstruita en 1578, finkonstruita en 1606 sub la regno de Henriko la 3-a. Konsiderata kiel gravega historia monumento, sed kiu jam ricevis diversajn modifojn en la pasinto, la projekto de Christo kaj Jeanne-Claude ĝin paki tamen renkontis multegajn malfacilaĵojn dum fakte estis nova paŝo en tiu «tradicio» de metamorfozoj. Post dek jaroj da diskutoj kun oficialuloj, kaj ankaŭ kun simplaj homoj vivantaj en la kvartalo, ili finfine ricevis la aprobon de la tiama urbestro de Parizo, *Jacques Chirac*, kaj de *François Mitterrand*, tiama respublika prezidanto.


En septembro 1985, 300 profesiaj laboristoj komencis la instaladon. 600 personoj utilis pri la informado de l' vizitantoj.

40 876 kvadradaj metroj da poliamida tolo, 13 076 metroj da ŝnuroj kaj 12,1 tunaj da ŝtalaj ĉenoj estis uzitaj. Multaj kompanioj,

francaj kaj usonaj, helpis al la realigo de l' projekto.

Christo kaj Jeanne-Claude diras pri siaj projektoj, ke ili malsimilas al verkoj de arkitekto, ĉar arkitekto povas kompari sian projekton kun jam konstruitaj aĵoj por havi pli precizan ideon kaj vidon de sia propra. Ili, ne: neniu iam ajn pakis ponton, ne estas komparebleco. La efektivigita konkreta artaĵo estas ne entute antaŭvidebla rezultato. Tiu rezultato dependas ankaŭ de formalaj, vidaj, simbolaj, politikaj, sociaj kaj historiaj fortoj. El la du tempoj, la unua estante projekto, desegnoj, planoj, mapoj, kaj la dua, nome reala konstruado, ĉi lasta estas por ili la plej ĝoja kaj kontentiga: ĝi naskigis!

Tiuj, kiuj vizitis ĝin povis gustumi kaj apreci tiun kvazaŭ miraklan novan «Nova Ponto»,



sur kiu la tolaĵoj reduktis la bruojn, kiel en sonĝo; 36 jarojn poste, tiu impresio restas, multe pli «poezia» ol «koncepta»: tio jes ja estas daŭre belega artaĵo.

The Umbrellas, Japan-USA, 1984-1991 (La pluvombreloj, Japanio-Usono)

La ideo estis fari iun verkon samtempe en du landoj, kaj prikonsideri ĝin, kiel ununuran verkon. En Japanio 1 340 bluj, en Usono 1 760 flavaj pluvombreloj. Dank' al tiu verko elvidiĝis, i. a., diferencoj kaj similaĵoj inter la vivmanieroj, la spaco, la teruzo, en valoj, unu 19 km longa en Japanio (Ibaraki), la alia 29 km longa en Usono (Kalifornio).

Denove kelkaj detalaj ciferoj, multnombraj petoj al terposedantoj, ks, plene estus iomete teda temo, sed tamen iuj: la konstruo ekis en decembro 1990 kaj finiĝis en oktobro 1991. Entute 500 laboristoj, 960 helpantaj studentoj en Usono kaj kaj 920 en Japanio helpis al la instalado de l' pluvombreloj, ĉiu estis 6 metrojn alta, kaj 8,66 metrojn diametra. La verko daŭris 18 tagojn, poste oni malmuntis ĝin kaj ĉiuj grundoj estis tute restarigitaj.

L' entuta kosto, 26 milionoj da dolaroj, estis kiel kutime entute pagitaj de l' artistoj.



Wrapped Reichstag (Envolvita Reichtag), Berlino, Germanio, 1971-1995

La projekto por la Reichtag estis rifuzita trifoje, en 1977, 1981, 1987. Necesis voĉdono de la entuta germana Parlamento por ĝin konstrui (292 por, 223 kontraŭ, 9 sindetenoj). *Willy Brandt* entute apogis, sed poste *Helmut Kohl* malaprobis...

Tiu palaco, konstruita en 1894, bruligita en 1933, plejparte detruita en 1945, estis restarigita en 1960 kaj restas grava simbolo de demokratio. En ĝi laboras la germana parlamento. La lasta renovigo estas konfidita al la fama arkitekto *Norman Foster*, kiu aldonis la vitran kupolon anst. la malnova, detruita. Dum tiu renoviga laboro, Christo kaj Jeanne-Claude pakas la Reichtag-on.

Pri ĉio tio, Christo parolas pri iliaj verkoj kiel io «nomada» (uzo de tolo, kiel iu tendo) kaj aldonas: «neniu povas aĉeti tiujn projektojn, neniu povas posedi ilin, neniu povas fari komercadon per ili, neniu povas vendi bileton por ilin vidi, eĉ ni mem ne posedas la verkojn. Tiuj estas pri libereco.



Libereco estas malamiko de l' posedado, kaj posedado estas egala al daŭreco, konstanteco. Tial la verkoj ne povas restadi.» Kvankam «nomadaj», iliaj verkoj, dum la tempo de ilia konkreta estado, tamen

estas imponaj, samtempe leĝeraj kaj grandiozaj.

The Floating Piers (La flosantaj pilotoj), Iseo Lago, Italio, 2014-2016

Tiu verko proponis al la vizitantoj tri-kilometran promenadon sur la akvo de Iseo lago, per flosanta sistemo.

Post du neefektivigitaj projektoj, unu por Bonaero (Argentino), 1970, la alia por Tokio (Japanio), 1996, kaj post la morto de Jeanne-Claude, Christo sukcesis, kune kun pluraj personoj inter kiuj la fama artkritikisto kaj kuratoro Germano Celant (kiu siatempe rivelis la movadon «Arte Povera»), realigigi tiun verkon.

Ĝi estis iel «magia» por la vizitantoj, kiuj imagis, ke ili paŝas sur la akvo, aŭ eble sur la dorso de iu baleno.

Tio fakte estas komuna sento: la verkoj de Christo kaj Jeanne-Claude estis «magiaj».



Konklude

Al ĉio tio, mi aldonu parolojn de Christo kaj Jeanne-Claude: «Ni faras nur tion, kion ni ŝatas fari», «Nia entuta verko estas pri libereco», «Niaj projektoj estas, kiel fabelaj ekspedicioj». Ili pensas, ke iliaj verkoj ne

«signifas» ion socian, moralan, filozofan aŭ politikan, sed nur «estas» per si mem. Mi mem plene konsentas kun tiuj ideoj pri «kio estas arto?»

Flanke

Pluraj artistoj ankaŭ faris «pakitajn verkojn», inter kiuj du ege interesaj, kvankam malsimilaj: tiu de **Man Ray**, «La enigmo de Isidore Ducasse» referencas citaĵon de *Isidore Ducasse*, konata sub la plumnomo *Comte de Lautréamont*, nome «Bela, kiel la hazarda renkontiĝo de kudromaŝino kaj pluvombrelo sur dissekcia tablo.»⁵ Tiu frazo iĝis kvazaŭ moto de la surrealismo. La enigmo estas simpla: ĉu interne vere estas kudromaŝino kaj pluvombrelo? La spektanto ne povas scii: kredi aŭ ne kredi?



Jen alia mistera peco de **Joseph Beuys**, *Infiltration Homogen für Konzertflügel, der größte Komponist der Gegenwart ist das Contergankind, (Homogena enfiltriĝo por koncerta vostopiano, la plej granda komponisto de nia tempo estas la Kontergan infano)*⁶, 1966. Tiu verko troviĝas en la Nacia Moderna Arto de Parizo («Beaubourg»). La piano estas pakita per unu el la preferitaj materioj de Beuys, felto. La celo estas definitive malebligi iun ajn ludi kaj krome unu el la proprecoj de felto estas izoli (el ĉio, lumo, sono, ekstera varmece, konservi internan varmecon, ktp.). Felto estas iel primitiva materio fabrikata per bestaj haroj, dum piano estas la produktaĵo de alte


⁵ la rencontre fortuite sur une table de dissection d'une machine à coudre et d'un parapluie.» (El la Kantoj de Maldoror', Kanto VI, strofo 1)

⁶ *Kontergan'* estis la komerca nomo de Talidomido, sedativa medikamento por virinoj, kiu okazigis gravajn korpajn misformaĵojn de novnaskitoj en la 1960-aj jaroj.

kulturita socio, fabrikata per «noblaj» materialoj. Alia verko, ankaŭ kun piano (ne pakita, sed fermita), estas montrata en Ĉambro, kies muroj kaj plafono estas komplete plenigitaj de dikaj feltaj ruloj: kiam oni troviĝas interne, oni sentas ion, kiel grandan silenton, iomete da varmece, trankvilecon. La ruĝa kruco memkompreneble estas tre simbola pri danĝereco, vundoj, kuracado, temoj senĉese traktitaj de Beuys. Do, tre malproksime de Christo!



Fina noteto: Ĉiuj fotoj de la verkoj de Christo kaj Jeanne-Claude estas © Wolfgang Voltz, escepte de la unua © mi mem, kaj de la pakitaj boteloj, © Eeva Inkeri. Tiu de la verko de Man Ray (el Boijmans Museum, NL) ne mencias la kopirajton kaj tiu de Joseph Beuys, © Bertrand Prévost.



Kelkaj rimarkoj pri Christo kaj la pria artikolo de Laŭrenco, far nov-surrealista amatora pentristo

Serĝo Sir'

1 - Artisto ne plu estas metiisto.

Se la «jam-faritaĵoj» (ready-made) de Marcelo Duchamp igis kompletan ĝiron en la arta konceptado, notindas ke por Duchamp mem, temis pri reago kontraŭ la burĝa art-koncepto, pli por ĝia postulo pri ŝvito (nome 1% da inspiro kun 99% da ŝvito) ol pro ĝia emo konsideri artaĵon varo, kio estis pli la kialo por la artaj movadoj Dadaismo kaj Surrealismo, kiujn Duchamp trairis - tamen sen halti.

Naskita en Francio, tiu evoluo ne tie multe floris, sed, trairanta Atlantikon, ĝi disvolviĝis en multego da variantoj en la plej burĝeca lando de l' mondo, kun forta principo je la rajto al pigreco (maksimume 1% da ŝvito kun 99% da inspiro) sed sen ajna kontesto pri varigo de l' produktitaj artaĵoj, se juĝi laŭ ties gigantaj prezoj.




Tio ne estis Niagara akvofalo pakita de Christo, nek ne atendita efiko de Weiner-koncepta alĵeto de pilko, sed natura rezulto de rigora vintro, kiel en 1911...

Se arto ne plu percepteblas en objekto, sed en ago, fameco ne plu kronas bonegecon en arta farado, sed en kapablo elpensi novan manieron koncepti artajn agojn. Ne plu gravas artistaro de iu skolo, gravas nur ĉefi en skoloj...

Tiel, sin difinas kiel artistojn, homoj kiel Lawrence Weiner kiu skribe lanĉis «fari decidigan agon» ekzemple «ĵeti pilkon en Niagaran akvofalon». La ago okazis, sed Weiner precizigis ke ne gravas ĉu ĝi okazis aŭ ne, ĉar gravas nur la skriba propono.

Analoge Richard Long realigis marŝadon de la 19a ĝis la 22a de marto 1969, kaj ĝin prezentis en arta ekspono sub formo de rektangula folio blanka, kun nur nomo, dato, kaj titolo de l' «verko»...




Ankaŭ notindas tiu Sol LeWitt, kiu disponigas sian «artan» ideon al diversaj «art-metiistoj» kun speco de uzindikoj, el kiuj realiĝis laŭ

cirkonstancoj kaj farintoj malsamajn artaĵojn, kiel ekzemple tiu «Wall Drawing», por kiu li donis bazajn desegnitaj formoj, kaj indikojn kiel ilin uzi por




la realigo de l' muro. Ĉu por vi, ĉio priskribita ĉi supre ne meritigas la nomon arto? Al tiuj homoj kiuj unuanime motas per «Artisto ne estas metiisto» ĉu vi rebatus ke ne grandas la diferenco inter Sol LeWitt kaj Frank Hornby, kiu (grandskale) vendis sian «metiistan» ideon de l' ludilo «Meccano» en kiu per pecoj el elementaj formoj estas poponataj realigoj de pli malpli kompleksaj objektoj?



Ĉikaze, vi certe estas unu el tiaj homoj kiuj plu veturas per kaleŝo, kiun vi parkas rando de romantikaj parkoj, aŭ eĉ pli praece, per kabrioletoj rando de padoj de LeNostraj ĝardenoj...

2 - Ĉu vere la unua pakaĝisto?

Pri la Triumfa Arko en Parizo, la arta ideo de Christo, se mi bone komprenis, kuŝas en lia serio «envolvi por pli bone montri». Nu kiel videblas en la artikolo de Laŭrenco, la ideo ne estas nova, mi de longe frandis la «hazardan renkontiĝon de kudro-maŝino kaj pluvombrelo sur dissekcia tablo», kiu ne postulis tiajn gigantajn realigojn sen alporti pli ol la «hazarda renkontiĝo». Tiu «koncepto» ankaŭ troviĝas ĉe A. De Saint-Exupéry en sia poeteca romano «*La Eta Princo*», en kiu li sukcesis kontentigi la princeton kiu petis «Desegnu por mi ŝafon!» nur per desegno de skatolo supozata enteni ĝin.



3 - La pakado kaj la vareca idealo


La fascino de Christo por la ago paki tute kongruas kun la usona dominanta ideologio, ece vareca, en kiu la pakajo foje pli efikas por la vendado ol la pakita aĵo mem: grandega skatolo por sufiĉe eta varo, allogaj koloroj, nomoj kaj motoj, kiuj puŝas al konvulsia aĉeto. Ankaŭ ne bagatela kuŝas la fakto ke la pakita materialo estas ŝtofo, drapire aranĝita, kies virineca aspekto aldonas erotikan econ (almenaŭ por mi, sed kvankam tiu aspekto tute ne malplaĉas al mi, ĉio erotika ne nepre estas artaĵo...).



Kaj eĉ se oni sin persvasas ke ja valoras la ideo provi krei formon de arto, kiu sukcese kaj nekontesteble eskapas la varigon de arta kreaĵo, liaj asertoj *neniu povas aĉeti tiujn projektojn, neniu povas posedi ilin, neniu povas fari komercadon per ili, neniu povas vendi bileton por ilin vidi, eĉ ni mem ne posedas la verkojn. Tiuj estas pri libereco. Libereco estas malamiko de l' posedado, kaj posedado estas egala al daŭreco, konstanteco. Tial la verkoj ne povas restadi.* » restas tre dubinda ĉar eĉ se efektive la artaĵo mem - laŭ ĝia tre strikta difino - eskapas al la varigo, ĝia kreado postulas amason da plej pure varecaj transakcioj kaj fine produktas amason da ligitaj produktoj, kies ĉefa rolo estas variĝi por akiri monon. Se la «artaĵoj» kiel tiuj de Christo ŝajnas kontesti la varecan ideologion, ili tutcerte ne endanĝerigas ĝin!

4 - L' antéchrist: Gustave Eiffel

Cetere, same kiel por LeWitt al kiu mi oponis Hornby, al Christo, mi povas oponi Gustavon Eiffel-n: Inĝeniero entreprenestro, li ja estas la nuna heredanto de l' mezepoka metiisto. Li havis *ideon*, nome fari rekordan altan turon, uzante siajn spertojn en farado de ponto, do iel *pontan turon*. Neniel, neniam, li sin taksis artisto, tamen samkiel Christo, li agis laŭ *koncepto kaj en plena naturo aŭ urboj*. Same kiel Christo, li devis multe barakti por ricevi permeson realigi sian projekton, same kiel Christo, la permeso estas limigita en la daŭro, same kiel Christo li mem pagis (almenaŭ pere de sia entrepreno) la konstruon, fakte la du aferoj Eiffel-Turo kaj Enpakita Triumfarko tre ege similas... krom tamen, ke Eiffel, male al Christo, ne konsentis kun efemereco de sia realigo, kaj batalis (sukcese) por ke io unue nur spektakla allogaĵo iĝu utila objekto, kaj ne nur speco de giganta, iel eĉ ofenda, malŝparo de mono, nur por povi diri «mi faras kion mi ŝatas fari» «l' tuta verko estas pri libereco»... Al tiaj ekstrem-dekstraj liberecanoj, multe pli bon-gustas al mi tiaj tutcerte ne maldekstrulaj entreprenestroj kia Gustavo.



Tio ne estas verko de Christo sur la vorko de Eiffel, sed «projekto» (arta?) anoncita far BatiActu la 1an de aprilo 2019 laŭ «peto de azianinoj malfavoraj al sunbruniĝo»...Gravas ja la dato...




5 - Por konkludi,
En PIV, la radiko estas verba por *verk'*, kaj substantiva por *vork'*...

Ĉu, el tio,
Esperantistoj nepre konsentu
ke dum Christo *verkas kreaĵojn*,
Eiffel nur *kreas vorkojn*?...



Muziko de Ennio Morricone
Teksto de Joan Baez
Traduko de
Miguel Gutiérrez Adúriz


La BALADO de **SACCO kaj** **VANZETTI**



Jen por vi, Nikola kaj Bart
restu ĉiam en nia kor',
nur via estas la fina hor'
el agoni' por via glor'.

Jen por vi, Ni _____ ko __ la kaj Bart
res _____ tu ĉi _____ am en ni __ a kor', nur
vi _____ a es _____ tas la fi __ na hor' el
a _____ go ____ ni' por vi _____ a glor'.

Sennacieca
REVUO



Sennacieca Asocio Tutmonda